

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 104, decembro 2012

Nia proverbo:

Ĉiu vivotago via estas paĝo de via biografio, zorgu por skribi ĝin bone, ĉar malbela paĝo malpurigas tutan libron.

Sami Frasherri- nacia albana poeto XIX jc

Adreso de redakcio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio (00355682580758; (bselimi@gmail.com)

Kunlaborantoj: Shaban Hasani (00355682080677, shabanhasani@gmail.com)); Gjergji Gusho (00355682703259; gjergji_gusho@yahoo.com) Agim Peraj (355694472430, agimperaj@yahoo.it); Sajmir Beqiraj (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com); Nehat Sokoli (++355682587699, nehatsokoli@yahoo.com); Engjell Gusho (00355692350111, engjellgusho@yahoo.com), Rita Permeti (0035542363 360; 00355686857800 ritapermeti@yahoo.com),

Enhavo

Ni funebras

Forpasis eminent albana esperantisto

NI kaj ILEI, AIS, UEA

Kunsido de ILEI

Propono

Anoncoj

Internacia konkurso de infanaj desegnaĵoj

Itala Esperanto kongreso

Informaĵoj

El niaj leteroj

Nia propagando

Ĉu la plej granda Esperanto-libro
Kontraŭ la kalkiĝo-cerba gimnastiko
Paĝaro tre interesa pri Esperanto

Artikoloj- Politiko

Hussaj Al-Amily-reago

Ian fantom- raporto

Paiva Netto: Morto ne estas fino

Instruado

Reta internacia Esperanto kurso

Mia saĝo (de Zlatko Tišljarić)

Birgitta lernas la albanan

Beletraĵoj

Libreto du lingva: pole kaj albane

Poeziaĵo el Kosovo

Fragmento el la romano

Ni funebras

Forpasis sinjoro Vasil Pistoli



La 28-an de oktobro 2012, alvenis el Nov Jorko la malĝojiga novaĵo pri la forpaso de sinjoro Vasil Pistoli, eminenta albana esperantisto, notinde kontribuante en la disvastiĝado de internacia lingvo en nia lando.

Lia familio venis el la albana urbo Struga (nun en Makedonio), kiu poste instaligis en Shkodër. La patro estis panbakisto. Dum la Dua Mondmilito ĝi aktiviĝis kontraŭ la faŝista jugo, pro tio oni internigis patron kaj Vasil en la koncentrejo nazia en Prishtina (Kosovo). Post liberiĝo, Vasil studis en Bulgario pri konstruĝinĝierio, longan tempon deĵoris en Ministrejo pri Konstruado kaj poste instruis en Universitato de Tirana. Li kontribuis, kromalie, per siaj studoj en la kampo de konstrumaterialoj. Pensiiginte, li ne ĉesis la studadon kaj agadon surkampe de la inĝenieriaj sciencoj.

En la Ministrejo de Konstruado Vasil Pistoli subtenis sian kolegon Ĉefo Fico por starigi virtualan Esperanto-klubon kiu anstataŭus tiutempe esperantistan asocion enlande, en la kondiĉoj de totalisma reĝimo kiu ne permesis “nedekretitajn”, ne “kompartiemajn” asociojn. Tiel Esperanto komencis disvastiĝadi dank’ al sia agado kaj kunklubanoj nedeklaritaj tiaj...en la universitato kaj ekster ĝi per la kursoj senpagaj kaj broŝuroj simplaj.

Mi estis lia intima kunlaboranto en tiu agado ekde pli ol 50 jaroj. Komence mi estis ano de lia lernokurso malfermita de li aŭtune 1961 kune kun ing. Ĉefo Fico ĉe la eksa kulturdomo “Ali Kelmendi” en Tirana. Mi daŭrigis la kunlaboron pluen, aparte post la jaro 1990, kiam la neregistaraj organizaĵoj akiris la rajton de civitaneco ankaŭ en Albanio. Kvankam ĉirkaŭ 20 jaroj pli juna ol li, mi sentis min ĉe profesoro kiel kamaradon kaj amikon. Mi estas aprecinta, unuavice la modestecon, due lian riĉan kaj multflankan kulturon, neestingeblan soifon por scioj sur ĉiuj homaj kampoj, ne nur en sia malvasta specialeco, sed ankaŭ en filozofio, religio, historio, internaciaj rilatoj, kio estas klare esprimita en lia kontribuo kaj laboro por disvastiĝo de Esperanto.



Prof. Vasil Pistoli, maldekstre kun esperantistoj, inter ili la forpasinta izraelano Jozef Ŝemer

Tiu lasta, kiel sciite, estas tre nobla agado, ĉar ĝi strebas la bonkomprenemon inter la diversaj popoloj sur demokratiaj bazoj, sen kiu ajn nacia diskriminacio kaj malegaleco, kiu konservas la naciajn lingvojn kaj kulturojn.

Ĉekape de la Albana Esperantista Ligo dum kelkaj jaroj kaj poste direktoro de la Albana Esperanto-Instituto, profesoro Pistoli sin montris tre aktiva en la kursogvdiado, lernolibra kaj metodika kompilado por albanoj, en tradukado de verkoj kaj libroj el Esperanto al la Albana kaj el la Albana al Esperanto, en propagando de la esperantista movado mem per la gazetaro kaj elektronika medio, en renkontiĝoj kun fremdaj esperantistoj. Li estas esplorinta ankaŭ la spurojn de la esperantista movado en Albanio komenciĝinta en Shkoder almenaŭ ekde la jaro 1907, de Lazër Shantoja, Cuk Simoni, fratoj Wilhelm kaj Mikel Koliqi, Mark Kakariqi ka, sed renkontitaj ankaŭ en la aliaj regionoj, kiel en Gjirokaster kun Ĉefo Fico, en Marbordo kun Janko Pali, en Tiranë kun dr. Hamdi Sulçebe kaj alie.

La jaro 1993 notis la stariĝon de la amasaj lernokursoj de Esperanto, komence en universitato, en Fakultato de Historio kaj Filologio, kie je la finiĝo de la lernokurso, ekzameniĝis 22 gestudentoj, poste en la Tutnacia Mezlernejo de Fremdlingvoj kaj Pedagogia Mezlernejo en Tirana, en aliaj mezlernejoj kaj elementaj lernejoj en Tirana kaj en la distriktoj.

Estas jam ĉirkaŭ 500 gestudentoj kiuj ekzameniĝintaj kaj ricevintaj la konfirmon de profesoro Vasil Pistoli per signo sur iliaj certigiloj akiritaj pri la elementa nivelo de Esperanto .



Prof. Vasil Pistoli maldekstre kaj mi kun fremdaj esperantistoj dum la vizito tra Tirana

Mi memoras emociplene tiujn tagojn, pluve kaj sune kiam profesoro, tiam 70 jara, nelaciĝema, alvenis piede kaj ĝustatempe en la halojn de la Fremdlingva Fakultato en Tirana aŭ de la Mezlernejo por lekci pri Esperanto. En la Fremdlingva Fakultato li eĉ okazigis disputon pri la antaŭecoj de Esperanto kompare al la aliaj tiel nomataj "grandaj lingvoj", kiuj hodiaŭ prezentiĝas kiel "internaciaj", sed envere ili ne ludas tiun rolon. Kontraŭe, ili nur domaĝas la naciajn kulturojn aparte de la malgrandaj popoloj, forrabas al centmilionoj da homoj, aparte al gejunuloj, multjaran tempoperiodon tre valoran por ilin asimili fuŝfuŝe, anstataŭ ke oni utiligu tiun tempon por ke profundiĝu en siaj studataj specialecoj. Tiel "la grandaj lingvoj" kreas privilegiaĵojn por kelkcent procentoj de la monda loĝantaro malfavore al la cetera plimulto, kaj kio estas malplejbona, ne solvas la problemon de la libera, facila kaj demokratia internacia komunikiĝado.

Lastajn jarojn, profesoro Vasil estis laborante por finkompili la grandan vortaron albana-esperanta, kiu pliriĉigos la fonduson de la vortaroj enmonde kaj helpos notinde al la enlanda Esperantista movado.

Profesoro Vasil estas helpinte sufiĉe multe ankaŭ por kvalifikiĝo kaj trejniĝo de novaj kadroj por instruado de Esperanto. Tiel, post la jaro 1997, Instituto, gvidata de sinjoro li, entreprenis grandan projekton: venigon de dekoj da albanaj gestudentoj al Internacia Studumo en Bydgoszcz, Pollando, pri Turismo kaj Internacia Kulturo, uzanta kiel laborlingvon ankaŭ Esperanton. Nun pli ol 20 el ili estas jam bakalaŭriĝintaj kaj eĉ du ankaŭ magistrataj de Internacia Akademio de Sciencoj de San Marino kun kiu tiu Studumo kaj nia Instituto kunlaboras. Sendube, tiuj ĉi bakalaŭriĝintaj studentoj estos la venontaj aktivuloj de la esperantista movado en Albanio, certe sur pli alta kultura nivelo, ol tiu de la maljuna generacio kiu tamen aŭdacis kaj sakrificis elspezante sian libertempon por tiel nobla idealo kia ja estas la esperantista idealo.

Bardhyl Selimi,

sekretario de la Albana Esperanto Instituto

Njoftim zyrtar

Akademia e Shkencave e Shqipërisë

Oficiala komuniko

Akademio de Sciencoj de Albanio

Te dielën në mëngjes ne dt. 28.10.2012 nderroi jetë në “Jamaica Hospital Medical Center”, TRUMP PAVILION - New York Prof. VASIL PISTOLI i cilësuar si Babai i Ndërtimit Shqipëtar.

Diamançon matene, la 28-an de oktobro, forpasis en “Jamaica Hospital Medical Center” Trump Pavilion- New York prof. Vasil Pistoli, kvalifikita kiel la Patro de la Albana Konstruado.

Lindur me 1923 në Shkodër.

Naskiĝis en la jaro 1923, en la urbo Shkoder

Përfundon Studimet si «Inxhinier Ndërtimi» specialiteti «Konstruksione» në 1953 në Sofie (Bullgari).

Finstudis pri “Konstruada Inĝenierio”, specialeco “Konstruktaĵoj” en la jaro 1953 en Sofio (Bulgario).

Në 1972 i Akordohet titulli shkencor «Docent».

En la jaro 1972 akiras la sciencan titolon “Docento”

Pajiset me «Leje projektimi Nr. 1» në vitin 1957 lëshuar nga «Dega e Studimeve dhe Projektive» të Ministrisë së Ndërtimit.

Oni havigas al li “Desegnolicenson nr.1” en la jaro 1957, liverita de “Studad-kaj Desegnobranĉo” de Ministerio de Konstruado.

Në vitin 1957 u emerua Sekretar i Komisioni Shtetëror për Projektme në Ndërtim, organ i Kryeministrisë.

En la jaro 1957 oni nomumas lin Sekretarion de la Ŝtata Komisiono por Projektoj en Kosntruado, organo de Ĉefministrejo.

Nga viti 1953 deri në 1985 punon në: Ministrinë e Ndërtimit, si Kryeinxhinier në Kombinatin e Prodhimit të Materialeve të Ndërtimit, si Shef katedre në Fakultetin e Inxhinierisë së Ndërtimit.

De la jaro 1953 ĝis la jaro 1985 li deĵoras en : Ministrejo pri Konstruado, ĉefingĝeniero en la Kombinato de Produktado de Konstrumaterialoj, ĉefo de la katedro en la Fakultato de Konstruingĝenierio.

Pranohet anëtar i Kolegjumit Ndërkombëtar të Shkencave në AIS (International Academy of Sciences) - San Marino, në 1992

Oni akceptas lin kiel membron de la Internacia Koleguro de Sciencoj ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)- San Marino, en la jaro 1992.

Mbas daljes në pension angazhohet në Akademion e Shkencave, në fushën e Enciklopedisë dhe Ndërtimeve Antisizmike.

Pensiiĝinte li engaĝiĝas ĉe Akademio de Sciencoj surkampe de Enciklopedio kaj Kontraŭsizmaj Konstruadoj.

Vasil Pistoli ka projektuar disa objektet, si industriale, godina banimi, social kulturore e tje .

Vasil Pistoli estas desegninta kelkaj objektojn, ĉu industriaj, ĉu loĝdomoj, socikulturaj domoj ks.

Në fushën e ndërtimit ka shkruar 2800 faqe tekste për Fakultetin e Inxhinierisë së Ndërtimit dhe libra të tjera.

Surkampe de konstruado li estas verkinta ĉirkaŭ 2000 tekstopaĝojn por la Fakultato de Konstruingenierio kaj aliajn librojn.

Ka botuar disa artikuj shkencor për disa revista shkencore ndërkombëtare në Svicer, Japoni, France, San Marino etj.

Li estas publikiginta kelkajn sciencajn artikolojn por kelkaj sciencaj internaciaj revuoj en Svisio, Japonio, Francio, San Marino ka.

Vasil Pistoli ka një kontribut të madh edhe në fushën e Kulturës, ku renditen një sërë krijimesh; si perkthimi Librit “Gjergj Kastrioti - Skënderbeg” në gjuhen Esperanto, Metoda e mesimit te Gjuhes nderkombetare “Esperanto”, Përkthimi ne gjuhen Shqip te Librit “Realizmi i Ri” i filozofit të madh Gjerman Bruno Vogelmann etj.

Vasil Pistoli estas notinde kontribuinta ankaŭ surkampe de la kulturo, kie enviciĝas kelkaj verkaĵoj: traduko de la libro “Gjergj Kastrioti- Skanderbeg en Esperanton, Lernolibro de Esperanto por albanoj, traduko de la filozofia verko de Bruno Vogelmann “Nova Realismo, ka.

Ndarja nga jeta e Prof. Vasil Pistolit është një humbje e madhe për të gjithë ne.

La forpaso de prof. Vasil Pistoli estas granda perdo por ĉiuj ni.



Vasil Pistoli estis ankaŭviolinistoĉe la ĥoro de universitato (la unua maldekstre de la dirigento)



El la solenaĵo en Akademio de Sciencoj okaze de 80 jariĝo de Vasil, 2003



El la solenaĵo, dekstre s-ro Bardhyl Selimi



Vasil Pistoli en internacia renkontiĝo de esperantistoj



Vasil Pistoli en esperantista internacia renkontiĝo



Vasil Pistoli inter sia kolegaro de Ministrejo pri Konstruado



Vasil Pistoli antaŭ la dombloko desegnita de li



Vasil Pistoli en Usono



Vasil Pistoli en Novjorko, apud la hejmo de sia filo

Komentoj:

Multegajn kundolorajn sentojn al la albanaj esperantistoj!

renato corsetti

via del castello, 1 it-00036 palestrina, italujo

renato@esperanto.org

Via informo pri la forpaso de tiel agema kaj respektinda esperantisto VASIL PISTOLI vere tretristigis min.

Mi esprimas miajn profundajn kondolencojn al liaj gefamilianoj kaj al viatutlanda Esperanto-movado.

Boriša Miličević

direktoro (volontulo) de

Esperanto-Instituto de SEL, Serbio

Mi pardonpetas pro mia manko je multaj kazoj, sed miaj kondiĉoj malebligis tion.

Hodiaŭ mi kontrolis la komputilon, ĉar mia komputilo difektiĝis kaj bruliĝis (partoj) dum tiuj stormaj noktoj .

Se mi devus skribi pri kondolenco, mia koro suferegas, tamen mi faras ĉar sentas devigon pro niaj komuna honorinda kaj respektinda persono rara kiel estis S-ro Vasil Pistoli.

Mi petas transdoni miajn plej elkorajn kondolencojn sincerajn al liaj familianoj.

Estas vere granda perdo por nia Esperanto movado.

Kvankam mi ne eblas vojaĝi, travivas kune kun liaj familianoj tian perdon.

Elkore kaj sincere kun vi

Agim Peraj, Shengjin, Albanio

Tio estas trista novaĵo kaj granda perdo.

Mia kondolenco al la familio kaj al la samideanoj.

Nikola Rasiĉ, Nederlando

Mi estas tre malĝoja pro forpaso de gravulo Vasil Pistoli.

Mi konsolas al vi tutkore.

Sincere via Korea amiko HOPE Kim(Kim Y.M.)

대구광역시 남구 봉덕2동 929-4

명인소아청소년과의원 김영명

우 .705-827

053-471-7409, 016-658-1398

Honoron al la verko kaj kontribuo de Vasil Pistoli ankaŭ surkampe de disvastigado kaj instruado de Esperanto en Albanio

Engjell Gusho, Pogradec, Albanio

La forpaso de s-ro Pistoli sendube estas grava perdo por la albana ILEI-sekcio. kaj vi perdis personan amikon.

Post mia vizito al li en Tirana, al mi restas la memoro pri vigla, afabla esperantisto. amike

Agnes Geelen, Belgio

Miajn sincerajn kondolencojn por la forpaso de la amiko via kaj ĉiuj albanoj, sciencisto kaj elstara esperantisto Vasil Pistoli.

Skender Zogaj, Kosovo

Donu la tristan noticon en la diskutgrupo de LK

mi kondolencas

amike

Ĝoano, Brazilo

In memoriam por inĝ. Vasil Pistoli estis bona informaĵo ankaŭ pri la Esperanto Movado en Albanio. Bv akcepti ankaŭ miajn kondolencojn.

Prof. Emil Lafe, Tirana, Albanio

Miajn kondolencojn al la familianoj kaj al la tuta albana esperantistaro.

La nomo de s-ano Pistoli estas vaste konata, kaj li meritas nian plenan estimon pro la aferoj faritaj por Esperanto.

Josip Pleadin, Kroatio

Dankon al vi pro la informo, ĝi povas aperi en plena amplekso en nia retpaĝo, sed por IPR ni bezonas ĉ. unu A/5-paĝan tekston, kune kun foto. Ĉu vi povas tion fari/sendi por mi?

Jozefo Nemeth, Hungario

Akceptu mian kondolencon. Mi deziras al vi kaj al viaj gekolegoj forton por la daŭrigo de sekcia laboro por la intereso de nia lingvo.

Zsofia Korody, Hungario

Saluton, kara kolego

mi ĵus legis konsternite vian nekrologon pri prof. Vasil,

ĉu vi konsentas ke mi metu ĝin/lin en la Panteonon de edukado.net?

Mi bezonus ankaŭ foton por tio, mi povas tuj fari tion, se vi sendas foton

dumtempe mi jam lanĉis la paĝon kaj elos lasi ankaŭ kondolencajn vortojn.... sed mankas la naskiĝjaro

Katalin Kovats, Nederlando

Ni kaj ILEI, AIS, UEA

Nova teamo -- novaj planoj: ILEI estrarkunsidas

Kunvenis la nova estraro de ILEI por plani la laborojn kaj projektojn por la sekvaj jaroj. Kvin el naŭ estraranoj kunsidis tuttage kaj en la nokto de la 14a de novembro, kun planoj skajpe komuniki en la morgaŭo kun iuj el tiuj, kiuj ne povas ĉeesti. Post komencaj formalaĵoj, la tuja temo estis la sekva Konferenco de ILEI, okazonta en Herzberg-Sieber de la 12a ĝis la 18a de julio, 2013. Organizaj aranĝoj survojas al definitivigo, samkiel konsisto de LKK kaj akcepto de buĝeto, tiel ke aliĝilo estu tre baldaŭ publikigebla, kiu kovros ankaŭ la loĝoferton, ekskursojn kaj simile. Subtene al la konferenca temo 'Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj' okazos 90-minuta ateliero kun superrigardo de kurantaj projektoj kadre de Komenio (junuloj) kaj Grundtvig (nejunuloj) kaj praktikaj kunsidoj, kiel starigi kaj mastrumi tiajn projektojn. Samtempe kun la konferenco okazos SALO 8 (Somera Arbara Lernejo), tiel ke instruistoj povu gvidi lecionojn tie, kun eblo por kelkaj model-lecionoj. SALO kunligiĝos kun nove lanĉota ILEI-Lernejo (la nomo ne definitiva), kiu estos iuspeca aliformigo de la siatempe

populara Gimnazio de ILEI el la naŭdekaj jaroj. Planoj ekzistas faciligi la konferencan partoprenon al ŝlosilaj agantoj el aliaj kontinentoj.

Por la konferenco en 2014 venis du interesiĝoj, sed unu retiriĝis; la ĉeestantaj estraranoj leginte detalan pet-dokumenton principe akceptis la restintan proponon, kondiĉe nur je la plenumo de kelkaj formalaĵoj. La foraj estraranoj voĉdonos tra la sekvaj tagoj, tiel ke ni proksimas al publika anonco pri la elektita urbo kaj lando. Imagoj pri 2015 kaj 2016 venis en diskuton.

Sekvis vasta diskuto (cerbo-ŝtormado) pri la agad-planoj, task-dividoj kaj ĉefe la prioritataj laborkampoj kaj projektoj por la mandato de la nova estraro. Konsentite, ke la estraranoj pretigos tri-jaran laborplanon por la periodo ekde la konferenco en 2013 ĝis tiu en 2016. Malneton ricevos la komitato frue en 2013, cele al akcepto en Herzberg-Sieber. La diskuto formis la bazon por la pritrakto de buĝeto 2013, por ke ni laŭbezone modifu la pretigitan malneton, por asigni rimedojn al la kampoj, kiujn ni opiniis prioritataj. La buĝeta laboro okazos morgaŭ matene (la 15an de novembro).

Tiuj prioritataj kampoj kaj projektoj estas jenaj, pli-malpli en gravecordo:

☐ Konkretigo de la skemo kaj postularo por modula programo de instruista trejnado kaj flegado tiucele de la rilatoj kun ALTE (la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo).

☐ Fortigo de la eksteraj rilatoj kaj videbleco de la Ligo, kun FIPLV, ALTE kaj aliaj, ankaŭ kun Unesko, prepare al la 60a jubileo de la rezolucio ĉe Unesko en Montevideo.

☐ Plia laboro pri la multlingva retejo, ĝis punkto ke ĝi estu publike anoncebla.

☐ Daŭrigo de la regiona agado por ekspluati eblojn en Azio, Latinameriko kaj Afriko.

☐ Esploro de ebloj por koncepti kaj starigi projektojn, kiuj povos altiri financon subtenon de ekstermovadaj fontoj.

☐ Kuraĝigo al homoj kaj organizoj pretigi dulingvajn fakajn tekstojn, por disponigi pli varian kursmaterialon al instruistoj kaj servi al la komputistaj grupoj; proksimigi rilatojn dum la tujsekva KAEST kun E@I kaj ISAE tiucele kaj por aliaj temoj de komuna intereso.

☐ Pli aktive apogi instruistojn per materialoj (ekz. filmoj), interaktivaj retejoj k.s., per propraj iniciatoj kaj intensigo de kunlaboro kun <edukado.net> kaj <lernu.net>.

☐ Proksime sekvi kaj avangardi en rilatoj inter ILEI kaj UEA, specife rilate al la Strategia Vizio kaj la Laborplano, kiu fontos el ĝi.

☒ Eldoni serion de dulingvaj varbiloj, kiuj dismetas koncize la edukajn valorojn de la instruado de Esperanto.

Tiu vasta kvinopa diskuto okupis pli ol tri horojn, sed tre utilis por vidi la vojon antaŭen, eĉ se ne okazis dume novaj decidoj. La kunsidado daŭros tra preskaŭ la tuta morgaŭa tago, ĝis la vespera malfermo de KAEST, kun pliaj flank-kunsidoj okazontaj tra la tagoj de KAEST por alfronti specifajn temojn.

Stefan MacGill, Prezidanto

Zsófia Kóródy, Vic-Prezidanto

Radojica Petrović, Sekretario

Magdaléna Feifíčov (Fejfi), Vic-Sekretario

Enik Zeng Sereghy, estrarano pri ekzamenoj kaj varbado

Modra-Harmonia, Slovakio, la 14an de novembro, 2012, malfrue.

Aldonao: Foto el la kunsido (krom al retgrupoj kiuj ne akceptas alkroaojn).



Propono por la premio ADA

Mi proponas por la premio Ada sinjorinon Alicja Lewandeska- Quednau.

Mi konas ŝin ekde 15 jaroj, komence perkoresponde kaj poste ankaŭ persone.

Ŝi ege zorgadis pri niaj studentoj ĉe ISTK en Budgoszcz (1997-2008) ne nur kiel instruistino sed ankaŭ kiel edukisto. Kune kun sia honorinda edzo ŝi ĉiam pretis mentori por ili, aranĝi kaj akuratiĝi ilian studadon, vizakiron. Cetere ŝi studis pri Albanio kaj albanoj por ke pli bone influu pozitive en la studado.

Cetere ŝi havis konstantajn rilatojn kunlaborajn ankaŭ kun nia landa movado, ofertante ĉiam sian helpon en diversaj aferoj.

Rememorante karan Adan kiun mi konis perkoresponde kiam ŝi estia ankoraŭ viva, mi povas fari paralelojn en la konduto de ambaŭ ili.

Mi renkontis ankaŭ la edzon de Ada en Karlovo Bulgario kaj tuj konstatis mirindan similecon inter la geparo Quednau-Alicja kaj Ada kaj sia edzo...

Espereble ke Alicja akiros la premion, mi antaŭdankas anticipi,

Amike. Rita Permeti, Tirana, Albanio

Anoncoj

INTERNACIA KONKURSO DE INFAN-DESEGNAĴO

konkurso de infan-desegnaĵoj

Ni invitas ĉiujn instruistojn, kiuj deziras partoprenigi siajn gelernantojn al tiu konkurso . Ankaŭ la gepatroj povas partoprenigi siajn infanojn.....

Konkursaj reguloj

Jara temo: Strange ???.....fremduloj.....strangeĉo

Formato : Centimetraj dimensioj , minimume 40x30

Kategorioj A : ĝis 7 jara

B : pli ol 7 ĝis 10 jara

C : pli ol 10 ĝis 14 jara

Limdato ĝisla 1a de Marto 2013

Dorse de la desegnaĵo notu, esperantlingve, nomon, aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la E-klubo, kaj koncizan priskribon de la desegnaĵo.

Premioj estos atribuitaj po 3 en ĉiu kategorio.

Bonvolu sendi desegnaĵojn al :

Centre Culturel St Nazaire Esperanto

38, rue de la Croix Fraîche

44600 SAINT NAZAIRE

FRANCE

Tradicie, la franca Kulturdomo de Esperanto organizas jarfinan renkontighon en sia Kastelo de Greziljono. La festo, tauga por familioj, chiuĵare plezurigas homojn per bona etoso, festa regalado kaj charma kadro. Ni invitas vin alighi, vizitante la retejon de la Kulturdomo
<http://gresillon.org/jarfino>.

Por tiuj, kiuj (ankorau!) ne konas la Kastelon situanta en la bela Anj'ua regiono en Francio, ghi reprezentas de 1952 komunan renkontighan lokon por chiuĵ esperantistoj. Ni instigu vin

malkovri au reviziti tiun belan parton de Francio, kaj tiun heredajhon de la esperantistaro, por esti parto de ĝhia vivo kaj aktoro de ĝhia disvolvo. Tie okazas staghoj, renkontigoj, kursoj, festoj la tutan jaron, kaj specife ni deziras ebligi al ĉiuj celebri en amika rondo la novan jaron.

Konsciaj pri neceso limigi la kostojn por ebligi la plimulton profiti Esperantujajn eventojn, ni aranghos kunveturadon, varmigis komfortajn chambrojn kaj preparos por vi bongustegajn manghojn, kaj certas ke tiel multaj profitos agrablan, ghojigan renkontighon denove ĉi jare.

Ghis fino de Decembro!

Pierre Soubourou - Ŝtonĉjo
François Lo Jacomo
Jannick Huet
kaj aliaj volontuloj

Itala Esperanto-kongreso

SUNO, MARO, KONCERTOJ KAJ NOKTA VIVO

INFORMITALE 171

Oficiala inform-servo de Itala Esperanto-Federacio

Se vi enuas pri tio vi povas aŭskulti klerajn prelegojn pri Esperanto, ĝia interna ideo kaj ĝia akuzativo.

En Castellaro (Katelaro) apud San Remo (Sanremo) de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2013 okazos la 80-a Itala Esperanto-Kongreso. Se vi jam partoprenis la italan kongreson de la lastaj jaroj vi scias pri kio temas. Se vi ne partoprenis, pensu pri io meze inter la kleriga parto de la UK kaj la ekskursoj de la UK (sed tre pli malmultekostaj), meksika festo, feriaj kluboj ĉe la maro Mediteraneo kaj festivalo de Esperanto-muziko kun rimarkinda junulara partopreno kaj etoso.

Ĝi okazas en Kastelaro, apuda urbeto de Sanremo, preskaŭ ĉe la landlimo inter Itlaujo kaj Francujo, en la konata Lazura Marbordo.

Bonvolu legi en <http://kongreso.esperanto.it/80/?lang=eo> nian inviton al vi, kaj en http://kongreso.esperanto.it/80/?page_id=63&lang=eo pri la aliĝo kaj aliĝkotizoj.

Plej grave, bonvolu legi en http://kongreso.esperanto.it/80/?page_id=67&lang=eo pri loĝado kaj loĝkostoj.

Eble vi partoprenos la Universalan Kongreson en Rejkjaviko, kaj tio estas io bona, sed tuj poste venu al ni por senglaciĝi.

80-a Itala Esperanto-Kongreso
kongreso@esperanto.it

Informitale
Itala Esperanto-Federacio - <fei@esperanto.it>
Itala Esperantista Junularo - <iej@esperanto.it>

via Villorosi, 38 I-20143 Milano - Tel+fax +39 02 58100857
<http://www.esperantoitalia.it/>
Kontribuojn sendu al: f.amerio@libero.it
Kompilanto: Francesco Amerio <f.amerio@libero.it>

El la leteroj

Koran dankon pro via tre afabla kaj ĝoijga reago kaj pro via informo pri aperigo de la artikolo de la verkisto Paiva Netto en la venonta, decembra numero de via bulteno. Mi petas, kun antaŭdanko, ke Vi bonvole aperigu en la publikigaĵo, sub la artikolo, la LBV-retejon: www.bonavolo.com.

Kun ankoraŭfoja danko, al via koro ni dediĉas ĉi tiun penson de la edukanto Paiva Netto:

"Ne eblas propono, kiu efektive konkretigos siajn plej bonajn rezultojn, se ne ĉeestas etoso de fidela interkompreniĝo, tio estas, Bona Volo inter la homoj".

Kun ega saluto el Brazilo,

frate kaj samideane,

Maria Aparecida

www.tbv.com.br/esperanto

2012/10/1 Paulo César <paulocesar.joaquinn@yahoo.com.br>

Dankegon kara amiko.

Viaj vortoj honorigas nin en Brazilo.

Ni chiam plezuras la bonega kontakto kun vi.

Samideane via,

Paulo César
Brasília/Brazil

www.bonavolo.com

www.tbv.com.br/esperanto

Salutojn el Albanio

Antaŭ kelkaj jaroj mi tute ne aŭdis pri Templo de la Bona Volo, pri la Legio de Bona Volo, pri la majstro Paiva Netto ka brazilaj esperantistoj kiuj tiel fervore kaj diligente laboras surkampe de edukado por la paco.

Nun mi eksciis kaj plue konatiĝos kun via vivo kaj laboro.

Brazilo por albanoj estas vera kontinento ankoraŭ ne espolorita. Unue estis filmoj atingintaj nian landon antaŭ pluraj jardekoj, poste ankaŭ literaturo, krom la fakto ke ni regule studis vian geografion kaj historion en la lernejo.

Nun estas bone agnoskite ke estontaj jardekoj apartenos al Ĉinio, Barato kaj Brazilo, novaj faktoroj en la ekonomio kaj politiko tutmonda.

Ĉirilate la agado por paco, por edukado de nova generacio aparte en XXI jarcento en via medio reprezentas sekvidan ekzemplon por ĉiuj, ne nur esperantistoj, ĉar la principoj gvidantaj vin ne identas al la jam malnoviĝintaj ideologioj komunismaj kaj kapitalismaj de XX jc.

Cetere surkampe de esperanto movado la brazilaj esperantistoj estas kontribuante notinde aparte kiam en la maljuna Eŭropo okcidenta kaj orienta ĝi iom stagnas.

Gratuloj kaj bondezirojn karaj amikoj okaze de via 23-jariĝo [de la TBV].

Altestime
Nehat Sokoli, Kukes, Albanio, Eŭropo

Paulo César <paulocesar.joaquinn@yahoo.com.br>

Saluton ,

Mi kore salutas vin. Mi skribas por peti al vi salut-vortoj pro la datreveno de la domo en kiu ĉiutage mi laboras uzante Esperanto kaj ĝi ankaŭ estas esperantujo, ĉar ni uzas Esperanton de multaj jaroj, kun ĝojo kaj kun bonaj rezultoj. Tiu domo temas pri la Templo de Bona Volo, konstruita de s-ro José de Paiva Netto, en la ĉefurbo de Brazilo. Chiokotobro ĝi atingas la 23-an jariĝon, pro tio do mi skribas por informi al vi kaj profitante la okazon, mi petas de vi sendi salutvortojn pro tio grava okazo kaj por ke ni legos vian saluton al niaj miloj da vizitantoj kiuj alvenos por kunveni kaj festi pri la paco kaj pri la solidareco, en la etoso pri harmonio kaj pri la komprenemo de la Templo. Kaj ankaŭ mi legos viajn vortojn al niaj miloj kaj miloj da auskustantoj per nia ret-radio, kiun multe propagandas Esperanton. Do, se vi sendos salutvortojn tio estos ege gravaj kaj agrablaj por ni kaj por nia agado, pro tio ke delonge ni jam uzadas Esperanton en la Templo de Bona Volo.

La celo de la Templo de Bona Volo ja estas harmonie oferi al ĉiuj vizitantoj, la bona etozo de la paco, de la kompreno kaj de la amikeco, sendepende de religia, filozofia aŭ politika vidpunkto.

Ho feliĉo mia, ĉiutage mi povas paroli en Esperanto ĉe mia laborejo, ĉar mi uzadas E-o en la granda Piramida-Templo. Tre bona kaj mirinda oportuno por mi praktiki nian lingvon. Dum tiuj 23 jaroj da ekzistado de la Templo, Miloj da geesperantistoj kaj ĝiaj gelernantoj jam venis por viziti nian domon. Kaj ni disdonas faldfoliojn en E-o kaj pri E-o al ĉiuj kiuj venas al ni. Inter esperantistoj kaj ne esperantistoj.

Do, kara, reliefige mi petas vin vortoj pri la paco kaj pri la kompreno inter ĉiuj popoloj. Via letero certe estos grava por tiu okazo kaj ankaŭ nin helpas propagandi E-o por niaj vizitantoj kaj plus tio montros la efikon de nia lingvo. Inkluzive ĉiu tage ni disdonas multe da faldfolioj en Esperanto al la popolo kiu venas al la Templo de Bona Volo.

Ho bonege, pro la 23a jariĝo de la Templo de Bona Volo en la ĉefurbo de Brazilo kaj Esperanto estas parto de la festeno. Belega afero, ĉar ni festos la datrevenon de nia domo kaj samtempe ni uzos kaj propagandos Esperanton pere de multaj mesaĝoj kiuj venos el niaj samideanoj el diversaj landoj de mondo. Mi kalkulas je vi kara.

Mi kore antaŭdankas kaj adiaŭas. Vidi bv la paĝon: www.tbv.com.br/esperanto

Ĝis kara. Fartu bone!

Samideane via,

Paulo César, el Brazilo

2012/9/27 Ro. Sartoro <rosartoro@gmail.com>

Dankon kara....bonega Bulteno...

Ni ne multon scias pri Albanio,,.kaj mi mem foje foje min demandas

Por kiu ni verkas?

Sukcesu!

Ro.Sartor

Esperantorondo.blogspot.com

mendozaesperantorondo.blogspot.com

Anoncoj

Projekto de Mazaradelvalo

Mi prezentas la lernejon, kiu proponis krei tiun ĉi projekton.

Estas la baza lernejo (Scuola Elementare) G. Quinci en Mazaradelvalo, urbo kie dum la pasinta lernojaro ni faris kursojn en tri el la kvar bazaj lernejoj, en du el la kvar mezaj, kaj en du el la kvin superaj

institutoj/liceoj. Plejofte temis pri kursoj al plenaj klasoj, tiel ke ricevis konkretajn informojn pri Esperanto preskaŭ 600 lernantoj, de la diversaj aĝoj.

En unu el la mezaj lernejoj ankaŭ estis kurso por la instruistoj, kaj ankaŭ estis kurso por la oficistoj de la urbodomo.

Nia baza lernejo Quinci pasintjare ne faris kursojn de Esperanto sed ĉijare, kun nova direktoro, jam en septembro ni komencis kurson al pluraj instruistoj (13) kaj jam de komenco de oktobro ni kursas tra ili al sep klasoj. Ses el ili estas en la infanlernejo (5-jaraj infanoj) kaj unu estas la lasta klaso de la baza lernejo (11 jaraj). Do, laŭ la planoj de la lernejo, tiuj interesitaj en nia projekto estus supozeble

la nun 5-jaraj, kiuj en la venonta lernojaro estos en la unua baza klaso. Se tio konvenas ankaŭ por vi, mi povas verki projekton konsiderante tion, sed vi rajtas fari alternativajn proponojn, kiujn mi volonte peros al la lernejo.

Niaj du instruistoj tie, Nina Pietuchowska e Przemyslaw Wierzbowski, vizitas la lernejojn (estas du konstruaĵoj en malsamaj sed proksimaj stratoj) dufoje semajne, por subteni la instruistojn kaj helpi al ili.

La projekto estus plurlanda, do ni bezonas minimume 3 landojn. Laŭ mia sperto, prefere ni prezentu iom pli da landoj ĉar ĉiam eblas ke por iu aŭ alia kaŭzoj ne ĉiuj funkcios (teĥnikaj lokaj problemoj, ne akcepto de unu el la landoj fare de la respondeculoj de Comenius ktp). Mi preferus proponi 5 landojn, kun la espero esti en la fino 4 aŭ 5. Do, se vi havas ideojn pri aliaj

samnivelaj lernejoj en aliaj landoj, bv. tion anonci.

Estas problemo kiun ni devas solvi: ne rajtas esti du lernejoj el la sama lando en la sama projekto. Do, la du polaj samideanoj aŭ samideaninoj bv. interkonsiliĝi pri tio. Krom se ili estas el la sama lernejo (mi ricevis nur la retroŝtan adreson, tio ne sufiĉas por scii) ni devos elekti unu el la du por tiu ĉi projekto kaj eventuale prepari plian projekton por la alia.

La projekton ni devos prezenti en februaro (limdato estas la 21a) do estas iom da tempo, sed ni provu ne malŝpari ĝin...

Mi atendas viajn respondojn kaj denove dankas vin.

Bruĉjo Kasini

Centro por Esperanto kaj Interkulturo

via Giotto 23, Palazzo della Legalità

I- 91026 Mazara del Vallo - TP

cei@esperanto.it

skajpo: edistudio54,tel. 0039-0923-908830

Jarfina FESTEego kun Silvestra-Novjara FESTeno okazas la 3an fojon en la franca Esperanto-kastelo Gresillon de la 28-a de decembro 2012 ĝis la 2a de januaro 2013

Detalo: www.gresillon.org/jarfino

Kontakto: +33-2.41.89.10.34, kastelo@gresillon.org

MCE Gresillon, F-49150 SAINT MARTIN D'ARCE

Kiel foto elekteblas:

<http://gresillon.org/local/cache-vignettes/L54xH60/rubon26-1047b.jpg>

<http://gresillon.org/IMG/jpg/bebo24hGresillon-2.jpg>

<http://gresillon.org/IMG/jpg/Franjo0497.jpg>

http://gresillon.org/IMG/jpg/2011-12_jarfino_Coquisart1.jpg

Alvoko de Penny Vos

Saluton edukistoj kaj subtenantoj de la edukada agado,

Ĉe la Tutmonda Edukada Konferenco, mi renkontis grupon de edukistoj nomata "Saluton Eta Mondo Skajpisto" kiu estas

grupo de edukistoj ĉirkaŭ la mondo dividantaj ideojn, helpantaj eĉ la alian kaj ligantaj klasĉambrojn por aŭtentikaj interrilatoj.

(HLW is a group of educators around the world sharing ideas, helping each other, and connecting classrooms for authentic interactions.)

Ni povas facile trovi ilin per fejsbuko per la nomo "Hello Little World Skypers". Kvankam la lingvo nun plej uzata estas la anglan, vi povus kontribui Esperante kaj respondi eĉ al la alia por montri ke Esperanto estas vera kaj uzata lingvo.

Jen la grupa vikio:

<http://hlwskypers.pbworks.com/w/page/36437388/HLWSkypers%20wiki>

Vi povas vidi kie estas la nuntempaj grupanoj kaj kiuj lingvoj ili uzas.

Mi supozas ke multaj da la instruistoj kiuj nuntempe instruas eble konsentus esti listitaj en tiu vikio kiel ebla Skajpisto se iu volas Skypi Esperante, sed mankas la tempon enmeti la informon. Se jes, la helpo de aliaj kiuj povas enmeti informon en la vikio ege utilis, eĉ se vi mem ne skajpas.

Do, mi petas, rigardu la Fejsbuka grupon kaj la vikion:

Ĉu vi vidas ke tio estas ŝanco por ni estu pli videbla en la mondo kaj por pligrandigi nian rondon per alogo de jam-mondmensaj klasoj al Esperanto?

Ĉu vi konsentas ke via klaso aliĝu?

Ĉu vi povas mem fari sinprezenton?

Ĉu vi pretas helpi tro-okupatan instruiston fari sinprezenton?

Dankon pro via atento,

Kunlaboreme,

Penny

Email:CEO@mondeto.com

Phone: +612 6493 2992

Mobile: +61 04 2917 0739

Skype: Penelope Vos

www.mondeto.com

Education for Global Citizenship

Karaj kunlaborantoj,

Ĉu vi pretas esti videbla por kontakto kun aliaj klasoj ĉirkaŭ la mondo en la "Saluton Eta Mondo" grupo?

Se jes, per Esperanto aŭ per aliaj lingvoj, mi povas enmeti viajn detalojn por vi se vi nur informu min pri (ĉiom aŭ iom da) la sekvantaj aferoj:

Via nomo

Lerneja nomo

Lando

Nomo/adreso por kontakto per viaj preferataj metodoj

Aĝo de lernantoj

Lingvoj kaj interesoj

Esperante ke vi volas partopreni, ĉar nia eta mondo povus esti iomete pli granda, ĉu ne?

Amike,

Penny

Phone: +612 6493 2992, Mobile: +61 04 2917 0739

Skype: Penelope Vos

www.mondeto.com

Education for Global Citizenship

<penivos@yahoo.com>

Informoj kaj invito al la 46-a Konferenco de ILEI en 2013

Datoj: 12-18 julio 2013, semajnon antaŭ UK kun posta vetureblo al Rejkjaviko, en Islando.

Loko: En Germanio, Esperanto-urbo Herzberg am Harz, urboparto Sieber: alloga urboparto de Herzberg am Harz (ekde 2006 oficiale: la Esperanto-urbo) en idilie bela valo de la Harz-montaro.

Loĝado kaj manĝoj: En 3-stela Esperanto-hotelo kaj restoracio Zum Pass, Haus Iris kaj en feriodomoj.

Konferencejo: Komunuma centro de la vilaĝo, kapabla akcepti 150 personojn, kun podio kaj bufedo. Krome uzeblas lernejoj klasĉambroj en tuja apudeco. Ĉio en Sieber estas facile atingebla piedirante, ankaŭ aliro al arbaraj promenoj.

Transporto: de ĉiuj grandurbaj flughavenoj (ekz. Frankfurt, Dortmund, Berlin, Hamburg, Hannover, Leipzig) per trajno ĉ. 3-4 horoj; ene de Eŭropo kaj en Germanio per oftaj rapidtrajnoj.

Konferenca temo: La loĝantaro en multaj landoj maljuniĝas. Kulturaj kaj klerigofertoj por ĉiuj generacioj aperas ekz. en la eŭropa programo 'Dumviva Lernado', el kiu ankaŭ Esperanto-projektoj ricevas subvenciojn. Kion ni lernu el tiuj projektoj? Kiun strategion ILEI ellaboru kaj sekvu, kiujn metodojn ni uzu por realigi Esperanto-instruadon de frua infanaĝo ĝis la t.n. tria generacio? Kiel ni kunlaboru kun neesperantistaj fakaj asocioj, institucioj, ktp.?

Kotizoj: Vidu la aldonitan PDF-dokumenton por la kotizotabelo (kaj bildoj). La unua paglimdato estas la 31^a de decembro, 2012. Premiaj rabatoj: 50% por la kvindeka kaj 100% por la centa aliĝintoj. Loĝado, manĝado, ekskursoj kaj aliaj servoj pagendas aparte kaj prezoj estas anoncotaj. Aliĝilo estos tre baldaŭ je via dispono.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj, (AGEI), la plej granda ILEI-sekcio, kaj Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo invitas vin!

Fringoj

elisabeth Barbay <eliz.barbay@wanadoo.fr>

Kun g'ojo, mi anoncas al vi la lanc'on de enskribig'oj al la 5-aj FRINGOJ !

Kiel kutime, g'i okazos en la fama Esperanto-Kulturdomo, kastelo Grezijon, Francio.

De la sabato 4a g'is la sabato 11a de majo 2013. Jam partoprenis en la antaŭaj renkontig'oj FRINGOJ

(Festa Renkonto Internacia de Geknaboj), lerno-grupetoj aŭ individuoj el Litovio, Hispanio, C'eh'io (2 foje), Portugalio (2-foje), Italio, Hungario, Rumanio, Pollando, Rusio, Brazilo kaj Francio, kompreneble.

Vi povos legi informojn en la c'i-kuna dokumento.

Mi tenas la grupan alig'ilon je via dispono kaj volonte respondos viajn demandojn.

Esperante ke, dum la 6 venontaj monatoj, vi kaj mi kune preparos bonegan arang'on por niaj lernantoj, amike salutas,

Elizabet Barbay

Numero 335, Tejo aktuale, 2012-11-03

La plej freŝaj informoj pri la Tutmonda Junulara Esperanto-Movado

En la numero:

La Esperanta eldono de "La rakonto pri Kjeŭ" nun mendebla ĉe la Libroservo de UEA

Iberia Renkontiĝo 2013, Madrid, Hispanio, 15a ĝis 17a de marto 2013

IJF 2013, Ostuni (Brindisi), Italio, 27a de marto ĝis 2a de aprilo 2013

Roskilde Festivalo 2013, Roskilde, Danio, 28a de junio ĝis 8a de julio 2013

Produktiĝis jam pli ol 10 mil ekzempleroj de Poŝamiko

Vinilkosmo nun havas grupon ĉe Facebook

Nova eldono de Esperanto Ilustrita aperis

La Riverego n-ro 109 aperis!

[Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo] Jen vigla kanto pri koloroj

Venontaj renkontiĝoj

Kolofono

LA ESPERANTA ELDONO DE "LA RAKONTO PRI KJEŬ" NUN MENDEBLA ĈE LA LIBROSERVO DE UEA

En la Hanoja UK estis prezentita la Esperanta eldono de "La rakonto pri Kjeŭ", unu el la plej gravaj verkoj de la vjetnama literaturo. Nun vi povas mendi ĝin ĉe la Libroservo de UEA. Legu pli: <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8870>

IBERIA RENKONTIĜO 2013, MADRID, HISPANIO, 15A ĜIS 17A DE MARTO 2013

La venonta Iberia Renkontiĝo okazos meze de la Iberia Duoninsulo, en Madrid, inter la 15a kaj la 17a de marto 2013.

Ni atendas vin ĉiujn al amuza kaj vere MJSa etoso kie renkontiĝos homoj en pluraj popoloj de nia peco da tereno inter la Atlantiko kaj la Mediteraneo: galegoj, valencianoj, katalunoj, leonanoj, portugaloj, manĉanoj, ktp ktp. uzante ĉiuj Esperanton, do ni ankaŭ bonvenigas partoprenontojn el aliaj landoj!!

Retpaĝo nun je redaktado. Pliaj informoj: IRoMadrido2013 ĉe [gmail.com](mailto:IRoMadrido2013@gmail.com) aŭ <https://www.facebook.com/events/231813830280788/>

Venu kaj ĝuu!! Hispana Esperanto - Junulara Societo (HEJS)

IJF 2013, OSTUNI (BRINDISI), ITALIO, 27A DE MARTO ĜIS 2A DE APRILO 2013

Elektitis la sidejo por la IJF 2013: ĝi okazos en Ostuni (Brindisi), kiu estas bela loko, vere tre bela. Plej baldaŭ ĉiuj informoj donitos kaj ni alkroĉos fotojn de la festivalejo. En onta ĝisdatigo ni diros kiam eblos aliĝi. Ĉio ĉi malgraŭ ke ĉiuj Majaaj antaŭvidoj kontraŭas nin. Legu pli: <https://www.facebook.com/events/149023481906924/>

ROSKILDE FESTIVALO 2013, ROSKILDE, DANIO, 28A DE JUNIO ĜIS 8A DE JULIO 2013

Partoprenu senpage en la plej granda muzikfestivalo de Eŭropo! DEJO invitas vin de vendredo la 28-a de junio ĝis lundo la 8-a de julio. Vizitu <http://roskilde.festoklubo.dk/rf13>.

La Roskilde Festivalo dum pli ol 40 jaroj okazadas en Roskilde, Danujo, kaj nuntempe havas 110 000 partoprenantojn, el kiuj 27 000 estas volontuloj. Kaj el tiuj 27 000 volontuloj, ĉirkaŭ cent (espereble) estos esperantistoj.

Vi kiel volontulo laboros kvarfoje 8 horojn, do 32 horojn dum la tuta semajno. Ni donas bazejon kun

sofoj, senpagan manĝon dum tuta semajno, tendojn kaj limigitan kvanton da matracoj kaj dormsakoj. Se vi volas privatecon, kunportu propran tendon.

PRODUKTIĜIS JAM PLI OL 10 MIL EKZEMPLEROJ DE POŜAMIKO

En oktobro 2012 eliris el la presejo al la 7a eldono de Poŝamiko. La furora libreto nun produktiĝis en 2500 ekzempleroj, kaj tiel la suma eldonkvanto de ĉiuj eldonoj superis 10 mil. La libro plurfoje staris je la unua loko de la UEA-vendolisto, kvankam UEA estas ne la nura distribuanto. Legu pli: <http://edukado.net/novajhoj?id=278>

VINILKOSMO NUN HAVAS GRUPON ĈE FACEBOOK

Aliĝu al la grupo: <http://www.facebook.com/groups/39680802191/>

NOVA ELDONO DE ESPERANTO ILUSTRITA APERIS

Esperanto Ilustrita - La Virtuala Revuo de Esperantujo

Portugallingve: <http://esperantoilustrado.blogspot.com.br/>

Esperante: <http://esperantoilustrita.blogspot.com.br/>

LA RIVEREGO N-RO 109 APERIS!

Jen la 109-a numero de La Riverego, bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia (lingvoj: Esperanto [ĉefe] kaj la franca). En tiu ĉi numero ni komencas serion de artikoloj pri nia trisemajna vojaĝo al Japanio. Eble vi trovos La Riveregon interesa kaj utila! Legu pli:<http://www.esperanto.qc.ca/en/riverego>

[AMIKOJ DE LA KOPENHAGA ESPERANTISTO-KLUBO] JEN VIGLA KANTO PRI KOLOROJ

Teksto: Maria Nazaré de Carvallio Laroca

Muziko kaj prezento: Dirce Sales kaj Maria Nazaré de Carvallio el Brazilo

Filmis: Mireille Grosjean

La tekston kaj la muziknotojn vidu en la FILMEJO de <http://www.edukado.net/>

Aŭskultu: <http://www.youtube.com/watch?v=m-VPbRdnodQ>

VENONTAJ RENKONTIĜOJ

2-a BIERo, Žatec, Ĉeĥio, 9a ĝis la 11a de novembro 2012 <http://mladez.esperanto.cz/?p=1087&lang=eo>

La 37-a Malferma Tago de la Centra Oficejo, Rotterdam, Nederlando, 27a novembro 2012, <https://www.facebook.com/events/468565676521636/> kaj <http://uea.org/dokumentoj/komuniko>

/gk.php?no=476#1

KLERIGKURSO, STUDESIO ĉe Germana Esperanto-Centro en Herzberg, Germanio, 14a ĝis 16a de decembro, <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=61311937>

Eŭropa rendezuo de Stella, Stella-Plage, Nord-Pas-de-Calais, Francio, 17a de novembro 2012, <http://esperanto.nord.online.fr/eo/stella/index.htm>

29a IF, Dortmund, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 <http://www.internacia-festivalo.de/>

Novjara Renkontiĝo / NIS, Xanten, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 <http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#alighilo>

31a Komuna Seminario 2012, "Takaonomori Wakuwaku Village" apud Monto Takao, en Urbo Hachioji en Tokio, Japanio, 28a ĝis 30a de decembro 2012, <https://sites.google.com/site/komunaseminario2012/esperanto>

4-a Junulara E-Semajno, Naumburg, Germanio, 28a de decembro 2012 ĝis 4a de januaro 2013, <http://www.facebook.com/junularaesemajno> kaj <http://www.jes.pej.pl/>

4-a NOVA - Novjara Aranĝo, Praia da Pipa, RN (Norda Riogrando), Brazilo, 3a de januaro ĝis 6a de januaro 2013, <http://novjaraaranĝo.wordpress.com/> / (atentu: g x estas ĝusta retadreso)

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: <http://www.eventoj.hu/>

KOLOFONO

TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO.

TEJO-aktuale estas senpage abonebla, aperas 2-semajnrirme kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus paperaj revuoj. Por publikigi vian anoncon retmesaĝu al tejo-aktuale@tejo.org.

Oficiala retpaĝo de TEJO-aktuale: <http://www.tejo.org/ta>

Redaktorino: Julia NOE, Germanio, tejo-aktuale@tejo.org

Eldonas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), <http://www.tejo.org/>

Limdatoj por kontribuoj: dimanĉo antaŭ la apero

Retpoŝta abono: <http://www.uea.org/retlistoj>

Klaku por malaboni la liston

Informaĵoj

EŬROPA KOMISIONO TAKSIS LA 10-JARAN SUBTENADON AL MULTLINGVISMO EN EŬROPO

Okaze de "Eŭropa Tago de Lingvoj" (la 26-a de septembro) kaj la 10-a datreveno de la rekomendoj de la Eŭropa Konsilio en Barcelono en 2002, ke ĉiu EU-civitano krom sia denaska ligvo parolu almenaŭ du fremdajn lingvojn (1+2), Eŭropa Komisiono (EK) organizis en Limasol ekde la 26-a ĝis la 28-a de septembro 2012 grandan lingvan konferencon pri la temo "Plurlingvismo en Eŭropo." La konferencon partoprenis Androulla Vassiliou, EU Komisionanino pri edukado, kulturo, multlingveco kaj junularo, kaj Mikaelo Anĝelo Martínez, Vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento (EP) por multlingvismo.

La celo de la konferenco estis taksi la 10-jaran klopodadon por antaŭenigo de multlingveco, indiki kiel per novaj kaj novigaj formoj plibonigi lingvoinstruadon, plivastigi multlingvismon, doni respekton al ĉiuj lingvoj kaj kulturoj en EU kaj inkluzivigi temojn prilingvaj kaj prikulturajn inter la plej altaj politikaj prioritatoj, kiuj devintus plibonigi lingvan kaj kulturan interkompreniĝon de EU-civitanoj, engaĝi ilin en la procezon de eŭropa integriĝo por enpraktikigi la sloganon de EU "unuigitaj en diverseco". Dum la konferenco partoprenantoj diskutis jenajn temojn: 1) multlingveco en „Eŭropo 2020“ kaj preparatan programon „Erasmus por ĉiuj“, 2) lingvaj servoj kaj industrioj en la Eŭropa Bulteno Oktobro 2012, No 120

tutmondiganta mondo, 3) rezultoj de la eŭropa enketo pri lingva kapableco kaj ĉefaj datumoj pri instruado de lingvoj en lernejoj en Eŭropo en la eduka programo „Euridice“, 4) rezultoj de la Eurobarometro 2012 "Plurlingvismo en Eŭropo", 5) graveco de lingvoj en la nuntempo. EK preparos konkludojn de la konferenco kaj rekomendojn, kiujn ĝi prezentos al membrolandoj por diskuto kaj enigo en siajn naciajn laborplanojn kun celo atingi plibonigon de instruado kaj scipovo de lingvoj.

La konferenco plene pruvis la daŭran kontraŭdiron kaj paradokson en la ĝisnuna lingvopolitiko en EU. Je unu flanko, laŭ la komenca EU leĝaro kaj la direktivo n-ro 1/1958, ĉiuj oficialaj lingvoj de membroŝtatoj estas egalrajtaj. Je la alia flanko, en praktiko, en EU estas aplikata libermerkata lingvopolitiko, kiu klasifikas lingvojn laŭ grandeco de lando, ĝia ekonomia kaj politika influo, nombro da parolantoj, laŭ kiuj la angla estas la plej vaste uzata lingvo en internacia komunikado en EU, ne nur en EU-institucioj, sed ankaŭ je aliaj niveloj de komunikado.

Kun tia evoluo EU-membroŝtatoj ne estis kontentaj jam en 2002. Politikaj gvidantoj de membroŝtatoj dum la pintkunveno de la Eŭropa Konsilio en Barcelono rekomendis al civitanoj lerni pliajn lingvojn, por esti plurlingvaj, ke ĉiu civitano regu krom sia gepatra lingvo almenaŭ du fremdajn lingvojn. Ili rifuzis, ke en EU estus domina unu nacia lingvo, t. e. la angla. Rezultoj de la lastaj 10 jaroj de klopodado antaŭenigi multlingvismon restis nur en formo de rekomendoj al membroŝtatoj sen bezonataj politikaj kaj ekonomiaj instrumentoj, ĉar tereno de edukado, lingvoj kaj kulturoj restis je nacia nivelo, en kompetento de unuopaj membroŝtatoj. La prezentitaj rezultoj de enketo inter civitanoj surbaze de memtaksado de lingvoscipovo far Eurobarometro 2012 pri multlingvismo en Eŭropo kaj ĝia komparo kun la sama en 2005, montris ke la situacio pri la scipovo malboniĝis je 1% ĝis 3% (en ĉiu demando pri scipovo de 1, 2, 3, aŭ neniu lingvo). Multlingvismo ne disvastiĝis, sed anstataŭ tio grandaj lingvoj plifortigis siajn poziciojn en EU. Partoprenantoj de la unuopaj kunsidoj ne sciis respondon al demandoj: kiel motivigi homojn lerni lingvojn, fari lernadon de lingvoj pli sukcesa, pli rapida kaj samtempe plivastigi multlingvismon, kiel ŝanĝi la negativan tendencon kiu montras daŭran plifortiĝantan pozicion de la angla aŭ 3 lingvoj (angla, franca kaj germana). Fine de la konferenco, la partoprenantoj diskutis pri la evoluo de lingvoj uzataj en internacia komunikado tielnomataj "lingua franca" en Eŭropo kaj la mondo, kiel estis la latina (neŭtrala lingvo), poste estis la franca, kaj nun estas la angla. Ili konscias, ke la angla ankoraŭ iom da tempo plenumos tiun taskon, sed oni ja scias, ke unu lingvo en EU jam ne sufiĉas. Al la demando, kiu lingvo plenumos en la tutmondiĝanta mondo tiun rolon en longdaŭra estonteco, neniu scipovis respondi. Ili konstatis, ke konsiderante rapide kreskantan ekonomian potencialon kaj influon de Ĉinio en la mondo, eble tiun rolon povos plenumi la ĉina. Ĉinio decidis apogi sian ekonomian kaj politikan influon en la modo ankaŭ pere de evoluo de lingva kaj kultura tereno. Dum la 1a monda ĉina konferenco en Pekino en 2005 ĝi aprobis strategian planon prezenti, disvastigi kaj evoluigi la ĉinan lingvon kaj kulturon en la mondo. Fine ili menciis, ke eble tiun rolo povus ludi Esperanto, kiu disvastiĝas helpe de civitanoj, tielnomata aliro de «sube» precipe pere de interreto.

Noto: Kiam Jianmin Li, reprezentanto de la Misio de Ĉinio ĉe EU v Bruselo, publike informis pri aprobo de la Strategia plano prezenti, disvastigi kaj evoluigi la ĉinan lingvon kaj kulturon en la mondo en 2005, verŝajne tre malmultaj inter la partoprenantoj sciis pri tio, ke temas pri historia paralelo, kiu okazis en 1961. En tiu jaro Usono kaj Britio subskribis dum la lingva konferenco en Kembriĝo, organizita de la Brita Konsilio, la sekretan interkonsenton pri strategia disvastigado de la angla kaj ĝia kulturo en la mondo, kiu estis la bazo por atingi la Eŭropa Bulteno Oktobro 2012, No 120

nunan superregadon de la angla kaj ĝia kulturo en la mondo! Informo en la libro "Ĉu nur angla Eŭropo?" de Prof. Robert Phillipson, 2003. Eble post 20 jaroj ni spertos efikojn de tiu strategia plano de Ĉinio.

Al la konferenco estis invititaj interalie ankaŭ reprezentantoj de ĉiuj civitanaj organizoj de la Civitana Socia Platformo por Antaŭenigo de Multlingvismo, inter kiuj estis ankaŭ d-ro Seán Ó Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio EEU). Inter invititaj estis ankaŭ Jozef Reinart de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj de Slovakio, kiu ankaŭ agas en la civitana platformo. Dum la konferenco ili kontaktis ĉiujn panelistojn kaj multajn aliajn partoprenantojn kaj en diskutoj prezentis ideojn kaj rekomendojn de EEU, kiel ekzemple pioniran projekton por plibonigo de lingvoinstruado en elementaj lernejoj en Britio

„Lingvolanĉilo“ kaj donacis al panelistoj raporton pri la projekto post ĝia 5-jara sukcesa lingvoinstruado. Jozef Reinart informis kaj disdonis DVD-on kaj aliajn informojn pri modela multlingva portalo de EU „Slovak.e“, preparita kaj kunordigata de la civitana asocio E@I, kiun financis Eŭropa Komisiono en 2009-2011, pere de kiu ekde ĝia lanĉo en la mondo jam preskaŭ 5000 studentoj en 170 landoj lernas rete tre sukcese la slovakon. Li informis interalie ankaŭ pri la fakto, ke tiu ĉi multlingva portalo estis preparita je 10-jara sukcesa sperto de multlingva reta portalo por lernado de Esperanto „Lernu.net“ en 36 lingvoj. Dank’al pluraj edukaj retaj projektoj kaj multaj bonaj ekzemploj de subteno al multlingvismo, inter kiuj estas Deutsch.info, Espa2.eu kaj aliaj projektoj de la civitana asocio E@I la Eŭropa Komisiono akceptis ĝin al la Civitana Socia Platformo por Antaŭenigo de Multlingvismo, kiel asociitan membron.

Kadre de la lasta diskutpanelo d-ro Seán Ó Riain rekomendis por plibonigo de lingvoinstruado prepari kaj efektivigi scian esploron en EU-membroŝtatoj pri temo, kiu unua fremda lingvo plej sukcese plibonigas lernadon de dua kaj pliaj fremdaj lingvoj, por pruvi ties propedeutikajn efikojn.

En diskutoj ambaŭ akcentis, ke el strategia politika vidpunkto kaj daŭrigo de eŭropa integriĝo, kohereco kaj la ekzisto de EU estas grave, ke EU listigu en siaj plej gravaj politikaj prioritatoj lingvajn kaj kulturajn temojn kaj problemojn, t. e. evoluon de kultura dimensio de la eŭropa integriĝo, kiu grave postrestas ekonomian kaj pacan dimensiojn, kaj tiamaniere transigi respondecojn de nacia al eŭropa nivelo. Ĝi estas unua grava kondiĉo ke landoj-membroj povos komenci integriĝi ankau en kultura tereno kaj serĉi kune poreŭropajn, demokratiajn, efikajn solvojn akcepteblajn por ĉiuj membroŝtatoj kaj iliaj civitanoj.

Por plibonigo de formala kaj neformala lingvolernado estas bezonate uzi akiritajn informojn de Eurobarometro 2012 "Multlingvismo en Eŭropo". En pli granda skalo uzadi la plej novigajn alirojn kaj formojn pere de la plej bonaj praktikoj en efektivigataj projektoj, kiel ekzemple civitanaj rekomendoj prezentitaj en la raporto de la Civitana socia platformo por Eŭropa Bulteno Oktobro 2012, No 120

antaŭenigo de multlingvismo prezentita al Eŭropa Komisiono en junio 2011, aŭ rekomendoj de aliaj profesiaj forumoj kaj institucioj por plibonigi rezultojn de studo de fremdaj lingvoj kaj plurlingvismon en EU, kiu kondukos al lernado, uzado kaj evoluo de ĉiuj lingvoj en EU.

Fine ni povas diri, ke reprezentantoj de EEU efektive utiligis la grandan lingvan konferencon en Limasol por prezenti novigajn ideojn de niaj civitanaj organizoj EEU kaj E@I por antaŭenigi vastan multlingvismon, lingvan kaj kulturan egalrajtecon en EU al kiu tre pozitive kaj sukcese kontribuas ankaŭ Esperanto pre de modelaj projektoj de plej bonaj spertoj por plibonigo kaj rapidigo de lingvoinstruado. Eble ne estis tia granda surprizo, ke dum la lasta plenkunsida diskutpanelo de la konferenco estis menciita Esperanto, kiel ebla alternativo de estonta „lingua franca“ en la mondo. Esperanto iom post iom estas pere de agado kaj aktiva kontribuado de EEU prezentata en laboro kaj agado de la Civitana Socia Platformo por Antaŭenigo de Multlingvismo, kiu akiris en la Eŭropa Komisiono altan respekton kaj Esperanto jam ne estas konsiderata, kiel tabuo. Ni esperas, ke nia plua agado en la Civitana Platformo, kadre de ĝia nuna dujara etapo, helpos antaŭenigi kaj efektivigi, kelkajn ideojn, kiujn ni rekomendis en la raporto de la Civitana Platformo en junio 2011. Ni esperas, ke ni sukcesos efektive evoluigi establitajn personajn kontaktojn kun politikistoj, funkciuloj de EU institucioj, reprezentantoj de naciaj ministerioj

kaj neregistaraj organizoj por lanĉi tuteŭropan diskuton pri nova demokratia, justa kaj efika lingva kaj kultura politiko en EU kaj unuiĝanta Eŭropo.

Seán Ó Riain, prezidanto de EEU

Jozef Reinvart, kunlaboranto de la estraro de EEU

(ĉerpita de Europa Bulteno oktobro 2012)

ESTRARO DE LA ILEI- stato 2012

Prezidanto: Stefan MACGILL, Pannonia u 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.

<ilei.prezidanto@gmail.com>. Tel. fiksa (+36 1) 349-5207. Kunordigo, partneroj, regularoj, kurso 125, Juna amiko.

Sekretario: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio.

<ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. fiksa (+381) 32 371053. Sekretariaj taskoj, edukprojektoj kaj konferencoj.

Estrarano pri financoj: Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. fiksa (+ 510) 653 0998. Financaj kaj kasistaj aferoj.

Vicprez.: Zsofia KORODY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso fiksaj: (+49) 5521-5983. LKK de la 46a konferenco, E-centroj, instrukapabligado, ekzamenoj.

Vicsekr.: s-ino Magdalena FEIFIČOVA (Fejfi), Bernolakova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.oficejo@gmail.com> . Membro-administrado, rilatoj kun aliaj fakaj asocioj.

Estrarano: GONG Xiaofeng (Arko), School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN 330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Azia agado, universitata agado.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo.

<nespa.1990@gmail.com>. Tel. (+1) 620 9877. Eksteraj rilatoj, universitata agado.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dozsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyiregyhaza, Hungario.

<enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365. Instrukapabligo, ekzamenoj, kalendaro, membro-varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Landa kaj lerneja agado, eksteraj rilatoj, instrumaterialoj, reta kontaktado.

IPR 12/3

S c i e n c a K o m i t a t o

Prezidanto: Humphrey Tonkin,

Usono, University of Hartford; AdE1

Vicprezidanto: Detlev Blanke,

Germanio, Prezidanto de la Societo

pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovska-Frank, Germanio,

Universitat Paderborn; AIS2

Duncan Charters, Usono, Principia

College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Universita degli

Studi di Roma „La Sapienza” ; AdE1

Probal Dasgupta, Barato, LRU, Indian

Statistical Institute, Kolkata; AdE1

Michel Duc Goninaz, Francio,

Universite de Provence; AdE1

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių

universitetas

Wim Jansen, Nederlando, Universiteit

van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE1

Ilona Koutny, Pollando/Hungario,

Uniwersytet im. Adama Mickiewicza

w Poznaniu; AdE1

Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet

Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia

Universitato de Paranao; AdE1

Aleksandr Melnikov, Rusio, А к а д е м и я

С е л ь с к о х о з я й с т в е н н о г о

М а ш и н о с т р о е н и я

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet

u Kragujevcu

Balazs Wacha, Hungario, MTA

Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

1 AdE - Akademio de Esperanto

2 AIS - Akademio Internacia de la

Sciencoj, San-Marino

Enkonduko

TRE INTERESA RETEJO PRI ĈIUJ EBLAJ SERVOJ POR

ESPERANTISTOJ

Eble vi ŝatas prezenti al viaj kursanoj eblecojn por apliki Esperanton post la kurso. Preskaŭ cent proponoj por kunfari troveblas en <http://per.esocom.de>. La enskribintoj estus dankaj, se vi informus pri per.esocom.de buŝe kaj en viaj retejoj.

Frank Merla

Nia propagando

Ĉu la plej granda Esperanto-libro?

Kiel rezulto de 20-jara sizifa laboro de d-ro Máthé Árpád, aperis en Budapeŝto "Bibliografio de Esperantaj periodaĵoj."

La datumbaza kolekto listigas 14.173 Esperanto-gazetojn, revuojn kaj aliajn periodaĵojn ekde 1887 ĝis hodiaŭ, kun iliaj nomoj, eldonjaroj, redaktoroj, ĉefaj sciindaĵoj, ktp!

Ŝajne la libro - aperinta antaŭ 2 jaroj - estas unu el la plej "grandaj" Esperantaj libroj, ĝi pezas 3,3 kilogramojn, kaj enhavas 1155 paĝojn en formato A/4!! - Por havi proksimuman imagon por kompari, rigardu la aldonitan bildon.

La libron redaktis kaj kompilis en 99 %-oj d-ro Máthé Árpád, sed pro troa modesteco li ĉie antaŭenŝovas nomojn de aliaj kunlaborantoj (L. Yzal Hernández kaj A. M. Molera).



Por prizorgi kaj solvi problemojn de kompostado, eldonado, financado kaj distribuado helpis nia Budapeŝta E-Centro "Eventoj".

La Bibliografio en papera formo aperis nur en 30 ekzempleroj, ĉefe por eniri la registradan sistemon de sciencaj verkoj, kaj por deponi ekzempleron en la plej grandaj bibliotekoj (ŝtataj kaj movadaj).

La datumbazo de la periodaĵoj aperas ankaŭ en pdf-formato, kiu ebligas rapidan serĉadon kaj trovon de unuopaj esprimoj.

Redaktoro de la bibliografio, d-ro Máthé Árpád estas kontaktebla pere de la adreso:

"oficejo@eventoj.hu"

Szilvási László

Vidu la foton ĉe: <http://www.facebook.com/photo.php?fbid=396>

"Kontraŭ kalkiĝo - cerba gimnastiko!"

Ĝus mi trastudis la suban artikolon de S-ro Zlatko Tišljar, kiu antaŭ 50 jaroj komencis instrui Esperanton.

"Mia saĝo post 50 jaroj de instruado de Esperanto" aperis en lia ipernity-blogo

<http://www.ipernity.com/blog/pajo.zlatko/419803> ...

Bonan legadon deziras

Ludoviko Molnár

PS.: La aŭtoro plurfoje mencias, ke por la maljunuloj la lingvolernado estas malfacila. Nun, kiam la nombro de pensiuloj/triaaĝuloj senĉese kreskas - precipe en eŭropaj kaj nord-amerikaj landoj - ni devus tamen turni nian atenton ankaŭ al ili. Ili ja amase decidas, ke - "Nun mi havas pli multe da libera tempo, do finfine mi alproprigos la anglan lingvon." Tutcerte ili ne havos sukcestravivaĵojn. Helpe de Esperanto ili povus interretumi, vojaĝi en najbarajn landojn, skajpi, interkonatiĝi kun eksterlandaj samaĝuloj. Ne la lasta vidpunkto estu, ke ili sukcese povus lukti per Esperanto kontraŭ maljuniĝo de la cerbaj ĉeloj...

Reago

Johan Derks <johan.derks@gmail.com>

Mi estas tia maljunulo, sed tamen hontus aliri miajn samagulojn au pliaghulojn kaj reklami Esperanto per la motivoj kiujn vi mencias.

Cetere, en Nederlando mi ne konas maljunulojn kiuj shatas lerni la anglan lingvon por vojaghi. Almenaŭ, felice, se ili pretas lerni alian lingvon, ili volas lerni la lingvon de la lando, kien ili volas vojaghi, ekzemple la hispanan au la francan.

Kaj diri, ke "Tutcerte ili ne havos sukcestravivaĵojn" estas nefundita aserto.

Restas la motivo, ke ili povus interretumi kaj skajpi.

Mankas la motivoj, ke Esperanto estas facila kaj alternativa lingvo, kiu metas la parolantojn je sama egala, idealisma fundamento.

Paĝaro tre interesa pri Esperanto

Informcele /

Por regule legi au auskulti freshdatajn informojn en au pri Esperanto, vizitu la pagharon de

<http://novajhoj.weebly.com/index.html>

Rim. - Se la teksto tro rapide movighas por vi, metu la komputil-muson sur la tekston kaj ghi haltos.
Tiamaniere vipovos agrable legi la informojn.

- Sube trovighas turnanta terglobo kiu dum 1-2 minutoj anoncas la lasta(j)n vizitanto(j)n kun flago de la lando, nomode la urbo kaj de la regiono, ekzemple por mi "Oostende, West-Vlaanderen" !!!

Spertu kaj ... diskonigu ...

Kore,

Germain Pirlot

Artikoloj-Politiko

HUSSAIN AL-AMILY <abumalik@btinternet.com>

La salafistoj

(1) La salafistoj - chu fashistoj au ne - estas

branĉo de kaj financiata (por allogi malriculojn ekz-e en Egiptujo) far wahhabistoj, kiuj si mem estas la frapa brako de la saudi reĝimo, interne kaj ekstere, kiu siavice estas la ĉefa centro de politikaj kaj "sekurecaj" planadoj de LO en la islama mondo.

(2) Do, ĉar salafistoj estas fashist-eskoj, tio logike signifas, ke ties ĉefoj estas la mastro-fashistoj, kio plu sekvas, ke ties ĉefoj la saudi reĝimoj, kaj ĉi ties patrono LO fine estas la kapo de efektiva fashismo kontraŭ la islama mondo - kio estas si mem la vero, (oni vidu kion fifaris/as LO en Irako, Afganio kaj Pakistano; kaj nun oni buĉaads la sirian popolon kviete laŭ LO-a plano, prove forigi la sirian reĝimon prepare al eble venonunta frapo kontraŭ Irano.).

(3) Pro ĉio tio, proparolante far usona Obama, LO ja "benas" la novan registaron - eĉ daŭre kun financia "helpo" fakte por la ankoraŭ reganta milita reĝimo en Egiptujo.

Husejn

Analiza novaĵletero de la Veromovado de Berkshire, Britio:
septembro/oktobro 2012 (2012-10-29)

Berkshire 9/11 Truth

<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)

<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

- Grandaj krimkaŝaj konspiroj ja okazas: Britio vekiga!
- Pacpremo Nobel por EU mistifikas, kaj kontraŭas la testamenton de Nobel
- Petskribo por malakcepti la premion Nobel – sentu vin libera subskribi
- Pedofilia ringo en altaj lokoj skuas BBC, politikistojn kaj la socion
- Kiel la Establaĵo 'amneziigis' la publikon dum pli ol jarcento
- Grandioza polica krimkaŝa konspiro ŝokegas la britojn
- Kiel la publiko estas 'amneziata' sekve de la malmasko de polica krimo
- Furoroj pri neniaĵoj kiel formo de falsflaga operacio
- Falsa profeto de 9-11
- BBC daŭrigas sian veromaskadon per programo 'Stratprezento pri 7-7-konspiro'
- La NATO-a Gladio eble estas malantaŭ la greka 'Kristallnacht' kaj la turka Ergenekon
- Kiel sociaj movadoj reduktiĝas al teo kaj vaflokukoj
- '9-11: Eksploda Pruvaĵo – Spertuloj Elparolas': nova filmo vastiĝas epidemie
- Elekto de britaj policestroj: britoj lobiu siajn kandidatojn!

La fasado de la konspiro-neantoj en Britio rapide disrompiĝas, dum skandalo post skandalo obsedas la amaskomunikilojn. La Establaĵo konstante ĵetiĝas en ĥaoson dum ĝi provas minimumigi la damaĝon kaj amneziigi la publikon. Pli-malpli frue skandalo de cunama grandeco superverŝos la okcidentan mondon: la malmaskado de 9-11.

Trans Eŭropo kreskas sento de ŝokiĝo, dum homoj konstatas, ke la nunan absurdan situacion kreis ne iu natura katastrofo sed korupteco en altaj lokoj. La plej mistifika absurdaĵo komprenebe estas la aljuĝo de Pac-Premio Nobel al la Eŭropa Unio. Mi starigis retan petskribon por civitanoj de EU, por ke ili distancigu sin de tiu premio

(http://www.avaaz.org/en/petition/For_EU_Citizens_to_dissociate_themselves_from_the_EU_Nobel_Peace_Prize).

Sentu vin libera subskribi ĝin!

Pacpremio Nobel por EU mistifikas, kaj kontraŭas la testamenton de Nobel

Al aljuĝo de la Pac-Premio Nobel al EU estas ne nur mistifika, sed ĝi estas ankaŭ malfacile komprenebla rilate al la kondiĉoj de la testamento de Alfred Nobel. La premioj Nobel devus esti aljuĝitaj al "tiuj kiuj, dum la antaŭa jaro, estos transdonintaj la plej grandan bonon al la homaro" (http://www.nobelprize.org/alfred_nobel/will/will-full.html). Tamen la Norvega Komitato Nobel asertis en sia pravigo de la aljuĝo de la premio: "La unio kaj ties antaŭuloj dum pli ol ses jardekoj kontribuis al la antaŭenigo de la paco kaj repaciĝo, demokratio kaj homaj rajtoj". Kion do faris EU en la pasinta jaro por meriti la premion? La fina testamento de Nobel asertas, ke la pacpremio oni aljuĝu al "la persono kiu estos farinta la plej multon aŭ la plej bonan laboron por frateco inter nacioj, por la nuligo aŭ malpliigo de konstantaj armeoj, kaj por la okazigo kaj antaŭenigo de pac-kongresoj". Ĉu ili malpliigis konstantajn aremojn? Nu, ne. Per la Traktato de Lisbono, kiu realiĝis en 2009, ili kreis konstantan armeon de EU, kiu antaŭvideble fariĝos potencega militforto sur la monda podio (https://en.wikipedia.org/wiki/Military_of_the_European_Union). Rigardu nurla blazonon de la militstabo de EU; ĝi enhavas ankron kaj du glavojn, kio estas unu glavo pli ol tiu de la paramilita emblemo de NATO. Komparu ankaŭ kun la emblemo de Gladio, la itala filio de la postresta paramilita organizaĵo de NATO. Kaj tamen ili ricevas pacpremiojn? Do kion diri pri packonferencoj? Jes, EU ja organizas packonferencojn. En 2010 la gastparolanto estis Prem Pal Singh Rawat, kiu pasie pledis al la plej grandaj aperantaj militaj potencoj de la mondo por paco sur tiu ĉi tero (<http://www.youtube.com/watch?v=NeCnGAugLdc>). Li denove provis ankaŭ pasintjare (https://en.wikipedia.org/wiki/Prem_Rawat). La fakto, ke necesis

al li fari tian pledon laŭte parolas por si mem. Sed ĉu EU iel ajn atentis, por ke ĝi meritu Pacpremion Nobel? Ĉiuokaze, la testamento de Nobel postulas, ke la premion ricevu persono. Ĉu EU estas persono? Ne, ĝi estas duonmiliardo da personoj. Kial mi estu aljuĝita duonmiliardon da Pacpremio Nobel sole pro mia nacieco? La testamento de Nobel asertis: "Estas mia eksplicita deziro, ke aljuĝante la premiojn oni donu nenian ajn konsideron al la nacieco de la kandidatoj, sed ke la plej meritinda ricevu la premion, ĉu aŭ ne li estas skandinavo". Evidente la Pacpremion Nobel por 2012 devus esti ricevinta ne EU sed Prem Pal Singh Rawat. Ne forgesu subskribi la petskribon

(http://www.avaaz.org/en/petition/For_EU_Citizens_to_dissociate_themselves_from_the_EU_Nobel_Prize).

Pedofilia ringo en altaj lokoj skuas BBC, politikistojn kaj la socion

En Britio estas sento de ŝokiĝo dum evidentiĝas pli kaj pli da malkaŝoj pri supozata pedofilia ringo en BBC, en kies centro estis la populara distrikto Jimmy Savile, kiu mortis pasintjare

(<http://www.telegraph.co.uk/news/uknews/crime/jimmy-savile/9620149/Jimmy-Savile-police-launch-criminal-investigation-after-victims-claim-some-abusers-are-still-alive.html>).

Jimmy Savile havis amikojn en altaj lokoj en la politiko, kaj eĉ en la reĝa familio. Laŭraporte, li konsilis al la israela prezidento pri aferoj de sekureco en 1975, kaj en 1979 ricevis medalon

(<http://aangirfan.blogspot.co.uk/2012/10/jimmy-savile-fixed-it-for-israel.html>). Do kio okazas? Ŝajnas, ke li estis tiom influhava, ke li povus daŭrigi pri siaj aktivecoj malgraŭ ke tiu afero estis vaste konata, aŭ almenaŭ suspektata, en BBC. Tiu novaĵo estas tiom granda, kaj tiom rapide evoluas, ke ne eblas kontroli ĉiujn raportojn dum ili preterflugas. Iuj el la akuzoj certe evidentiĝos malĝustaj, sed tiu skandalo estas sufiĉe granda, por ke la Prezidanto de 'BBC Trust' [Kuratori Komisiono de BBC, teorie por reprezenti la publikon kiu devige financas BBC], Chis Patten, nomis ĝin "kloakfosaĵo da akuzoj". Li diris ankaŭ, "Ne nur BBC devintus fari pli, sed ĉiuj devintus fari pli" pli frue pri la asertoj kontraŭ Jimmy Savile (<http://www.bbc.co.uk/news/uk-19899354>). Tio subfosas la aserton kontraŭ la veromovadon 9-11, ke se estus konspiro konata de tiom da homoj iu estus elparolinta.

La 22an de oktobro BBC elsendis en BBC 1 specialan eldonon de sia priesplora programo Panorama [Panoramo] pri 'Jimmy Savile – Kion sciis BBC' (<http://www.bbc.co.uk/programmes/b01nspvr>), kaj aparte pri la kialo, ke BBC decidis nuligi la originan enketon pri Jimmy Savile entreprenitan de programo de BBC 1 Newsnight. Estis bizare, ke kaj Panorama kaj Newsnight

elsendis samtempe tiuvespere, kaj la ĉefa novaĵo en la raporto de Newsnight temis ankaŭ pri la afero Jimmy Savile. Min trafis komento en la programo fare de prezentisto Paul Gambaccini, kiu diris, "Ĉar tio estis preter la skalgamo de ĉies kredosistemo, ili ne vere povis akordiĝi kun la afero". Ĝuste tiel estis rilate al 9-11".

Mi pli frue surpriziĝis aŭdi aserton de iama Ĝenerala Direktoro de BBC Greg Dyke, kiu mem devige demisiis kiam BBC malkaŝis iomete tro da vero pri la Amas-Detruaj Armiloj en Irako. Li diris, ke li surpriziĝus se estus metita desupre ia premo sur Newsnight, ĉar tiumaniere ne funkcias BBC; se tiel okazus, ĵurnalistoj farus sian eblon dismeti la novaĵon, kaj ĝi estus likita. Tion li ripetis en diskuto kun infanprotektita kampanjanto kaj televidprezentisto Esther Rantzen en la dimanĉa politika prezento de Andrew Marr, en kiu Esther Rantzen respondis, "Ĝuste tio okazis" (http://www.youtube.com/watch?v=kIS3gw5Fqhs&feature=youtube_gdata). Ĝi okazis ankaŭ en la kazo de 9-11.

Nun estas demandoj pri kiom profunde la polico priesploris. Mi rimarkis, ke dumsomere kvindek policianoj tra Britio estis arestitaj en infan-pornografiaj surpriz-arestoj (<http://www.dailymail.co.uk/news/artilce-151784/50-police-officers-arrested-child-porn-raids.html>).

Kiel la Establaĵo 'amneziigis' la publikon dum pli ol jarcento

Kaj ĉio okazis antaŭe. Estis eĉ pli granda skandalo antaŭ pli ol cent jaroj, kiam ĵurnalisto W T Stead malmaskis 'infan-prostitutecon' en altaj lokoj. Por tion fari, li pagis por infano kaj pro tio estis malliberigita (<http://www.attackingthediabol.co.uk>). La populara ideo de la Brita Imperio estis, ke la britoj alportas kristanajn valorojn al la necivilizita mondo. Kaj nun, en la gazetoj estas farataj tiaj ŝokaj malkaŝoj pri la elito en la centro de la imperio kiu sinasertis esti disvastigante tiujn kristanajn virtojn. Poste Stead estis marĝenigita, kaj la publiko estis 'amneziigita' fare de la Establaĵo. Lia memoro estu revivigita, ĉar ĝuste tion la Establaĵo nun provos fari rilate al la afero Jimmy Savile. Tion ĝi provas fari ankaŭ rilate al 9-11. Ŝajnas, ke estas komuna elemento en la psikologio de seks-mistraktantoj kaj milit-krimuloj: la bezono de potenco kaj regado.

Grandioza polica krimkaŝa konspiro ŝokegas la britojn

Nur semajnojn antaŭ ol eksplodis la afero Jimmy Savile, la nacio estis skuita de raporto de vasta krim-aktiveco fare de la Sud-Jorkŝira Polico. La

12an de septembro sendependa esplorkomisiono pri la katastrofo kiu okazis en 1989 ĉe la futbalstadiono Hillsborough publikigis siajn eltrovaĵojn. En tiu katastrofo mortis 96 subtenantoj de la futbalteamo de Liverpool, kaj miloj estis vunditaj. Tamen la futbalsubtenantoj estis kulpigitaj pro la katastrofo en monumenta maskado fare de Sud-Jorkŝira Polico. La raporto malakceptis la supozon de la mortenketo, ke ĉiuj el la 96 viktimoj jam havis nerenverseblan sanstaton kiam alvenis sur la scenejo la unua ambulanco, dirante, ke 41 havis la eblecon eventuale pretervivi. Ĝi asertis, ke Sud-Yorkŝira Polico kaj la urĝoservoj fervore klopodis flankenmeti la kulpon pri la hompremo al viktimoj. Kontraste kun sia profesia trejniĝo, policanoj estis instrukciitaj ne registri siajn spertojn en siaj poŝkajeroj, sed provizi deklarojn da 'rememoroj' prefere ol 'notoj'. El 164 deklaroj, 116 estis poste redaktitaj. Sekvis gazetara kampanjo da falsigo, kulpigante la subtenantojn de Liverpool, kies origino estis loka novaĵagentejo en Sheffield, kiu ricevis informojn de pluraj oficistoj de Sud-Jorkŝira Polico, porparolanto de Sud-Jorkŝira Polica Federacio [polica sindikato] kaj de loka parlamentano. La dokumentoj "ankaŭ demonstras kiel la Polica Federacio de Sud-Jorkŝira Polico neformale subtenata de la ĉefpolicano de Sud-Jorkŝira Polico, celis evoluigi kaj diskonigi version de la eventoj kiu fokusiĝis sur akuzoj fare de pluraj policanoj pri ebrieco, senbileteco, kaj perforto inter granda nombro da subtenantoj de Liverpool. Tio ampleksis ne nur la amaskomunikilojn, sed ankaŭ la parlamenton", asertis la raporto (<http://hillsborough.independent.gov.uk>). Tiuj eltrovaĵoj amase raportiĝis en la gazetaro, sed plej decas menciigi la novaĵraporton kiun elsendis BBC al la loĝantoj de Liverpool, kiu aperas en ilia retejo sub titolo 'Hillsborough-raporto kondamnas la policon kaj urĝoservojn' (<http://www.bbc.co.uk/news/uk-england-merseyside-19577107>).

Krima procesado estas nun konsiderata (<http://www.independent.co.uk/news/uk/crime/manslaughter-charges-could-be-brought-over-hillsborough-tragedy-8209055.html>).

Ne temas nur pri kelkaj malbonuloj. Antaŭ kvardek jaroj Robert Mark, kiu estis ĵus dungita kiel Estro de la Londona Metropola Polico por purigi ĝin de malbonuloj, difinis bonan policservon kie "iu kiu kaptas pli da krimuloj ol ĝi dungas"

(<http://www.telegraph.co.uk/news/uknews/law-and-order/9542126/Hillsborough-Could-a-cover-up-like-this-happen-now.html>).

Ĉiu policano kiu estis instrukciita ne registri ion en sia poŝkajero sciis, ke estis krima konspiro ene de Sud-Jorkŝira Polico, sed neniu elparolis. Tamen ĝis nun neniu estis maldungita, kaj estis nur unu demisio. La loĝantoj de Liverpool estis dum 23 jaroj mallaŭditaj kiel

konspirteoriistoj, kaj malbona sento estis tiom intensa, ke la gazeto Sun estis bojkotita tra la urbego. La sendependa enketo estis fine starigita post kiam tridek mil subtenantoj de Liverpool ĉantadis "Justeco por la naŭdek ses".

(<http://www.guardian.co.uk/football/2012/sep/16/liverpool-hillsborough-fans-view>).

Certe estas pli ol tridek mil misfamigitaj 'konspirteoriistoj' kiuj nun vokas por sendependa enketo pri 9-11. Ĉu nun ni povas aŭdigi nin?

Similan konsideron faris David Bowman, kiu administras la retejon 'Berkshire 9/11 Truth'. En letero en la londona gazeto Metro la 14an de septembro li asertis: "La etikedo 'konspirteorio' estu ĉesigata kiel mallaŭda termino por pravigi cenzuradon, mankon de travideblo kaj akcepton de respondeco – ne nur fare de la amaskomunikiloj, sed fare de individuoj por kaŝiĝi malantaŭ la propraj timoj kaj nesekurecoj. Ni havu la kuraĝon plenvole subteni tiujn kiuj postulas la veron kaj akcepton de respondeco pro la mortoj de amatoj, kio ajn povus esti la konsekvencoj".

Dokumenta filmo, 'Hillsborough', estas nun produktata de Mike Nicholson, kaj la unuaj du partoj spekteblas, kune kun aldona materialo, en lia retejo (<http://thehillsboroughdisasterdocumentary.com>). Pluaj malkaŝoj estis faritaj en video 'Farrell and Pidcock on Corruption in South Yorkshire Police' [Farrell kaj Pidcock pri Korupteco en Sud-Jorkŝira Polico], en kiu eksa Ĉefa Analizisto de Strategiaj Informoj, malmaskanto Tony Farrell, estas en konversacio kun David Peacock, gvidanto de la Islama Partio de Britio (<http://www.youtube.com/user/spacecowboy1954/videos>).

Kiel la publiko estas 'amneziata' sekve de la malmasko de polica krimo

Poste venis ondo da simpatio por la polico, sekve de brutala murdo de du senkulpaj policistinoj en Granda Manĉestro la 18an de oktobro (<http://www.bbc.co.uk/news/uk-england-19635239>). Tiu estis nekutima afero, en kiu ili estis forlogitaj pere de urĝserva telefonvoko. kaj estis pafitaj kiam ili alvenis. Bizare, iu enpromenis policejon por konfesi. Tiam, ekster la kutimo, post kiam Dale Cregan estis oficiale akuzita, juĝisto Andrew Gilbert faris ordonon sub la Akto pri Malestimo de la Kortumo, sekcio 4(2), kiu malpermesis raportadon de iuj ajn el la traktaĵoj pri la afero ĝis post la konkludo de la proceso "aŭ plua ordono"

(<http://www.guardian.co.uk/uk/2012/sep/24/dale-cregan-judge-media-trial>).

La Jura Blogo de la gazeto Guardian asertas, ke la kialo donita de la juĝisto, ke publikigo de materialo kaj komentario povus influi la ĵurion "streĉas la intencon de ordono laŭ sekcio 4(2)

(<http://www.guardian.co.uk/law/guardian-law-blog/2012/sep/24/reporting-restrictions-dale-cregan>).

Nenia komento.

Post tio estis absurda furoro pri neniaĵo [aŭ 'ŝtormo en tetaso', kiel oni diras angle], kiam kabineta ministro Andrew Mitchell estis forlasanta Downing Street sur sia pedal-biciklo. Ne, ne Rolls Royce, sed pedal-biciklo. La polico blokis lian eliron, rifuzante malfermi la sekurec-pordon, kaj dirante al li, ke li devas ĉirkaŭpromeni ĝis la alia flanko. Ŝajne li koleriĝis, kiel li rajtis fari, sed ĝuste kion li diris restas disputata. Ne surprize, se li neas ke li diris la vortojn atribuitajn al li li ne pardonpetos ke li diris ilin. Estis multe da parolo pri tio kion la policistoj skribis en siaj poŝkajeroj, kvazaŭ tio skribita en iliaj poŝkajeroj estis definitiva pruvo. Eĉ Gavin Esler en Newsnight (2012-09-21) diris, ke se oni havas elekton inter kredo de politikisto kaj policisto oni emas kredi la policiston. Tio, sekve de la malkaŝoj pri vasta falsigo fare de unu policervo tutsimple ne estis kredebla. La polico kaj la amaskomunikiloj ne normale tiom emfazas la policistan poŝkajeron; klare tio estis reage al la krima instrukcio fare de Sud-Jorkŝira Polico al policistoj ne registri la veron en poŝkajeroj okaze de la katastrofo Hillsborough. Mi vidis nenan klarigon de la polico kial ili rifuzis malfermi la pordegon en Downing Street. Klare, tio surhavis la spurojn de aranĝita kaptilo ekde la komenco, sed la polico daŭre intensigis la aferon, kaj oni dismetis, ke Andrew Mitchell estas klassnobo. Ja estis ke li ĉeestis privatan loĝlernejon, kaj ke iuj el liaj kabinetaj kolegoj estis sociopatoj el Eton kaj la oksforda [riĉegula kaj klassnoba] Klubo Bullingdon, sed Andrew Mitchell surhavis bicikloklipejojn kaj rajdis ordinaran pedal-biciklon survoje de sia laborejo, kiam li koleriĝis al policistoj kiuj ŝajne senkaŭze blokis lian vojon, kiel farus iu ajn normala laboristo.

Furoroj pri neniaĵoj kiel formo de falsflaga operacio

Mi ekkonstatis kiam mi entreprenis mian Esperantan esploradon, ke kiam ajn okazas furoro pri neniaĵo, estas sendube iu kiu kirlas aferojn pro propraj motivoj. Mi trovis min sub atako sekve de eksplodo de indigno kiu venis de la kasisto reage al demando kiun mi metis al ŝi; ŝia sola plendo estis, ke ŝi ne ŝatis mian tonon. Mi sukcesis tranavigacii tiun ŝtormon en la sekva kunveno, kaj ni interkonsentis pri diplomateca vortumo por la protokolo. Sed poste mi malkovris, ke la kasisto obskurigis la veran financan situacion en la kontoj, kaj tion falsigis en siaj asertoj al la komitato kaj al la membraro. Tiam ekis la vera furoro pri neniaĵo. Ĉifoje ĝi estis bazita sur la fakto, ke mi ne pardonpetis pro la incidento, kiu tiam estis okazinta jam ses monatojn pli frue. Klare, ili ne povis trovi eĉ unu okazon

en kiu mi intertempe mispaŝis. Tion konsiderante, mi havis nenian malfacilon rekoni la aferon de Andrew Mitchell kiel aranĝitan kaptilon. La polico klare kirlis la tutan aferon. Tiu afero fariĝis konfronto inter la kabineto kaj la Polica Federacio

(<http://www.telegraph.co.uk/news/politics/9607550/Andrew-Mitchell-row-ministers-accuse-Police-Federation-of-stoking-furore-over-pleb-comments.html>).

La parlamenta opozicio sekvis la fluon, sed iama maldekstrula laborpartia ministro Chris Mullin elparolis en artikolo en The Times (2012-10-16, p22).

"Ne permesu al la policaj tiranoj forigi Andrew Mitchell" tekstas la ĉeflinio, kun subtitolo "La federacio minactimigas ĉiujn kiuj klopodas reformi. Mi scias, ĉar mi estis unu el ili". Li aparte fingromontris al la Okcident-Mezlanda Polico, kiu "estas la polic servo kiu false kompromitis ses senkulpulojn pro la drinkeja bombado en Birmingham". Tiu estas ankaŭ la polic servo, li diras, en kiu estas la Okcidenta Mezlanda Krim-Teamo, "kiu estis malfondita post kiam multaj el ties membroj estis enplektitaj en serioza krimado". Li priskribis, kiel la kolero de la federacio malsupreniĝis sur lian kapon, en tempo en kiu ili telefonis la ĉiu membro de la Komitato pri Enlandaj Aferoj, kiun li prezidis. "La federacio estas tirano", li skribis, "Ĝi havas dokumentitan historion de minactimigo de ministroj, ĵurnalistoj kaj iu ajn kiu eniras ĝian vojon". Tiu estas tiom simila al mia sperto kiam mi venis sub atakon en 2006, kaj tio estus bona priskribo de la maniero en kiu la Esperanta Parlamenta Grupo, kiun mi iniciatis en 1972, estis fine estingita en 1999.

La ĝenerale supozata motivo ŝajnas esti, ke la polico luktas por pli da rimedoj. Sed la komenca efiko estis vasta ondo da simpatio kaj subteno por la polico sekve de la publika sento de ŝokiĝo post la malkaŝoj pri Hillsborough. La ideo, ke tio povus esti la ĉefa motivo fariĝas kredebla kiam oni rigardas aliajn aferojn kiujn ili faris. Kaj kompreneble multaj homoj nun suspektas, ke la Kvaropo 7-7 estis ankaŭ false kompromititaj fare de diversaj policoservoj.

Por mi, rekono de tiaj furoroj pri neniaĵo estas la ŝlosilo al sukceso en la veromovado. Ĉe la internacia nivelo multaj verokampanjantoj povas rapide ekkonstati pri eventualaj furoroj pri neniaĵo. La malsuprenigo de siria pasaĝera aviadilo fare de Turkio estis tia kazo (http://www.youtube.com/watch?v=mbhGO_RK56Q). Ĝi estis provoka, kaj estis nenia publikigita pruaĵo, ke la aviadilo rompita ajnan leĝon. Tiu estas tipa ekzemplo kiel ekas militoj; ili normale estas provokitaj de iu partio kiu havas ion por gajni. Turkio estas membro de NATO, kaj NATO-landoj provizas milit-helpon al la kontraŭ-registaraj fortoj en Sirio, kaj ŝajnas serĉi pretekston por militadi (<http://www.youtube.com/watch?v=A4esu8MrRcQ>).

Mi opinias, ke la plimulto de turkoj ne pensus, ke estas en la intereso de Turkio krei disputon kun Sirio, sed mi dubas, ĉu la turka elito estas reprezenta de la popolo tiurilate.

Ĉio jam okazis antaŭe, multfoje, kaj plej rimarinde en la Brit-Afrikansa Milito, kiun provokis amikoj de Cecil Rhodes, por provizi pretekston por la britaj imperiaj fortoj transpreni Sudan Afrikon, kie Rhodes estis la plej potenca koloniisto. Rhodes formis sekretan societeton, sub pretendo alporti pacon kaj civilizon al la Brita Imperio per uzo de sia grandega riĉaĵo. Aliaj fondomembroj en 1891 estis fidato de Reĝino Victoria, kaj la famega ĵurnalisto kaj homrajta kampanjanto W T Stead. Kiam Stead konstatis kion faradis Rhodes, li kontraŭstaris. Stead estis elĵetita de la sekreta societo, kaj post tio li kampanjis kontraŭ la Brit-Afrikansan Militon. Pri tio mi raportis en mia novaĵletero por novembro-decembro 2011 (http://berkshire911truth.blogspot.co.uk/2011-12-01_archive.html). La publiko fine estis 'amneziigita' fare de la Establaĵo, kaj nun la nomo de Stead estas apenaŭ konata (<http://www.encyclopedia-titanica.org/wt-stead-movie-1912.html>). Necesas kontraŭagi tiun amneziadon. Pro tio mia devizo ne estas simple 'disvastigu la diron', sed 'daŭrigu la paroladon!'; alivorte, ne nur disvastigu la diron, sed konstante memorigu homojn pri la simplaj faktoj, ĉar alie la Establaĵo certigos, ke ili forgesos.

La veromovado havas multon por lerni pri rekono de furoroj pri neniaĵo. La disrompo de la nacia Kunordiga Komitato por 9-11 estis klare tia kazo, tamen la homoj ne tiel rekonis ĝin. Estis krioj de 'antisemitismo' kontraŭ Tony Gosling, kiu faras bonegan laboron en la administrado de la forumo de 911-vero (<http://www.911forum.org>).

Ŝajnis ke en iuj rondoj esti nenia volo atingi ajnan repaciĝon, sed nur por plukvereligi. Poste estis plua furoro pri neniaĵo, pri laŭdira 'holokaŭsto-neado'. Kiam ili vastigis tion al mi, sugestante, ke tiu estis la fonto de miaj problemoj en la Esperanto-movado, kvankam mi neniam estis enplektita en la holokaŭsto-polemiko, kaj mia amiko kun kiu mi laborados pri la Esperanto-afero hazarde estis judo, estis sufiĉe evidente kio okazas. Kiam ni fondis '9/11 Keep Talking' mi plene atendis, ke de tempo al tempo ni devos estontece pritrakti furorojn pri neniaĵo. Laŭe, ni starigis privatan retpoŝtan grupon, kun neniuj anonimaj membroj. Mi plene pretis pritrakti kun ajna disrompemulo kiu provas instigi furorojn pri neniaĵo. Antaŭ nelonge, mi estis nelaborpova dum semajno, kaj kiam mi revenis por rigardi la korespondaĵojn ĝuste tion mi trovis. Ne estis pro tio ke mi malkonsentis kun tio kion diris du el ili, kvankam tiel ja estis. Nek estis

pro tio ke ili transformis la tutan aferon al senrilata religia furiozaĵo, kion ili ja faris. Nek estis pro tio, ke mi opiniis ilin enfiltrintoj de la Establaĵo kun misio neŭtraliĝi niajn aktivecojn, kvankam mi ja havas miajn dubojn pri tio. Estis pro tio, ke ili estis malrespektemaj al aliaj, estis aŭtokrataj, kaj estis insultemaj, kaj ili kreadis eliton kiu estis imuna al kritiko dum ili lanĉis personajn atakojn al aliaj. Ili ankaŭ incitis aliajn agi kontraŭleĝe kaj tiel esti arestitaj. Mi metis ilin sub moderigon kaj ili indigne forlasis. Tiuj estas sufiĉe tipaj signoj – kune kun provado ŝanĝi la celojn de la grupo anstataŭ mem starigi novan grupon kun malsamaj celoj – kaj necesas tion pritrakti trankvile kaj ĥirurgice.

La reago de la plimulto de la homoj estas deziri forbalai tiajn aferojn sub la tapiŝon, sed mi opinias, ke tio estas malĝusta. Mi miris kiam en 1973 mi priesploris furoron pri neniaĵo en 1973 kaj eltrovis, ke okazis io simila en 1955, nur sep jarojn antaŭ ol mi eniris la Esperanto-movadon, tamen neniu jam parolis pri tio. Ĉiuj diras, ke tiuj aferoj estu en la pasinteco, kaj ke ili antaŭeniru. Sed ili ne antaŭeniras; ili tutsimple enfalas la saman kaptilon en kiun ili antaŭe falis. Furoroj pri neniaĵo devas esti dokumentitaj kaj faritaj alireblaj, tiel ke ni lernu el la sperto. La Establaĵo persiste provos amneziigi nin; ofte ili eksplicite diros: "Tio estas historio".

Falsa profeto de 9-11

Necesas ankaŭ memori ekzemplojn de pruvita enfiltrado. La rakonton de Tania Head, kiu false prezentis sin kiel pretervivinton de 9-11 montris brita televidkanalo Channel 5 la 16an de aŭgusto (<http://www.channel5.com/shows/911-the-woman-who-wasnt-there-2>). Ŝi fariĝis la ĉefa porparolanto de la pretervivintoj de la ĝemelaj turoj, kaj estis malmaskita nur kiam ŝi aŭdace persvadis al filmdirektoro fari dokumentan filmon pri ŝi. Kio estis tre intense transdonita de la filmo estis la senco de ŝokiĝo kaj perfidiĝo kiujn sentis ŝiaj eksaj amikoj. Tamen la sola ebla klarigo sugestata pri ŝia konduto estis, ke ŝi havis iaspecan psikologian sanstaton. Kiam oni havas superŝutan pruvaĵon pri grandioza ŝtata falsigo pri 9-11, ŝajnas sufiĉe evidente, ke la ŝtato enfiltrus tiajn grupojn por teni ajnan demandadon pri tio kio vere okazis ene de difinitaj limoj. Ĉu aŭ ne Tania Head estis pagata agente, tiu rakonto aspektas al mi kiel klasika kazo de enfiltrado kaj ekposedo de grupo, kiu eventuale povus prezenti minacon al la Establaĵo. Necesas, ke iu ajn kiu estas parto de ajna kampanjanta grupo estu konscia pri tiaj aferoj, kaj necesas vidi la emociajn reagojn de perfiditaj membroj en tiaspeca kazo. Imagu, se Tania Head estus malmaskita ne de filmdirektoro sed de ordinara membro; ili estus

povintaj pafi la mesaĝiston. Tiu rakonto estas tenata viva de libro kaj video, 'The Woman Who Wasn't There' [La virino kiu ne ĉeestis] (<http://thewomanwhowasntthere.com>).

BBC daŭrigas sian veromaskadon per programo 'Stratprezento pri 7-7-konspiro'

La Establaĵo provas nin amneziigi ankaŭ pri nekongruaĵoj rilate al 7-7, la teroristaj atakoj en Londono de la 7a de julio 2005. La 8an de oktobro BBC 3 elsendis pluan el siaj malhonestaj programoj, tordante la faktojn kaj prezentante kiel malraciaj tiujn kiuj pridemandas la politikistan version de eventoj, per sia '7/7 Conspiracy Road Show' [Strat-Prezento 'Konspiro 7-7'] (<http://www.bbc.co.uk/programmes/b01n6zt7>). Ĝin prezentis komediulo, kies tasko estis konvinki kvar 'konspir-teoriistojn', ke eble ili malpravas. Multaj el ni estis petitaj, sed malakceptis pro antaŭaj spertoj de BBC-maskadoj. Post la prezento unu partopreninto, Jon Scobie, estis intervjuita de Paul Watson, londona korespondanto de Infowars, kaj li malkaŝis, kio okazis malantaŭ la kulisoj. Estas ampleksa priskribo de Keelan Balderson, kun videoj, en la retejo Wide Shut (<http://wideshut.co.uk/77-bombings-conspiracy-road-trip-i-was-lied-to>). Nun ke la publiko komencas akcepti, ke BBC kapablas entrepreni amasskalajn maskadojn en la kazo de pedofilio, devus esti eble transigi la mesaĝon, ke ili povas maski militkrimojn kaj Gladio-stilajn teror-krimojn.

Unu afero kiun mi trovis enigma tamen estis la demando kiun vagonaron la supozataj teroristoj prenis de Luton al Kings Cross, supozante, ke ili faris. La televid-programo ŝajnis montri, ke eblas ke ili prenis pli fruan vagonaron ol tiun origine asertitan de la registaro, kiu estis nuligita. Ĉiaspecaj aferoj eblas, sed ni bezonas pruvajn. Mi sufiĉe certas, ke se ili estus farintaj, kaj ĉio estus laŭ la nunaj asertoj, tiu informo estus sufiĉe rapide dismontrita. Do kio ajn estos la fina konkludo, la vagonaraj horoj ja estas signifaj, eĉ se nur por demonstri registaran falsigon. Mi ankoraŭ trovas la klarigon de '7/7 Ripple Effect' la plej persvadan provon pri rekonstruo, eĉ se ĝi prezentas supozon kiel fakton. Tamen mi opinias, ke necesas konsideri ĉiujn eblecojn. Kiam ni rigardas rekonstruojn, ni devus nin demandi, ne nur ĉu la rekonstruo estas vera, sed ankaŭ ĉu ĝi estas aŭtenta.

Mi opinias, ke estas kreskanta konstato de tio kio okazas, kaj en la veromovado kaj inter la publiko. Nepre la afero iras malrapide, iom kiel movi oceanan ŝipon. Kiam mi unue provis pritrakti kanal-boaton en Norfolk Broads mi rapide konstatis, ke puŝegi la boaton apenaŭ faris diferencon; la

maniero movi la boaton estis milde apogi min kontraŭ ĝin kaj daŭre fari. Nun ni havas tiun momentumon.

La NATO-a Gladio eble estas malantaŭ la greka 'Kristallnacht' kaj la turka Ergenekon

La novaĵoj en la amaskomunikiloj ŝajne fariĝas pli kaj pli absurdaj ĉiutage, dum Eŭropo moviĝas en la direkton de Faŝismo. Newsnight la 17an de oktobro raportis pri la leviĝo de la ekstrem-dekstra partio Ora Tagiĝo en Grekio, kiu perforte celas negrekojn (<http://www.bbc.co.uk/news/world-19976841>). "Tiu estis la greka Kristallnacht", diris la direktoro de teatraĵo Corpus Christi post kiam lia teatro estis sturmita de brutaluloj de Ora Tagiĝo. La greka ĉefministro antaŭ nelonge komparis sian landon kun Weimar-Germanio. La programo raportis pri koluzio ene de la greka policservo, "Kaj la police apudstaras", diris la raportisto de Newsnight, Paul Mason. Tio ja sonas kiel Kristallnacht, kiam la polico estis instrukciita ne interveni kun la tumultoj krom se la gvidlinioj estis rompita. Kaj mi ĵus trovis blagejon nomatan 'Keep Talking Greece' [Daŭre paroladu Grekio], kie estas blogo por la 21a de oktobro pri la uzo fare de la partio de la nazia braksaluto (<http://keptalkinggreece.com>).

La gazeto Daily Mail la matenon post tiu Newsnight-elsendo, sur paĝoj 30-31, portis dupaĝan elsternaĵon titolitan 'Faŝista partio en greka ĉasado. Nigraĉemizuloj frakasas la hejmojn de enmigrintoj. Svastikoj surstrate. Ne, ne Germanio en la Tridekoj: Grekio 2012' (<http://www.dailymail.co.uk/news-article-2219374>).

Kiu kirlas tiun amason da aferoj malantaŭ la kulisoj? Mi demandis al Richard Cottrell, aŭtoro de 'Gladio: NATO's Dagger at the Heart of Europe' [Gladio: Ponardo de NATO ĉe la Koro de Eŭropo] (<http://progressivepress.com/book-listing/gladio-natos-dagger-heart-europe>) ĉu li havas ajnan ideon. Li respondis: "La loka aranĝo de Gladio, kiu estas intime ligita al la brutaluloj de Ora Tagiĝo. La lando estas starigata por milita puĉo, disrompo de publika ordo kiel pretekston por interveno. Ora Tagiĝo estas ia Alkaido de CIA/NATO/MI6". En posta retletero al mi li komparis Oran Tagiĝon kun la rakonto de la greka terorista grupo 'Novembro 17' kaj tri jardekoj da urbaj geriloj, kiel li priskribas en sia libro. "Ni vidas klasikajn taktikojn de strategio de tensio, elpensitan por demonstri al la mondo, ke la sobraj gardantoj de Grekio (nome la tute koruptaj politikaj klasoj) flirtas la standardon de publika ordo fronte de brutaluloj, tumultantoj kaj 'anarkiistoj'. Ĝuste kiel Londono, ĉu ne?"

Li estis ĵus sendinta al mi artikolon pri atakoj al neislamanoj en Turkio, en kiu suspektito jure prijuĝata diris al la kortumo, ke la Nacia Fako de Strategioj kaj Operacioj de Turkio (TUSHAD), kaŝa organizaĵo ene de la turkaj armitaj servoj, estis malantaŭ la atakoj, kaj ke tiu estas la armita flanko de la kontraŭleĝa organizaĵo Ergenekon. Tiu aperis el la turka anglalingva gazeto Today's Zaman (<http://www.todayzaman.com/news-295717-zirve-massacre-suspect-ergenekons-armed-wing-still-active.html>).

Richard Cottrell komentis: "Mia tezo, ke Gladio ankoraŭ ekzistas kaj vivas estas tiel konfirmita".

Li diris al mi ankaŭ, ke la NATO-uloj malebligis al la librovendejo Stirling en Bruselo revendi lian Gladio-libron surloke, sekve de tre klara kaj tuja reago por antaŭenigi la libron. "Subite la retleteroj kaj telefonvokoj de mi mem kaj de la eldonisto restis neresponditaj", li diris al mi. La saman traktadon li ricevis de aliaj librovendejoj kiujn ili aliris en Nederlando, Italio kaj Germanio. "Ni sendis homojn al la vendejo en Bruselo kaj ili estis traktitaj kun vera malvarma kaj bruska flankenigo", li skribis. Mi ja jam rimarkis mankon de veraj priesploraj libroj pri la 'Milito kontraŭ Teroron' en miaj lokaj librovendejoj.

Kiel sociaj movadoj reduktiĝas al teo kaj vaflokukoj

Do kio estas la problemoj kaj malfaciloj de la veromovado 9-11, kaj ĉu estis provoj nin silentigi? Tiun demandon oni metis al profesoro Jim Fetzer en intervjuo kiu aperis en Iran Review [Irana Revuo] la 13an de septembro pri la konferenco Vancouver Hearings [Juĝsesioj de Vankuvero], kiun li organizis pli frue ĉijare. Li respondis, ke la plej seriozaj problemoj leviĝis pro konfliktoj interne de la movado, kiuj venis de diversaj frakcioj kiuj alprenis negativajn aŭ eĉ malamikajn sintenojn al aliaj, menciante iujn en Londono kaj Usono (<http://www.iranreview.org/content/Documents/James-H-Fetzer-Mossad-Played-a-Crucial-Role-in-9-11-Attacks.htm>).

Pli detala artikolo aperis jam la antaŭan tagon en la retejo Veterans Today [Veteranoj Hodiaŭ], titolita '9/11 Truth will out: Vancouver Hearings II' [Vero de 9-11 malkaŝiĝos: Vancouver Hearings II] (<http://www.veteranstoday.com/2012-09-12/911-truth-will-out-the-vancouver-hearings-II>).

Li detaligas kelkajn el la korespondaĵoj kun Ian Henshall de 'Reinvestigate 9/11' kaj konkludas, ke "li ne estas serioza pri 911-vero sed preferas administri socian klubon kie 9-11 povas esti diskutata dum teo kaj vaflokukoj!". La saman konkludon mi atingis mallonge post kiam ĝi estis

starigita, rekoninte la simptomojn el la Esperanto-movado en Britio. Fariĝis klare, ke tiu estis intenca strategio, kiun ili transformis al 'filozofio' kiun ili nomis 'Raŭmismo'. La prezidanto estis ankaŭ prezidanto de la Simplified Spelling Society [Societo por Simpligita Literumo], kaj li faris tie ĝuste la samon. Ŝajne tiu estas ofta tekniko por neŭtraligi iun ajn movadon, kaj do mi ampleksigis la terminon 'raŭmismo' al la neŭtraligo de iu ajn movado per tiu tekniko. Jim Fetzer komentis: Mi trovas malfacilon kredi, ke iu ajn prenas serioze 'Reinvestigate 9/11'. Nu, oni devas rigardi al Konformiĝa Teorio [Conformity Theory] por tion ekkompreni, kiel mi faris kiam membroj de la Esperanto-asocio kredis, ke la kapitalo malkreskadis kiam la ciferoj montris, ke ĝi kreskadis. Necesas nur, ke la raŭmistoj formu aŭtoritatan eliton, daŭre ridetu, kaj tiam trovas iun pretekston demonigi iun ajn kiu metas danĝerajn demandojn. Pli-malpli ĉiu solidare subtenas pro tria lojaleco. Tiel ili konservas fasadon de demokratio.

Ne estas facile pritrakti la raŭmistojn; iu ajn libera diskutado estis flankenigita aŭ sabotita, kaj en mia kazo evidentiĝis neeble kunigi ajnan agadgrupon de pli ol du homoj sen fine konstati, ke ĝi estas subfosado de interne. Iu ajn poto da oro riskas esti blokita. Kiam homoj ekkonstatos kio okazas la falsa elito ne plu povos konservi sian fasadon de demokratio, kaj do ili sin turnas al kruda cenzurado. Do ne malfacilas vidi kian la irana televidstacio Press TV estis malpermesita en EU kaj anstataŭigita de por-NATO-a irana televidstacio, kiel klarigas Tony Gosling en Russia Today [Rusio Hodiaŭ] ('Anti-Tehran TV launches as Iran state media gets EU boot', 25 October: <http://www.youtube.com/watch?v=VCISdmOjGhI>). Nek malfacilas vidi kial Irano dezirus lanĉu propran sateliton (<http://news.bbc.co.uk/1/hi/7866357.stm>).

9-11: Eksploda Pruvaĵo – Spertuloj Elparolas': nova filmo vastiĝas epidemie

Tamen en Usono la Arĥitektoj kaj Inĝenieroj por 911-Vero signife trarompis. En Aŭgusto ilia nova filmo '9/11: Explosive Evidence – Experts Speak Out' [9-11: Eksploda Pruvaĵo – Spertuloj Elparolas] televide premieris en la kanalo Colorado Public Television (CPT12). Poste, la 11an de septembro la filmo fariĝis "la plej multe spektita kaj plej multe interŝanĝita en la retejo PBS Online, kaj tenis la plej altan lokon dum pli ol semajno. La retejo por la elsendo ricevis pli da trafoj ol iu ajn program-paĝo en sia historio (<http://digitaljournal.com/article332972>). La filmon oni povas spekti rete en ilia retejo (<http://video/cpt12.org/video/2270078138>). PBS atingas preskaŭ 123 milionon

da homoj pere de televido, kaj pli ol 21 milionojn da homoj rete ĉiumonate (<http://www.pbs.org/about/corporate-information>).

Do kiam BBC elsendos tian materialon? Kabineta ministro Vince Cable interese atentigis en la programo Question Time [Demando-Tempo] en kanalo BBC 1: "[BBC] estas damaĝita, sed ne ĝismorte, sed mi dirus defende al ĝi: 'Kiu alia amaskomunikilo en la mondo elsendus programon en kiu ĝi atakas sin mem, kion ĝi faris en la programo Panoramo ...'" (http://www.bbc.co.uk/player/episode/b01nmd1z/sign/Question_Time_25_10_2012). Li havas bonan argumenton. Tiel BBC estis starigita. Tio ne signifas, ke ne estas misuzo de la potenco fare de la hierarkio. Nek ĝi signifas, ke ne estas nedeca influo de eksteraj organizaĵoj, kiel la sekurec-servoj kaj financaj korporacioj. La subita apero de Jeremy Paxman senkravate en Newsnight sugestas, ke li staras firme kontraŭ tia hierarkio, kvankam neniu informita persono povus dubi, ke la BBC-teamo 'Conspiracy Files' [Konspir-Dosieroj] prezentas verotordojn kaj mensogojn por subteni la version de eventojn de la Establaĵo. La malpermeso al Press TV subfosas ajnan pretendon de politika neŭtraleco fare de la Establaĵo. Sed la strukturo de BBC, eĉ se ĝi estas koruptita, donas al mi esperon ke ni faros trarompon similan al tiu en PBS.

Elekto de britaj poliestroj: britoj lobiu siajn kandidatojn!

Mi scivolas kion pensas Vince Cable pri 9-11 kaj 7-7. Lia kolego la vicĉefministro Nick Clegg skribis al Neal Austin: "Vi komprenos, ke la sugesto ke la registaro tiutempa permesis – aŭ instigis – tian hororan agon de terorismo en tiom cinika maniero pro politika oportuneco estas malfacile akceptebla. Vi klare kredas, ke la esploroj kondukus racian personon al tiu konkludo – kaj mi bedaŭras diri, ke mi devas trompi viajn esperojn, ĉar mi mem ne alvenas al tiu konkludo". Bone, sed ĉu li akceptas la esplorojn, kaj kion li volas diri per 'registaro'? Tiu korespondaĵo estiĝis pro kampanjo lanĉita de Richard Hall en sia retejo 'Rich Planet', petante al homoj skribi al siaj parlamentanoj (<http://www.richplanet.net/tellyourmp.php>). Dum mi opinias, ke tiu estas bonega iniciato, ŝajnas ke ni estas je risko pretervidi la estontajn elektojn de la 15a de novembro por 'Police and Crime Commissioners' ['Polic- kaj Krim-Komisiitoj' – 'Police Commissioner' estas la ĉefpolicano; tiu ĉi ŝajnas esti bela titolo por aspekti simila, sed la rolo estas por reprezenti la publikon] tra Anglio kaj Kimrio (<http://www.homeoffice.gov.uk/police/police-crime-commissioners>). Tio donas al ni la eblecon demandi al kandidatoj, kion ili faros por malpliigi krimon ene de la polica servo.

Futbal-subtenantoj de Liverpool havas devizon "You'll never walk alone" [Vi neniam promenos sola], kaj ilia himno tekstas "Walk on with hope in your hearts" [Promenu plu kun espero en viaj koroj]. Nun ili povas esti certaj ke ili neniam 'parolos solaj' [talk alone]. Ni ĉiuj 'parolu plu' [talk on] kun espero en niaj koroj'. Daŭrigu la paroladon.

Salutas Ian
ian@fantom.org.uk

Berkshire 9/11 Truth

<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)
<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵletoj: Ian Fantom)

Morto ne estas fino

Artikolo aperinta en centoj da gazetoj, revuoj kaj ttejoj en Brazilo kaj en la mondo.

Indiku tiun-A



José de Paiva Netto*, ĵurnalisto, radkronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.

Dio ne estas morto. Li estas Vivo. Kaj Vivo Eterna. Jesuo mem revelaciis al Siaj disĉiploj, ke la Ĉiela Patro universale regas senmortajn Estulojn.

Morto ne estas la fino de homa ekzistado. Kiel diris la karmemora fondinto de LBV, Alziro Zarur (1914-1979), "ĝi ekzistas en neniu punkto de la Universo".

Efektive, ĉar eĉ kadavro ne estas mortinto. Kiam ĝi malfariĝas, ĝi eligas miliardojn da etaj formoj, kiuj generos aliajn ekzistomanierojn.

Ĉu vi ne kredas? Vi plene rajtas. Sed, se estas vere?! Donacu al vi mem, mia amikino, mia amiko, la rajton dubi, kio estas la fundamento de la scienca sistemo, kiu senĉese pridemandas kaj plu konstruadas novajn vojojn por la Homaro.

Pensu, ke tio, kion ni ĉi tie asertas estas vera, tiam Vi troviĝos, post ŝajne liberiga ago, terure katenita. Vi troviĝos en situacio por kiu vi tute ne prepariĝis. Al kiu vi petos helpon, se dekomence vi forigis de apud vi ĉiujn karulojn kaj ĝojojn, kiujn vi obstinis ne vidi?! Tiumomente Vi post longa tempo ŝatus vidi ilin. Kaj nur helpe de multe da preĝoj, kiujn vi eble neniam aŭ tre malofte faris sur la Tero, vi perceptos, je sinteno de humileco, lumon al vi senditan, en mallumo. Nur tiel vi povos rekomenci, post multe da doloro, sub postuloj de via propra Spirito, iradon tiam pli krudan.

Kiel oni diras ĉi tie, ĉe la Religio de Dio, "memmortigo solvas nenies angorojn"; sekve, ankaŭ ne viajn.

Mia Frato, mia Fratino, Vivo ĉiam plu daŭras, kaj batali por ĝi valoras la penon. Eĉ se plej malluma estas la nokto, tamen naskiĝos la Suno, alportante lumon al la koroj.

Eĉ pli: se ni atente rigardos nian ĉiutagan vivon, tiam ni vidos, ke ekzistas homoj kaj eĉ bestoj en situacio pli dolora, kiuj bezonas, ke oni proponu al ili amikan manon. Ni ne maltrafu la okazon helpi. Al tiu, kiu helpas, neniam mankos benata apogo, kiu resanigos liajn vundojn.

Vivi estas pli bone.

En neniu punkto de la Universo ekzistas morto

Mi serĉis en la unua volumo de la kolekto, kies aŭtoro mi estas, nome Spiritaj Gvidlinioj de la Religio de Dio, la jenan pecon, kiu estas oportuna:

La duan de novembro, en Brazilo, oni nomas tago de la mortintoj. Foje, ĵurnalisto demandis, ĉu mi kutimas preĝi por ili. Mi respondis: Kompreneble. Oni sentas sopirojn pri tiuj homoj, kiuj venis antaŭ ni survoje al la granda Spiritita Patrujo, la Mondo de Vero. Ni rememoru niajn familianojn kaj amikojn tre ameme. Oni komprenas resopirojn; sed ne konvenas nutri malĝojon, ĉar tio perturbas la Spiriton de la amata persono. Ili estas pli vivaj ol iam ajn. Nenio mortas. Sufiĉas vidi, ke ankaŭ la kadavro, kiu vestis Spiriton, transformiĝas en Vivaĵon. Morto estas onidiro. La karmemora ĵurnalisto, radipreleganto, poeto kaj verkisto Alziro Zarur instruadis, ke "en neniu punkto de la Universo ekzistas morto". Dio ne estas morto. Li estas Vivo. Kaj Vivo Eterna. Jesuo mem revelaciis al Siaj disĉiploj, ke la Ĉiela Patro universale

regas Senmortajn Estulojn. Kaj li konkludis: "Ĉar vi ne kredas tion, tial vi vivas erare". Homoj, kiujn ni amas, tiuj neniam mortas, eĉ se ili troviĝas en la Spirita Mondo. Multaj el ili troviĝas apud ni, helpante nin; aliaj eble bezonas niajn preĝojn. Ni preĝu por ili, por ke kiam alvenos nia vico iu preĝu por ni, kaj ni dankos Dion, ke Li estas Dio de vivantoj. Mortintoj ne mortas.

Blaise Pascal (1623-1662) jam difinis: "Senmorteco de la Animo havas por la homo tiom da graveco, ĝi interesas lin tiel profunde, ke necesas perdi la tutan sentemecon por esti indiferenta al tiu scio".

*José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵaneiro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵaneiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Noto:

Fotogalerio pri la 23-a jarigo de la Templo de Bona Volo

Nome de la direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), José de Paiva Netto, kaj de ĉiuj Legianoj de Bona Volo, mi tutkore dankas pro viaj tre afablaj salutvortoj pri la 23-jarigo de la Templo de Bona Volo (TBV).

Pro tio, ghoje kaj plezure ni invitas Vin rigardi fotogalerion pri la memorfesto omaghe al la fondadatreveno de TBV, kiu okazis je la jhus pasinta 20-a de Oktobro, per la suba ligilo:

http://www.boavontade.com/fotos/index2.php?option=com_galeriasmc&view=exibirgaleria&id=161&idioma=6

Ankau' ni shatus inviti Vin legi la jhus aperintan artikolon, kiun auhtoras la verkisto kaj ĵurnalisto Paiva Netto, titolitan Morto ne estas fino. Se eblas al Vi bonvole sendu al ni komenton kaj diskonigu ghin al viaj Esperanto-amikoj. Jen la ligilo:

<http://www.paivanetto.com/index.php/esp/artigo?cm=95907&cs=100>

Kun ankoraufhoja danko, al via koro ni dedichas la suban eldirajhon de la edukanto Paiva Netto: "Amo estigas simpatian. Kaj ĉi tiu estas allogaĵo, kiu neniam pereas, ĝi estas eterna graco de la Spirito. Eĉ morto ne disigas tiujn, kiuj sin reciproke amas. Escepte se okazas memmortigo".

Atende, fratamike,

el la centra sidejo de Legio de Bona Volo en la urbo San-Pauhlo,
Maria Aparecida da Silva

Responsulino de la Departemento pri Esperanto de LBV

www.bonavolo.com

www.tbv.com.br/esperanto

Instruado

Reta leciono internacia

La 27-an kaj 28-an de oktobro 2012 s-ino Maria Majerczak el Jagelona Universitato, Pollando, organizis retan internacian lecionon de Esperanto. Tion anticipis anonco individua al pluraj adresoj, inkluzive nin albanojn. Tiel, kreiĝis du grupoj de ĉ.8 kursanoj el pluraj landoj el preskaŭ ĉiuj kontinentoj.

En la dua grupo estis ankaŭ mi, unuafoje. Estis tre kortuŝe partopreni tian lecionon, kie ni babilis kune engrupe kun nia instruistino. S-ino Maria proponis al ĉiu el ni elekti unu temon el kelkaj anoncitaj kaj kompili kelkvican tekston. Poste laŭvice ni laŭtelgis niajn kompilaĵojn. La instruistino rimarkigis lokloke pri eventualaj eraroj ne nur gramatikaj, sed ankaŭ sintaksaj kaj semantikaj. Ŝi pacience eksplikis ĉion, diskutante kaj proponante ankaŭ partoprenon de la ĉeestantoj en korektado.

Ĉiu sentis sin en iu reala klasejo, ne nur virtuale.

La lecionhoro longis ĉirkaŭ 150 minutojn anstataŭ 90, kiel antaŭanoncite.

Senlaca, ĉiam komunkiĝema kaj kamaradeca, Maria helpis nin ĉiujn pliprofondiĝi en nia scio mezgrada aŭ supera pri Esperanto kaj samtempe donis bonegan modelon por ion fari ni mem poste kun niaj gelernantoj.

Tre dankemaj ni adiaŭis ŝin esperante renkontiĝi denove en tiaj agrablaj lecionoj.

Bardhyl Selimi

Nia grupeto:



*

arompizoj, latiroj
(arom-pizo)
fot. MM

Bardolfo, Albanio

Cezaro, Brazilo

Flavio, Brazilo

Hiva, Svedio

Jozefo, Ĉeĥio

Karlo, Brazilo

Rafaelo, Hispanio

Maria Majerčak,
instr., Krakovo,
Pollando

Temlisto

1. Tipaj trajtoj de viaj samnacionoj.
2. Kian valoron havas por vi amikeco?
3. Kio en la mondo amuzas vin?
4. Kio en la mondo estas kortuŝa por vi?
5. Se vi povus ŝanĝi la mondon, kion vi farus?

kaj, temo por personoj, kiuj jam havas ĉi-rilatajn pripensojn:

6. Kio antaŭenigas la homan civilizon? - t.e., dank' al kio okazas progresado de la homaro (kelkaj faktoroj)?

MIA SAĜO POST 50 JAROJ DE INSTRUADO DE ESPERANTO

Mi instruis E-on en pli ol 200 kursoj ekde mia 17-a jaraĝo, do nun estas 50 jaroj. Mi instruis en mallongaj kelktagaj kursoj, plej ofte en kelkmonataj kursoj kaj foje eĉ en 3-jaraj kursoj. Mi instruis al infanoj kiuj ankoraŭ ne scias skribi, al ĉiuj aĝoj kaj profesioj ĝis maljunuloj, al intelektuloj kaj la plej malbonaj gelernantoj en lernejoj, al homoj el deko da landoj eŭropaj. Mi ĉefe instruis la plej bazan kurson (A) kaj malpli ofte ankaŭ la pli superan kurson (B).

Mi kredas ke tian vastan rilaton al ĉiuspecaj celgrupoj kaj al ĉiuspecaj lernmetodoj, kursdaŭroj eble havas neniu. Do, mi rajtas nun resumi, kion mi lernis pri homa kapablo lerni fremdlingvojn, aparte Esperanton. Krome, mi konstatis ke granda plimulto de instruistoj instruas ne por havi sukceson ĉe la lernantoj sed por ricevi salajron kaj agi laŭ la preskribitaj lernprogramoj. Tion mi neniam faris. Mia centra motivo ĉiam estis klopodi atingi la rezulton ĉe plimulto de kurspartoprenantoj kaj adapti mian laboron al tiu celo kaj metode kaj tempe.

La centra kaŭzo por sukceso en pedagogiaj klopodoj estas motivo de lernanto. Se lernanto ne havas motivon kaj rezistas akiri ĝin, la rezulto estos nula. Oni povas atingi tre minimumajn rezultojn per ekstrema perforto, sed seriozajn kvalitatajn rezultojn neniam.

La motivoj povas esti naturaj (ĉefe deziro ludi kaj lude ekscii, kaj aparta ene de tio estas motivo kaŭzita de rapida lernsukceso, do de metodo kiu donas tujan kaj palpeblan novkapablon kaj komprenon) aŭ provokitaj motivoj (ĉefe stimuli al pliprofundigo de scioj kiujn la infano pro iu ajn kaŭzo pli bone lernis en frua aĝo aŭ instigi okupiĝi pri aferoj kiuj rilatas al idealoj de unuopulo).

Mi instruis E-on al homoj sen motivoj (infanoj en elementaj lernejoj kiuj venis al la kurso pro tio ĉar instruistoj de aliaj lernobjektoj promesis ion al la infanoj se ili lernos E-on kaj gejunuloj kiuj estis elpelitaj el regula lernejo pro malsocia konduto aŭ absoluta malkapablo). En tiuj kazoj mi ĉefe okupiĝis pri tio kiel ludigi ilin kaj forigi la konscion ke ili ion lernas. En tiaj cirkonstancoj mi havis minimumajn sukcesojn, plej ofte preskaŭ neniajn, sed almenaŭ mi sukcesis atingi ilian pozitivan rilaton al Esperanto. Tamen el 8 generacioj kun entute kvindeko da gejunuloj el la kategorio de plenaj lernfuŝuloj mi sukcesis atingi ke 2 lernis vere la lingvon kaj uzas ĝin kaj pluraj el ili (eble 5) pro Esperantaj vojaĝoj kiujn mi organizis por ili, ŝanĝis la rilaton al la lernado mem kaj iĝis bonkvalitaj studentoj kun tre pozitiva opinio pri Esperanto.

Mi instruis al gimnazianoj kun bonegaj konoj de aliaj lingvoj kiuj havis esceptajn kapablojn rapide lerni kaj en tre rapidaj kursoj (de tri ĝis 10 tagoj) ofte granda plimulto kapablis tre bone esprimi sin skribe kaj kelkaj esceptuloj eĉ tre bone povis paroli post eĉ nur tri tagoj. Ĉi tie temis pri homoj kun esceptaj antaŭscioj kiuj ebligis rapidan sukceson kaj tio per si mem iĝis motivo. Tamen, tiaj estis malmultaj. Verŝajne inter plurcento da gimnazianojn kiujn mi instruis nur dudeko el ili vere iĝis bonaj esperantistoj.

En ĉiuj aliaj kursoj la centran rolon pri sukceso havis la maniero adaptiĝi al la diversaj kapabloj kaj antaŭkonoj de la lernantoj. Pli aĝaj homoj kutime sufiĉe pli malrapide komprenas kaj bezonas esence pli da tempo por povi bone memori kaj eĉ pli por povi bone kombini diversajn vortojn kun diversaj gramatikaj reguloj kaj do krei frazojn. La samo valoras ankaŭ por gejunuloj kiuj ne havas grandajn lingvaj antaŭkonojn kaj ĝenerale ne estis tro sukcesaj en lerneja lernado. En tiaj kursoj tre gravis la maniero kiel estis distribuita la lernmaterialo kaj kiel mi kiel instruisto sukcesis taksu necesan tempon por diversaj ekzercoj tiel ke ili estu allogaj, ke la plimulto bone komprenu ilin kaj havu sufiĉan tempon por ekzercoj kaj tamen ne fari la kurson teda al tiuj kiuj kapablis lerni pli rapide.

La esenco de ĉiu sukceso en pedagogio estas prizorgi ke la plej bazan scion kiu estas fundamento de iu lernobjekto oni instruu tiom longe kaj ekzercadu tiom longe ĝis la instruisto certas ke ĉiuj lernantoj aŭ almenaŭ granda plimulto vere komprenas la fundamenton kaj kapablas ĝin uzi. Tio signifas ke ne gravas la tempo preskribita laŭ lerneja programo (antaŭviditaj instruhoroj), sed tiu tempo kiu estas tre individua de grupo al grupo, tiu kiun opinias la instruisto sufiĉa kaj kutime temas pri multe pli longa tempo ol antaŭvidita en la lernprogramoj. Sed kiam la gelernantoj vere komprenas kaj kapablas uzi la fundamenton, poste ili lernos pliajn nivelojn multe pli efike kaj rapide. De tio dependas, ĉu oni parolos poste en la vivo: Ho jes, mi memoras, mi havis tre bonan instruiston aŭ iun ege malbonan de kiu mi lernis nenion.

Kio estas la baza fundamento de fremdlingvo? Tio estas minimuma materialo lingva (leksika kaj gramatika) kiu kovras principe ĉirkaŭ 80% de la parola ĉiutaga korpuso laŭ la uzofteco. En naciaj lingvoj temas pri proksimume 2000 plej oftaj morfemoj kaj tiu fundamento postulas tre pacienca laboron per lernolibroj kun proksimume 50 lecionoj dum minimume 4 lernojaroj. Rilate Esperanton la afero estas esence alia: la fundamenton difinis mia esploro pri morfemofteco en 1979 laŭ kiu konstatigis ke nur 470 plej oftaj morfemoj kovras 95 % de la parola korpuso kaj ke tiun materialon, tiun fundamenton, oni povas instrui per malgranda helplibro en kiu la materialo estas distribuita kaj klarigita en dek aŭ 12 lecionoj.

La sukceso estos certa nur se: la instruisto vere ne instruos en la unua kurso kies celo estas transdoni tiun fundamenton, iun ajn plian materialon – nek pliajn vortojn nek gramatikon kaj se li ekzercas tiun materialon persiste, malrapide, tiom longe ĝis li konvinkigis ke ĉiuj kapablas bone praktiki la sciojn de tiu fundamento. Tion eblas fari dum 50 horoj por tre kapablaj junaj gimnazanoj, sed necesas eĉ 300-400 horoj por nemotivataj, maljunaj kaj homoj kun minimumaj antaŭkonoj pri fremdlingvoj. Kompreni ke estas tiel granda diferenco nepre necesa se oni volas sukcesi ĉe grupoj negeniaj kaj nejunaj estas la ĉefa malfacilaĵo por instruistoj. Ili simple ne kredas ke iu grupo bezonas dekoblon da tempo ol alia grupo.

La instruistoj ankaŭ ne volas kompreni ke en la unua fundamenta scio oni NE RAJTAS PLIGRANDIGI LA AMPLEKSON DE LA MATERIALO EĈ JE NUR 5%, ĉar tio esence pli malfaciligas la laboron kaj plilongigas la normalan lernotempon.

Tiusence la Esperantaj lernolibroj por komencantoj tute ne konsideras tiun principon, ĉar ĉiu aŭtoro opinias ke E estas tiel facila per si mem ke oni ja povas senprobleme lerni anstataŭ 470 morfemojn almenaŭ 800 aŭ 1000 (ja tio estas multe malpli ol 2000 de aliaj lingvoj). Oni ne komprenas ke lerni unu

novan vorton ne signifas pli malfaciligi la lernadon je 0,2% de la lernado (ĉar temas pri 0,2% el 500 morfemoj), sed ke tio plimalfaciligas multe pli, ĉar oni ne lernas nur unu plian novan vorton sed kapablon uzi ĝin ene de ĝis tiam lernita gramatiko kaj kombini ĝin kun ĉiuj ĝis tiam lernitaj vortoj. Dek pliaj vortoj pli malfaciligas la lernadon je 20% de necesa plia tempo, kaj se la grupo estas tia ke ĝi bezonas normale 400 horojn por la tuta kurso, novaj 10 vortoj signifas por ili devi lerni pliajn 80 horojn, se oni volas ke ili vere povu uzi tiujn novajn 10 vortojn kune kun ĉiu antaŭa materialo.

Gravas do kompreni ke se oni atentigas tiujn principojn kaj uzas instruilojn kiuj pli-malpli sekvas la rekomendojn de la Zagrebmetoda lernilo oni atingos plej efike la rezulton tiel ke la lernantoj scios tre bone uzi la fundamentan lingvomaterialon (470 morfemojn) kaj esprimi 95-procente ĉion kion ili bezonas en ĉiutaga vivo. Post tio (ĉu 50-hora kurso por tre talentaj junuloj en malgrandaj grupoj) ĝis 400 horoj por tre miksitaj kaj grandaj grupoj) oni povas sen problemo sukcese daŭrigi la instruadon je pliaj niveloj laŭ kiu ajn metodo kaj lernilo.

Konklude:

Plej kutime oni ne lernas Esperanton pro vera motivo (pro tio ĉar tiu scio donos la eblon profesie perlabori monon aŭ okupiĝi pri io tre alloga) kaj tiam la nura ebla motivo por komencanto estas tre rapida kaj sukcesa sciakiro, do rapida lernprogreso. Por havi tion nepras:

En la unua fazo lerni tre bone kaj praktike la fundamenton de 470 morfemoj kaj la kombinuzeblon de ili en kurso en kiu okazas iom post ioma kresko de la plej frekvencaj ĝis ĉiam malpli frekvencaj morfemoj. Tion ebligas la ellaboro de lerniloj baze de frekvencmorfemaro de Parolata Esperanto kaj kiel esenca praktika rimedo uzeblas la Zagrebmetoda lernolibro.

Nepras kompreni ke la lernsukceso dependas de individuaj kapabloj de la lernantoj kaj grandeco de la grupo. Tiusence oni devas scii ke eblas teorie atingi la kapablon uzi la fundamenton post nur 50 horoj ĉe junaj kaj talentaj gejunuloj kun granda lingva antaŭscio sed ke la samon en granda kaj tre bunta grupo aŭ ĉe tre junaj infanoj oni povas atingi nur post multe pli da horoj, ĉu duoble, trioble aŭ eble eĉ 10-oble kaj pri tio devas decidi la instruisto kaj diri al la lernantoj anticipe aŭ la grupon dispecigi je pluraj grupetoj po kelkaj lernantoj.

Se oni tamen ne aplikas la principon ke al komencantoj oni vere instruas nur la bazan materialon de la fundamento sed enmiksas en la komencan kurson pli da materialo, oni devas konscii ke tio aŭ postulas esence pli da tempo por tiu instrumaterialo aŭ kaŭzas malsukceson de la celo mem tiel ke la granda plimulto de gelernantoj forlasas la instruadon antaŭ la fino de la kurso.

En okdekaj jaroj mi faris esploron pri tio kiom da homoj lernas E-on en diversaj kursoj tra la mondo dum unu jaro. Ne eblis kompreneble ricevi detalajn informojn sed baze de respondoj el dekkvino da landoj eblis konkludi ke en la komencantaj kursoj ĉiujare komencas lerni en la mondo minimume 100.000 lernantoj. Kaj kiom da ili efektive sukcesas finfari la kurson? Maksimume 10-20%. Kaj kiom da ili efektive esperantistiĝas? Ne pli ol 1%. Kial en la procedo de instruado forfalas 99% de tiuj kiuj havis deziron lerni E-on? Ĉefe pro malatento al la principoj ĉi tie priskribitaj.

Zlatko Tišljari

From: Birgitta Anevik <birgittaanevik_cls@hotmail.com>

Date: 2012/9/24

Koran dankon! Certe mi pli bezonas vian helpon, ĉar la albana estas ege malfacila.

Feliĉe ni povas uzi Esperanton!

Kore

Birgitta

Noto: S-ino Birgitta estas lernante la albanan. Tiucele ŝi veturas ĉiun monaton al Goteburgo kie stariĝis lernokursa de la albana. Ŝi eĉ konstatis kelkajn erarojn en la Konversacia Vortaro kompilita de mi (B.S.)

Ŝi skribas:

Mi estas kore danka pro via helpo. La artikolo "La Albana kaj Esperanto" estas tre interesa. La vortliston (kiu ne estas preta) Karl-Gustaf plibonigis tiel ke mi pli facile trovas la vortojn, kiujn mi serĉas.

(Mi poste sendos ghin al vi.)

Inter la tabelvortoj mi trovis ion strangan. Chu vere IE kaj NENIE estas sama vorto en la albana (Askund)? Konversacia vortaro Esperanto-Albana; Literoj kaj vortoj albanaj:

Mi opinias, ke la angla vorto Ocean ne estas bona. Eble ekzemple More estus pli ghusta.

Qiell: La angla vorto Stockyard estas malghusta lau mi. Eble oni pli bone uzu ekzemple la vorton chin?

Re: Lau mi Desire ne estas tre bona, sed ekzemple la verbo are pli bonas. Au vi trovus alian vorton.

Reze: Mi pensas, ke la angla lingvo ne havas tiun sonon, sed la hispana perro estas pli bona.

Ni esploru kune:

ie en la albana estas "diku" dum nenie estas "askund". Vi tute pravas.

La albana enhavas 36 literoj korespondantaj al 36 sonoj. Pluraj el ili malsimilas al la aliaj lingvoj.

La vokaloj "ĉ" kaj "ĉ" estas la solaj diakritikaj, dume ĉ estas relative rare uzata kompare al ĉ kiu renkontiĝas sufiĉe dense..

La unua estas la esperanta Ĉ, dum la dua estas iom malfacile por prononci ĉe vi. Bulgaroj havas ĝin, same turkoj. Ĝi estas senvoĉa e. Tamen albanoj subkomprenas tion ankaŭ se ili ne skribas ĝin ĝuste..ekzemple en interreto.

La vokalo "y" estas same malfacile prononcebla de fremduloj, malgraŭ ke germanoj, turkoj kaj aliaj uzas ĝin.

La konsonantoj sh, dh, ll, zh, xh, nj, gj, rr, th, estas simple notitaj per du kunmetitaj latinaj literoj. Do entute la albana alfabeto estas latina..

Sed oni malfacile prononcas aparte dh, ll, xh, nj, rr, gj, th.

Mia nomo estas BARDHYL. Tia estis ankaŭ la nomo de reĝo ilira (niaj antaŭnintoj) antaŭ 2400 jaroj. Ĝi signifas blanka stelo (yll-stelo; bardh- blanka). Provu prononci ĝin!

Estas diferenco inter dh kaj ll, same inter xh kaj gj, kaj inter r kaj rr.

Dume nj ne prezentas problemon

Dh estas kiel th en la angla they

Ll estas kiel ll en smell

xh estas kiel j en joke

gj estas tutsame kiel ĝ en esperanto

r estas kiel r en la angla read

rr estas kiel r en la angla trilled sed pli forta

nj estas kiel n en la angla new

y estas kiel la franca uni
zh estas kiel esperanta ĵ

ë estas kiel i en la angla bird, shirt,

Ni restu en kontakto, dankon, amike Bardhyl

En Ipernity vi havas ankaŭ bonajn dokumentojn (2011). Mi mem ne povas elshuti ilin, ĉar mi ne estas PRO-membro de Ipernity. Sed Karl-Gustaf estas. Li metis la artikolojn en memorbastoneto (?) kaj transportis ilin al mia komputilo.

Korajn salutojn

Birgitta

Kara Brigit, jes ekzistas ŝlosilo de Esperanto, la unua publikgita en la 20 jaroj de XX jc de s-ro Ĉefo Fico, forpasinta post la 70 jaroj kaj alia post 90 jaroj de XX jc, verkita de Agim Peraj.

. Same ekzistas lernolibro de Esperanto por albanoj verkita de la forpasinta Zef Mjeda, kiu enhavas ankaŭ vortareton. Ekzistas lernolibro de Esperanto por albanoj verkita de Vasil Pistoli forpasinta la 28 an de oktobro 2012 kiu enhavas same vortareton kvinlingvan.

Ekzistas ankaŭ mia lernolibro (ĉiam ĉe UEA) por albanoj kiu enhavas vortaretan dudirektan. Mi sendis al vi aparte elektronikan vortaron albana-esperanto, nature ne kompleta ankoraŭ sed funkcia.

Eble il helpos vin.

Mi estas preta respondi pri kiu ajn vorto ne komprenita de vi, ne ekzistanta en la vortaroj, same pri certaj temoj rilate la albanan.

Ĉi kadre helpos ankaŭ tekstoj dulingvaj albane kaj esperante, kiuj mi sendos de fojo al fojo vin.

Ankoraŭfoje gratulojn kaj kuraĝon en via laboro sekvinda de ni, ekz por eklerni la svedan...

Ĉion bonan, via Bardhyl

Espereble vi bone fartas.

Mi havas kelkajn demandojn pri helpiloj.

En la katalogo de UEA mi trovis:

1.Shlosilo albana

2. Fjalor Esperanto-shqip/shqip-Esperanto. 1993, Zef Luigj Mjeda; 8.40 Eu.

Chu vi konas tiujn librojn? (Vi sendis vortliston, kiu ankoraŭ ne estas preta sed kiun vi /kaj aliaj prilaboras?)

Mi daurigas la penigan studadon de la albana lingvo. Estas amuze malgraŭ ke ĝi estas malfacila!

Amike, Birgitta

Saluton Bardhyl!

Mi cerbumas pri kelkaj vortoj. La vorton "të" estas tre kutima, sed mi ne komprenas la signifon.

Kara, të estas vorteto, ia nodaĵo, kiel en la angla to, ekzemple to work, to write.

Albane: të punoj, të shkruaj

1. Ĉfare do të bëhesh? Kio vi fariĝos? 2. Dua të bëhem inĝinier. Mi volas fariĝi inĝiniero 3. Dua të studioj në universitet. Mi volas studi en universitato

4. Ku të firmos? Kie mi signu?

Sed jen alia ekzemplo:

Kam kolege të mirë. Mi havas bonajn kolegojn. (ĉi tie ĝi ludas la rolon de la nodaĵo)

Nominativo: I mire- bona (por vira ĝenro), Djalë i mirë- bona knabo

E mirë - bona (por ina ĝenro), vajzë e mire- bona knabino

Të mire- bonaj (por vira pluralo), Djem të mire- bonaj knaboj

të mira- bonaj (por ina pluralo), vajza të mira- bonaj knabinoj

Ĉu pro la rekta objekto oni devas skribi "të" anstataŭ i/e mirë?

Jes, ankaŭ pro tio, ekz. Unë dua një birrë të mire- mi volas bonan bieron

Kial oni skribas e antaŭ la verbo?- Tiel estas regulo en la albana

Si e keni emrin? Kia estas via nomo. Si e keni familjen? Kiel fartas via familio.

A e dini prefiksin e Austrisë? Ĉu vi scias la prefikson de Austrio? (Ĉi tie la vokalo e ludas la rolon de nodaĵo de genitivo, de posedo)

En nominativo: I uzatas por vira ĝenro – zëri i popullit- la voĉo de la popolo

E uzatas por la ina ĝenro, same por la pluralo-

Drita e mëngjesit- la lumo de la mateno

Kritikat e shefit- La kritikoj de la ĉefo-

Ekzemplo de deklinacio

Ina

Vejusha e marinarit- la vidvino de la maristo

E vejushës së marinarit- de la vidvino de la maristo

Vejushës së marinarit- Al la vidvino de la maristo

Vejushën e marinarit- La vidvinon de la maristo

Prej vejushës së marinarit- Pri la vidvino de la maristo

Vira

Porti i Durrësit- la haveno de Durrës

E portit të Durrësit- De la haveno de Durrës

Portit të Durrësit- al la haveno de Durrës

Portin e Durrësit- La havenon de Durrës

Prej portit të Durrësit- Pri la haveno de Durrës

A e pyesni shpesh mësuesin? – Ĉu vi demandas ofte la instruiston?

Kaj kio estas "ti" bini?

Ti estas kuniĝo de të + i, dum bini signifas trafigi al, do ti bini- vi trafigu al

Duhet ti bini në fillim zeros.- Vi devas trafigi unue al nulo

Amike

Birgitta


Beletraĵoj

La polino¹

(Libreto kun la rakonto "La Polino" de la albana verkisto Bajram Karabolli)

Je la 7-an de decembro oni promovigas la libreton dulingvan (Esperante kaj pole) kun la rakontot "La polino, originale verkite en la albana de s-ro Bajram Karabolli. La aranĝon la la tutan eldonon prepares la Bjalistoka Esperanto asocio strata de s-ino Ela Karzwszkaja.

¹ La rakonto estas jam publikita en nia Bulteno n-ro 102



Aldon-noto de s-ro Bajram Karaboli b.karaboli@gmail.com:

“Eble gravas aldoni ke mi estas deĵorinta kelkajn monatojn (aprilo-julio 1995) ĉe ambasadejo albana en Varsovio. Tie mi renkontis polinon, kies nomon mi ne rememoras, alveninta en nian ambasadejon por akiri vizon por sia filino. Ŝi alparolis albane min kio mirigis kaj mi demandis ŝin kie ŝi estis lerninta mian lingvon. Tiel ŝi motivigis kaj rakontis sian historion. Mi estis aŭdinta ankaŭ aliajn similajn historiojn, pri la monstreca krimo de la albana komunismo persekvinta plej kruele kaj detruinta la vivon al multaj virinoj el eksaj socialismaj landoj, enamiĝintaj al la albanaj junuloj studentaj en tiuj landoj kaj alvenintaj plene de belaj revoj por fondi familion kaj vivi en nia lando. La historio de la polino ege skuis min kaj postlasis profundajn spurojn same inspirigis por verki la rakonton La Polino. Do la rakonto baziĝas sur vera okazintaĵo”.

Noto alia

(de Shaban Hasani)

“La rakonto La Polino priskribas unu aspekton de la vivo en la eksaj komunismaj landoj, ĉikaze en Albanio. En tiuj landoj same kiel en la eksaj faŝismaj kaj naziaj landoj malrespektadis la homrajtoj, la vivo de la ordinaraj civitanoj estis tute nesekura pro persekvado far la organoj de la tiel nomata proleta diktaturo. Aparte en Albanio malgranda kaj tute izolita la politika premo estis sufiĉe ekstrema. La totala spionado estis nur unu el la fiaj karakterizaĵoj de tiu reĝimo.

La junedzino alveninta el Pollando pro enamiĝo sincera al albana junulo finstudinte tie baldaŭ falis en la manojn de kapo de departemento de internaj aferoj de provinca urbo, kiu profitante de sia posteno kaj la manko de jura ŝtato intencis seksumi kun ŝi. Kvankam Vera, la personaĝo envorte klopodis eskapi eĉ

ruzece al tiu perfortaĵo, finfine ŝin trafis la sorto de dekmiloj da civitanoj albanaj suferintaj longajn jarojn en la prizonoj kaj koncentrejoj komunismaj.

La rakonto estas instrua aparte por la juna generacio precipe en la eksaj socialismaj landoj por kompreni kion pasigis la gepatroj kaj geavoj dum preskaŭ duonjarcento por ke neniam reinstaliĝu tiu reĝimo. Tio helpas por pli forte ĝuadi kaj teni la demokration hodiaŭ.

Cetere la verkaĵo ravigas la legantojn per siaj scenoj allogaj de enamiĝo kaj amikeco inter gejunuloj de diversaj landoj kaj nacioj.”

Biografio de Bajram Karaboli



Bajram Karaboli naskiĝis en Albanio en la jaro 1943. Li diplomiĝis pri historio en la Alta Pedagogia Instituto de Shkoder (1965). En la jaro 1978 diplomiĝis pri la albana lingvo kaj beletra en universitato de Tirana. Dum pli ol 11 jaroj li vivis en Sudameriko, ĉefe en Argentino kaj Ĉilio (1997-2008), kie li studadis ankaŭ pri la kastejana lingvo en la universitato de Bonaero (UBA).


Li tradukis de la hispana al la albana kaj publikigis en la beletra albana preso: ciklon da poeziaĵoj de la ĉilia nobelistino Gabriela Mistral, rakontojn kaj eseojn de Luis Borges, Ernesto Sabato, Carlos Fuentes, Mario Vargas Llosa, Roberto Bolano, Camilo Jose Cela, ka. Li estas tradukinta de la hispana al la albana kaj eldonis: la romanojn de la nobelista Mario Vargas Llosa “La pesto de la virkapro”, “La maloportuna knabino”, la eseon de Manel Montobbio “Kiel eliri el la katina strateto”, libro kun fabeloj por infanoj de la argentina aŭtoro Rodrigo Ures. Samtiel li tradukis de la hispana al la albana kaj pretas por eldono jenajn beletraĵojn: romanon de Mario Vargas Llosa “Laŭdoj por la bopatrino”, volumon de rakontaĵoj de Carlos Fuentes “Eksterordinaraj rakontoj”, romanon de Roberto Bolano “La sovaĝaj dedektivoj”, volumon kun rakontoj de la hispana verkistino Pilar Adon “La plej kruela monato” kaj la tutan beletran verkaron de la meksikia verkisto Juan Rulfo.

El liaj verkaĵoj estas eldonita volume kun rakontoj “Rakontaĵoj en du tempoj” kaj ciklon kun poeziaĵoj.

Pro lia laboro kiel tradukisto de la hispana al la albana estas nomumita de la Akademio KULT (organizanto kaj promovanto por la kulturaj kaj beletraj aktivecoj) kiel unu el la kvar plej bonaj

tradukistoj por la jaro 2011. Tel. 0035544520624, porteblo: 00335693565759

Poeziaĵo el Kosovo



Agim Vinca²

Kampano surkole!

(Rekviemo por si kaj miaj amikoj)

Estis sabato. La plej bela sezono,

Kiam mi ricevis bileton stampita kaj signitan!

Nun mi estas libera, plene libera, karaj amikoj!

Havas mi surdorse sesdek kaj kvin vintrojn kaj somerojn

Kaj sepdekkvin eŭroj enpoŝe!³

² Eminentia nuntempa poeto el Kosovo

³ Tioma estas la pensio akatuale en Kosovo

Mi povas fari kion ajn mi volas. Jes, mi ĵuras!

Skribi memoraĵojn pri si kaj la ceteruloj.

Lamenti mi por la revoj kaj iluzioj junulecaj..

Povas mi eliri en Germin⁴ ĉiun matenon.

Trinki kafon en vilao LIRA

kontraŭ nur kvindek centonoj;

Plenigi la polmojn per aero kaj klorofilo

Aŭ memveneniĝi per fumo kaj nikotino.

Mi povas vekigi antaŭ tagiĝo.

Dormi laŭvole ĝis tagmezo

aŭ vagadi dumnokte kiel somnambulo.

Mi povas protesti, lanĉi sloganojn, ĵeti ŝtonojn;

Kunfrontiĝu al la polico kaj eniri prizonon kiel iame..Envane!

“Novaj regantoj rulas en Olimpo;

Jovi reĝas laŭ sia plaĉo...”⁵

Kion ajn alian mi ne povus fari! Kion ajn!

Mi povas ĉirkaŭiri tra la stratoj tagnokte

Kun manoj profunde en la poŝoj aŭ en la tenujoj. Kial ne?

⁴ Germin- granda parko ĉerande de Prishtina.

⁵ Versoj el La Ligita Prometeo de Eskilo

Ankaŭ tiuj traserĉantaj la rubuojn estas ja homoj, mi garantias vin.

„Homoj. Kun granda “H”

Kiel nin diris iam niaj plej bonaj instruistoj

Kaj ni post ili niajn lernantojn..

Estu feliĉa, oni diras al mi. Kaj mi estas. Kial ne estu!

Migjeni⁶ ne ĝuis tian ŝancon. Por li tio estis ja fora revo..

Temas pri la aĝo.

Nek Naim⁷. Ambaŭ ili forpasis frue pro tuberkulozo.

Luigji-n⁸ mortigis la kuglo. Bilalo-n⁹ la tranĉilo,

Jusufo-n¹⁰ la embusko en Untergruppenbah, trio

Enigmo de triobla murdo!

Nek la ruso Majakovski, kun kromnomo Volodja;

Nek la andaluziano Garsia Lorka, nek la turko Nazim Hikmet;

Nek la granda pelegriano George Gordon Byron,

Kiu eĉ la pavimŝtonojn instruis ribeliĝi kontraŭ tiranion,

Ne atendis ĉi tagon..

6 Granda albana poeto inter ambaŭ mondmilitoj

7 Nacia renesanca albana poeto dum dua duono de XIX jarcento

8 Poeto kaj politikisto en la komenco de XX jarcento

9 Opozicia poeto albana, mortigite en Usono far Sekurecservo komunisma.

10 Jusuf Gervalla, poeto el Kosovo, murdite kun du aliaj en Germanio far Sekurecservo jugoslava

Kaj kiom multaj aliaj. Artistoj, poetoj.

Forpasis pli junaj ol mi ankaŭ miaj amikoj.

La Aĝulo de Maki¹¹, nia De Rada¹² jes ja.

Forpasis kun unu gasterosteo enpoŝe sojle de sia naŭdekjariĝo.

Kiu kantantis: Alvenis la tago de Arbri¹³!”

Ĉu alvenis envere tiu tago?

Mi vidas la admonon en viaj okuloj:

“Ĉu vi konscias, amiko mia!

Ne iĝu lamentaĉulo, herezulo...

Ne decas al vi en ĉi tiu aĝo!”

Vi pravas. Mi akceptas.

Nun mi estas plene libera!

Mi povas reveni kien mi ekiris,

Hokkapti la oran fiŝon en la lagoakvoj,

Forkaptiĝu en reto kaj engluti mem la logilon..

Mi povas malaperi kaj foriri kien ajn mi deziru,

En Eŭropon Usonon eĉ pli fore.

11 Urbeto en Kalabrio, Italio, kie loĝas arbriĝoj, albandevenaj.

12 Granda albana renesanca poeto ĉe arbriĝoj en Italio

13 Alia nomo por albanoj

Mi povas aĉeti novan ŝnuron kiel Klosi¹⁴

Kaj surmeti tirŝnuron engorĝe sur ĉambreto

Tie subtegmente

En Tirana plene de etaj kaj egaj tiranoj.

Mi povas tuŝiĝi subite al kelkiu veturilo iutage,

Preterpasante la straton "Eqrem Çabej"

Kaj premiĝu al la varmega asfalto..

Kiom multe da eblecoj estas tiucele, karaj amikoj.

Ĉu tio ne estas enviinda?

Mi povas skribi testamenton kiel Dhimiter Pasko¹⁵

Kaj postlasu ordonojn al edzino kaj gefiloj:

"La patrio estas ja patrio ankaŭ kiam ĝi mortigas vin!"

Pardonu, kiam ĝi pensiigas vin!

Kun sepdekkvin eŭroj ĉiumonate

Panon, akvon, lakton, medikamentojn, mortveston kaj ĉapelon...

Kaj la eĥigan titolon Profesoro Doktoro

Pendinte kiel kampano surkole!

Kiel kampano surkole!

¹⁴ Verkisto, publicisto kaj tradukisto albana, memmortiginte per ŝnuro printempe 2012

¹⁵ Eminent albana verkisto kaj ekonomisto meze de XX jarcento

Kampano surkole!

Surkole!

Ah!

Prishtina, la 25an de majo 2012

(Enesperantigis Bardhyl Selimi, oktobre 2012)

Fragmento el la romano albana¹⁶


Kapllan Resuli¹⁷

La vidvino de la maristo¹⁸

16 Provlegita de sinjoroj Sen Rodin kaj Edmond Ludwig

17Kapllan Resuli, kun patrino albana kaj patro bosnia, naskiĝis en Ulqin (Ulcinj), urbo kompakte kaj plimulte albane loĝata nuntempe en Montenegro (ekde la jaro 1878). Kapllan sin distingis kiel talento en la beletro per rakontoj pri la vivo de maristoj, ekde l'infanaĝo. Li studis en la universitato de Skopje (Makedonio), kie oni arestis lin pro politikaj vidpunktoj kaj kondamnis al du jaroj da enprizonigo. Poste li revenis al Ulqin, de kie li fuĝis al Albanio. Lia romano "La perfido" rikoltis furoran sukceson kaj la reĝimo komunisma albana subtenis lin forte. Temis pri la partizana milito en Kosovo kaj perfideco de albanoj far serbaj komunistoj. Sed en la 70-aj jaroj oni arestis lin pro politikaj vidpunktoj. Fakte li lanĉis kelkajn tezojn pri la origino de albanoj. Laŭ li, albanoj ne estas posteuloj de iliroj, sed popolo turano-mongola alveninta ĉi tien de Azio kune kun bulgaroj en la IX-a jarcento, do post la slavoj, kio koincidas kun la serbaj tezoj. La reĝimo komunisma kondamnis lin al 49 jaroj da enprizoniĝo. Li liberiĝis nur en la 90-a jaro kaj tiam li fuĝis al Genevo (Svisio). Tie li daŭrigis sian studadon pri albanoj kaj pliprofundiĝis en siaj antaŭaj tezoj. Pro tio, Akademio de Sciencoj de Serbio kaj Makedonio akceptis lin kiel sian membron kaj aljuĝis al li la titolon de doktoro-profesoro.

Lia reputacio ĉe albanoj estas tre malbona ĝuste pro liaj kontraŭalbanaj vidpunktoj. Sed lia beletraĵaro estas ja interesa. Je kelkaj aspektoj, tio rememorigas al mi la noveliston Ivo Andriĉ, cetere same kontraŭalbana intelektulo.



18 Unuafoje, tiu novelo publikiĝis en Prishtina en la revuo 'Jeta e Re' (La Nova Vivo) en la jaro 1957. La aŭtoro reviziis kaj republikigis ĝin en la jaro 2003

La historio apartenas al la komenco de XX-a jarcento. La ĉefrolanto, Dĵanfize, (albane Xhanfize) estis analfabeta albana knabino. Ŝi enamiĝis, ekde sia dektrijariĝo, al bela knabo deksesjara montenegrana, Ivano. Ŝi renkontiĝis kaŝe kun Ivano en ties hejmo dank' al amikeco kun Darinka, fratino de Ivano. Sed la patro de Dĵanfize edzinigis sian filinon al junulo en Ulqin. La duonpatro de la junulo, ege seksumema, donis al la junulo narkotaĵon ĝuste tiom kiam li estis eniranta en la ĉambbron la unuan nokton de la geedziĝo. Tiel, anstataŭ la novedzo, en la malhela ĉambro, laŭkutime, la knabinon malvirgis la duonpatro. La morgaŭon, la junulo iris al navigado kiel maristo. Post kelkaj tagoj, alvenis la novaĵo de lia droniĝo aŭ malapero en la maro. Dume, la duonpatro, Shaban Shkozeti, daŭre seksumis kun la novedzino eĉ dum la ĉeesto de sia edzino. Li eĉ gravedigis ŝin. Post kelka tempo, informite de sia filino pri la okazintaĵoj, la patro de Dĵanfize nuligis la geedziĝon kaj akceptis ŝin denove en la hejmo. Li reedzinigis ŝin al la vidvo Sadik Ficka, mezaĝulo, kiu havis kelkajn infanojn. Pasis kelkaj jaroj kaj subite oni eksciis pri la murdo de Sadik. Plejverŝajne, lin murdis mem Shaban, samkiel eble estis okazinta ankaŭ al unua edzo. Ĉi lasta venis al la hejmo de Dĵanfize por seksumi kun ŝi sed sensukcese. Dume, ŝin subtenis per nutraĵoj kaj aliaj bezonaĵoj la filo de Sadik, Dĵela Ficka, viro kun forta karaktero, same maristo. Konvinkite, ke la murdisto de sia patro estis Shaban, Dĵela murdis iunokte ĉi lastan. Dĵanfize kun ses infanoj ekamis Dĵela-n, sed ĉi tiu ne respondis al ŝiaj deziroj, kvankam ege lin allogis la beleco de sia bopatrino. Lutage, Ivano, kiu fariĝis same maristo, alvenis en la hejmon de Dĵanfize kun Dĵela, sia ŝipkamarado, sed ankaŭ samideano je ideologio socialista. Ambaŭ eksaj amantoj decidis rekomenci sian rilaton. Ŝi eĉ naskis sepan, bebon, ĉifoje de Ivano kaj definitive kuniĝis kun li por pasigi la restantan vivon feliĉe.

Mi eklegis. La intrigo estas vere interesa, komparebla kun "The Wuthering Heights" de Emily Bronte, kiun mi kelkfoje trastudis kun miaj kolegoj. La traduko tamen postulas zorgan redaktadon...

Valdas Banaitis, Litovio

Titolo en la originalo albana: Vejusha e detarit

Eldonejo "Milosao", Saranda, Julie, 2003

Ĉapitro XII

Atendante Ivano-n, Dĵanfize ekpensis ke ankaŭ li aranĝos trompilon kiel Dĵela. La vivo estis instruinta, streĉinta ŝin, per malfeliĉaĵoj. Kion ajn ŝi estis entrepreninta en la vivo, maloportunis. Maloportuna estis la unua geedziĝo, la rilatiĝo al Shaban Shkozeti, eĉ ankaŭ la dua geedziĝo. Maloportune rezultiĝis ankaŭ la klopodo por ekrihatiĝi al Dĵela. Ŝi estis konvinkita ke, eĉ se ŝi apogos sin al la verda cedro, ĉi lasta ekŝrumpos en siaj manoj.

Malakurate iris ĉio. Blankan tagon ŝi apenaŭ vidis. Ne ĝuis eĉ unu ĝojon. Dume, aliaj virinoj - vidvinoj, pli aĝaj ol ŝi, eĉ tute malbelaj, estis ĝuantaj la vivon. Ili trovis amantojn, jen ene de la familia rondo, jen ene de la loĝkvartalo, kaj kontentiĝis kaj konsoliĝis, unuvorte vivadis. Dum al ŝi nenio iris bonorde. Ĉu tiel ŝi pasigos la vivon?! Ĉiam tiel finiĝos la deziroj kaj entreprenoj, klopodoj, revadoj?! Tiel ŝi krepuskigos la vivon?! Ĉu neniam, neniam frapos la sorto al ŝia pordo?! Neniam ŝi ne ĝuos la veran amon, masklon, veran viron?!

Jen, ankaŭ Ivano, tiu kiu iam amis ŝin tiom arde, tiu kiu ankaŭ hieraŭ vespere, tie en Rena, kaj hodiaŭ dumtage, kiam lin renkontis surstrate revenante de la patrino, promesis kaj certigis ke ĉivespere alvenos, nepre alvenos, tiel ja diris, sed ne alvenas. Kial li ne alvenas?! Kial li malfruiĝas?! Li devas esti kompreninta jam ke ŝia animo bruladis por Ivano ekde sia infanaĝo, des pli brulas nun, kiam ree vekiĝis la animaj sentoj, iamaj revoj kaj deziroj.

Li ne sciis, nek sentis, nek komprenis ke al ŝi minuto ŝajnis horo. Kun oreloj direktitaj tie, al la kortopordo kaj kun streĉita animo, ŝi atendis senpacience Ivanon, kiu tute hazarde estis enirinta en sian vivon, ekde kiam ŝi estis tute etulino, dekdujaraĝa, kaj denove li hazarde ŝin renkontis.

Pro pezaj malfacilaĵoj, ŝi preskaŭ forgesis lin kaj eĉ ne supozis ke renkontos lin iutage.

- Ĉu vere hazarde li alvenis?!- sin demandis Dĵanfize. Ĉu ne venigis lin Hazreto Hizro19?!"

Pensante tiel, la kortopordo krakis "krcl".

Ŝi eksaltis kaj eliris. Tiumomente Ivano riglis la pordon kaj turnis la vizaĝon al Dĵanfize, kiu kurante sin ĵetis al li. Ankaŭ Ivano plilongigis la paŝon kaj, meze de la korto, ĉe la puto, ambaŭ sin ĉirkaubrakis per la forto de nostalgio pro tiom da jaroj, dum kiuj ili ne vidis unu la alian, pro nostalgio de la unua amo. La lipoj de Dĵanfize, post kiam ili ŝoviĝis sur lian vizaĝon, sur liajn frunton kaj okulojn, serĉis ankaŭ liajn lipojn, kaj ĵus trovinte algluiĝis al ili kiel sangosuĉiloj, kisis ilin pasie kaj suĉis, ĝuste tiel, kiel ŝi kisis kaj suĉis estinte knabino, malesperigita, ĉar oni fianĉigis ŝin al viro, kiun neniam antaŭe ŝi estis koninta nek vidinta.

-Venu enen!- ŝi diris kaj tiris lin per brako, kvankam tio ne estis bezonata ĉar Ivano estis alveninta tiucele.

Ŝi malbutonumis lian palton, demetis kaj pendigis ĝin sur najlon, malantaŭ la pordo, poste diris:

Sidiĝu sur kanapo, apud la fajrujo, varmigu vin!

Ĉar Ivano, antaŭ ol sidiĝi, proksimigis siajn manojn al la fajro kaj frotis ilin pro malvarmo, eĉ blovis al ili, ŝi diris:

Ĉu ci volas ke mi plenigu ankaŭ la karbardaĵujon²⁰ per ardaĵoj?

Ne estas bezonate, Dĵana. Ĉi tie varmas, jen, mi jam varmiĝis.

Jes, ĉi tie varmas, Vano. Mi gardis la fajron brulanta por ci, ĉar la etuloj ne estas hejme.

Kie ili estas?- demandis li.

Ĉe mia patrino!

Ĉu pro tio hodiaŭ ci estas tie ĉi?!

Ne, mi venis por ci. Mia koro sentis kaj deziris vidi cin. Mi ne povis atendi ĝis noktiĝo por ke venu ĉi momento. Hodiaŭ la tutan tagon mi estis tiom maltrankvila. Kaj ju pli multe proksimiĝis la momento de nia renkontiĝo, des pli multe mi maltrankviliĝis. Ci ne povas supozi kiom mi atendis!

Ci ĉiam maltrankviliĝis kiam ni renkontiĝis. Tute ne ŝanĝiĝis. Nur, eble ŝajnas al mi, sed ci fariĝis pli bela..

Eh, ci! - diris ŝi, frapante malpeze permane al lia vizaĝo - ĉiam nur mian belecon ci rigardis!

Cia beleco estas la unua kozo kiu okulfrapis min, sed mi rigardis kaj ŝatis ankaŭ la belecon de cia animo, Dĵana! Pro tio mi eĉ ne edziĝis. Mi vivis kun la memoro pri ci kaj la espero ke, kiu scias, verŝajne la sorto permesos nin renkontiĝi ankoraŭfoje en la vivo. Mi ege bedaŭris pro la droniĝo de via unua edzo, sed tiom multe mi ekĝojis, ĉefe ke ci ne havis infanon kun li. Espero vekigis ĉe mi por kuniĝi denove, sed

subite mi ekscis ke oni denove edzinigis cin al alia maristo, kaj ke vi naskis infanojn. Tiam mi perdis ĉiun esperon. Mi pensis ke mi perdis cin definitive.. Malgraŭ tio, mi neniam fianĉiĝis al alia virino, des malpli edziniĝis. Neniam mi amoris kun alia virino..

Ŝajnas tio al mi nekredebla!- interrompis lin Dĵanfize sincere.

Ci povas kredi min, povas ne kredi, sed cia Ivano estas virga. Ne nur ĉar ankoraŭ mi ne amoris kun alia virino kiel indas, sed post ci, mi eĉ apenaŭ tuŝis alian virinon permane.

Nekredeble!-diris denove Dĵanfize.

Ni, maskloj, ne posedas himenon, sed eĉ se ni havus, ci tuj konvinkiĝus ke Ivano estas virga.

Ĉu vere?!

Vere!

Nu, ĉivespere mi forrabas de vi la virgecon!- diris Dĵanfize, ridetante dolĉe kaj eksidante sur ties genuoj.

Ilij lipoj denove kuniĝis kaj longan tempon ili ne disiĝis.

Ĉu ni, unue, manĝu iom da pano?- petis ŝi lasante liajn lipojn.

Kiel ci volas, Dĵana! Ĉivespere, mi estas je via dispono. Faru kun mi kion ajn ci volas. Nur ne cirkumcidu min!

Ha-ha-ha!- ekridis Dĵanfize, ĉar rememoris ke iutage ŝi estis eniginta lian prepucion en tondilon, dirante - Mi cirkumcidos cin!

Kaj li, timante ke ŝi vere fortranĉos tion, kiel oni kutime agas kun ĉiuj muslimaj knaboj, tuj retiriĝis de ŝiaj manoj, kriante:

Ĉu ci estas freneza Dĵana? Kiamaniere mi povos fiki cin, se vi tranĉos ĝin?!

Dĵanfize ekstaris kaj alportis la manĝotableton, metis antaŭ Ivano virŝafan kapon, tason da prunkomposto, lignan kuleron, tason da jogurto, poste ankaŭ botelon da brando, kiun tiutage ŝi aĉetis ĝuste por li, certa ke li alvenos.

Ĉu ci drinkas brandon?!- demandis Ivano, mirigite.

Ĝis hodiaŭ, mi ne drinkis, sed ĉivespere ni drinkos kune, ĉar mi bone scias ke tio plaĉas al ci!- diris ŝi kaj malŝtopis la botelon.

Unuafoje, la brando eniris tiun domon. Tiutempe en la muslimaj familioj oni ne enkondukis brandon eĉ kiel medikamenton por desinfekti la vundojn, ĉar tion oni

konsideris peko. Tamen, estis ankaŭ muslimaj viroj kiuj drinkis kaj ebriiĝis, sed ne virinoj. Eĉ tiaj muslimaj viroj estis raraj. En la tuta urbo oni povis nombri ilin per la fingroj de unu mano. Se la nombrado pasis al la alia mano, tuj oni rimarkis, ke iu el ili mortus, aŭ lin trafus apopleksio kaj paralizigis.

Dĵanfize ekprovis brandon unua- kaj lasta-foje en la domo de Ivano. Ŝi estis lekinta la brandoglaseton por montri al li kiom arde ŝi amas, kaj ĉar ŝi estis pekinta kun li, kiel amorante kun kristano aŭ ŝkjao²¹, ŝi volis montri ke, ĉirkaŭbrakante lin, ŝi ne plu neglektos iun ajn alian pekon.

Ivano, siaflanke, ekdrinkis brandon je dekkvarjara aĝo. La brandon produktis la avo per ĝardenaj prunoj. Nepre, li drinkis kaŝe kaj po iome. Dĵanfize sciis tion ĉar ĉiufoje kiam ŝi renkontiĝis kun li, Ivano nepre drinkus unu glaseton, ne pro animdeziro, sed por iĝi iel pli vireca kaj kuraĝa, iom pli aŭdaca kontraŭ ŝi, kiu permesis al li kisi kaj karesi, sed ne seksumi.

Ĉar nun mankis la brandoglasetoj, Dĵanfize plenigis du kafoglasetojn. Ŝi tostis kun Ivano kaj trinkis gluteton. Momente ŝiaj okuloj ekbrilis, malfermiĝis kaj pleniĝis de larmoj.

Nu, ne nur larmojn, sed eĉ la okulglobojn ci eltiru, ĉar ĉi-nokte mi tamen

drinkos - ŝi diris al la brando, kaj denove trinkis alian gluteton eksidante apud Ivano.

Ankaŭ li levis la brandoglaseton. Poste enigis la manojn kaj la kuleron en la virŝafan kapon, eltiris ties cerbon kaj ekmanĝis plezure. Li eĉ laŭdis Dĵanfize ĉar ŝi estis boliginta ĝin bone, enkondukante ankaŭ spicaĵojn, menton, petroselon kaj nigran pipron. Li ege ĝuadis tion, tiom multe, ke li eĉ lekis ankaŭ la ostojn.

La fajro unuflanke, la brando kaj virŝafa cerbo aliflanke, kaj precipe Dĵanfize, kiu de tempo al tempo brakumis kaj kisis lian kolon, ege varmigis lin. Ivano demetis la jakon, ŝuojn, dum Dĵanfize same varmiĝis, ĉar Ivano estis malkovrinta ne nur ŝiajn genuojn sed ankaŭ la koksojn kaj tuŝis inter ili; tial ŝi malbutonumis sian robon, alportitan de Dĵela antaŭ kvar noktoj. Rigardante la cicojn preskaŭ nudigitajn, Ivano enigis sian kapon inter ilin kaj kisis arde, tiel kiel li kutimis fari antaŭ ŝia edziniĝo. Tiam, ankaŭ Dĵanfize enigis sian manon inter liajn femurojn kaj kaptis tiun aĝon tiel, kiel ŝi faris tiam. La penis de Ivano estis erektita kaj Dĵanfize apenaŭ paciencis plu.

- La cicoj- li diris kisanter ilin – iom grandiĝis kaj ŝveliĝis, ili ne plu estas etaj

kiel tiam!

- Kompreneble, Vani - ŝi tuj respondis. - Ili mamnutris ses infanojn, ĉiu dum

du-tri jaroj, ĉar ankaŭ kiam mi naskis alian infanon, du antaŭaj plusuĉis. Malgraŭ tio, la cicoj apenaŭ pendas. Vidu kiel ili staras eĉ sen mamzono.

Ŝi ekstaris, demetis la robon kaj ankaŭ la mamingon kaj montris la cicojn,

21 Ŝkjao- tiel nomis albanoj la slavokristanojn.

kiuj vere ne pendis.

Ekstaris ankaŭ Ivano kaj ĉirkaŭbrakis ŝin kisanter kaj mordante la cicojn, sed malpeze, por ne postlasi signojn.

- Ili estas ja mirindaj, Dĵana!- li diris. - Pli belaj ĉinokte ol kiam ci estis knabino!

- Jes, ja, mi tion diris! La cicoj fariĝis pli belaj!..Kial ci kvazaŭmordas ilin?! Mordu, kiom ci deziras kaj volas! Nun ili estas ciaj! Mi ne iros al la edzo, do ci ne devas savi ilin aŭ timi postlasi signojn, kiel iame! Mordu do! Mordu Vani! Mordu por nun kaj por tiom da fojoj, kiam mi ne permesis tion al ci!

Kaj Ivano mordis, sed denove ne tiom forte.

- Pli forte, Vani! Pli forte!

- Ivano mordis ankoraŭ pli forte, rigardante al la okuloj kaj atendante ke ŝi ekkriu pro la doloro. Sed ŝi ne kriis. Male ŝi ree diris:

- Ankoraŭ pli forte!

Tiam Ivano enfiksis siajn dentojn per la tuta makzela forto. La cico krakis enbuŝe kaj al li ŝajnis ke li estis forŝirinta ĝin. Je lia plej granda miro, Dĵanfize ree ne sentiĝis. Nek "oh!" ŝi eligis.

Li delasis la cicon kaj vidis kion li faris. La cica peco estis enloke, sed kun sangumita ringeto, kun la dentosignaj liaj. Ivano kisis ĝin kaj diris:

- Pardonu Dĵana! Mi postlasis signojn!

- Ne gravas, ne gravas! Mi mem volis ke ci faru tiel. Nun ĝi aspektas pli bela!- diris ŝi.

- Ankaŭ ci fariĝis pli bela, kaj ne nur la cicoj! Vidu ĉi tiujn koksojn, Dĵana!- kaj karesis la koksojn sur tiuj blankaj silkaj kalsonetoj alportitaj de Dĵela.

- Vidu ĉi zonon kaj ĉi femurojn kaj koksojn! Ci fariĝis multe-multe pli bela ol ci estis, mia Dĵana!

Li enigis fingrojn en la ŝelkon de la kalsonetoj. Li volis malsuprenigi ĝin, sed ŝi ne lasis, tenante la manon.

-Atendu ĝis ni finmanĝos! Ankoraŭ vi ne frandis la prunkomposton. Mi pretigis ĝin bone. Frandu, frandu!
- diris ŝi, tirante lin eksidi.

Ivano eksidis denove ĉe la manĝotableto kaj plu manĝis kaj drinkis, sed nur per unu mano, la maldekstra, dum la dekstran li metis inter la femurojn de Dĵanfize.

Ankaŭ Dĵanfize manĝis nur per unu mano, ĉar la maldekstran ankaŭ ŝi tenis tie, inter liaj femuroj. Ĉar Ivano enigis la fingrojn ankaŭ sub la kalsoneton, Dĵanfize respondis per la sama ago: enigis la manon sub la pantalonon. Kaptinte lian penison, mire ŝi diris: - Bu, bu, bu, kiom ĝi grandiĝis! Kiam ni amaris, ci ne havis ĝin tiom granda!

Ŝi eligis la penison el la pantalono por pli bone rigardi kaj tuj mallevi siajn lipojn sur ties kapon, kisis kaj frotis, samkiel ŝi estis frotinta ĝin, kiam Vani estis dekkvin- deksesjarulo, dum ŝi estis dektri-jarulino. Kisante denove la penisokapon, ŝi ankaŭ lekis ĝin perlange, kvazaŭ sukerkanon, enbuŝigis kaj elsuĉis ĝin.

- Sufiĉas Dĵana, sufiĉas!- diris li, forigante ŝian kapon.- Sufiĉas, alie elverŝigos la salepo22!

Rigardante mire al liaj okuloj, Dĵanfize diris:

- Ci ne forgesis eĉ la salepon?

Tiutempe Dĵanfize nomis "salepo" la spermon, kiun Ivano verŝis sur ŝiajn koksojn, post kiam ŝi fineksitis lin frotante permane.

- Nenion mi forgesis, Dĵana, nenion! La tutan vivon mi pasigis nur kun la memoro pri ci, nur sub cia ombro, eĉ kiam mi fermis la okulojn por dormi, ci aperadis ensonĝe!

Dĵanfize ĵetis siajn manojn sur ties kolon, kisis kaj demandis:

- Ĉu vere ci amas min, Vani?!

- Mi amas cin, Dĵana!

- Tiel, kiel ci amis min iame?

- Tiel, eĉ pli multe!

- Ĉu ci ne bedaŭras ke mi ne plu estas virga kaj pura, netuŝita de maskla mano, kiel mi estis, kiam ni kune amoradis?!

- Mi ne povas diri ke ne bedaŭras. Sed la amo ne postulas virgecon, nek purecon. Krome, ci ne estas ĉiesulino. Kion ajn ci faris, ĝin faris kun cia edzo, tiel kiel agas ĉiuj virinoj, tiel kiel agas ankaŭ miaj fratinoj, tiel kiel agis ankaŭ mia patrino kun mia patro. Io ne malbona por la fratinoj, por la patrino, ne povas estis malbona por la ceteraj virinoj, nek por ci.

- Tiel estas, Vani, - diris ŝi.- Nur ke cia patrino, cial fratinoj, ne ŝanĝis siajn edzojn, dum mi...mi estas ŝanĝinta du virojn...Ĉinokte ci fariĝos la tria!

- Tia estis ja cia sorto kaj la mia! Se ni estintus pli bonŝancaj, samkiel nun ci estas la unua virino en mia vivo, tiel ankaŭ mi estus la unua viro en cia vivo. Ni ne povas kontraŭstari la sorton! Tia estis nia sorto! Ĝis kiam ni havos alian sorton, pli bonan, pli belan kaj pli dignan, ni devos akcepti ĉi tiun kaj ordigi niajn vivojn tiel, kiel eblas!

Li ĉirkaŭbrakis Dĵanfize-n je la kolo kaj lipkisis ŝin. Disiĝinte de liaj lipoj, Dĵanfize diris ekscitite, kun voĉo malfortiĝinta:

Mi ne povas plu pacienci, Vani! Prenu min en viajn brakojn! Prenu, mi petas tuj kaj ĉirkaŭbraku ... premu kaj...Vani, ne plu mi povas pacienci. Mi brulas, Vani, mi brulas!

Ivano turnigis ŝin sub sin, tie sur la kanapo, enmetis la fingrojn sub la ŝelkon de la kalsonetoj, malsuprenigis ĝin malrapide, rigardante la umbilikon, la ventron kaj la pubon, nerazitan de post la tempo kiam ŝi estis seksuminta kun la edzo. Poste li enmetis inter la koksoj la manon, dum Dĵanfize, skuinte la genuojn por ke ili glitu malsupren, malfermis iom la gambojn, por ke li povu trapasigi libere lian manon kaj tuŝi laŭdezire.

La mano de Ivano pasis malpeze meze de la ŝiaj koksoj. Tuŝante dolĉe nur la enirejon, kiel tiam, antaŭ multaj jaroj, kiam li timis malvirgi ŝin, li demandis:

Kaj ĉi tiu, ĉu plibeliĝis?!

Tion mi, povrulino, ja ne scias! Jen, rigardu mem!- diris Dĵanfize kaj malfermis la gambojn komplete, por ke li rigardu ankaŭ tie, ĉar varmegis ŝia animo. Sentis ŝi bezonegon ke liaj okuloj rigardu ĉiun parton de la korpo, ke liaj manoj tuŝu, karesu kaj frotu ĉiun parteton.

Ivano sin ĵetis sur ŝin tuje, frotante permane kaj perfingre, sed denove nur la vulvon, dum Dĵanfize atendis ke li enigu tien ne nur la fingrojn. Ne plu estis kiel iame, kiam ŝi diradis timeme:

Atentu, ne malfaru min, ĉar la virgecon mi volas donaci al mia edzo!

Ĉifoje ŝi ne nur ne diris tion, male senpacience ŝi atendis ke li enigu la tutan penison enen. Sed la kanapo estis malvasta kaj ŝi ne sentis sin konforte tie. Tial, ŝi diris:

Atendu, atendu! Mi kunportos matracon, ĉar ĉi tie, surkanape, ni ne estas komforte.

Kaj ŝi ekstaris kaj iris rekte al la pordo de la dormoĉambro, swingante, balancante kaj fleksiĝante karese kaj afekte, ĉefe per la koksoj kiuj luliĝis dekstren- maldekstren.

La moviĝado de ŝiaj skapoloj rememorigis al Ivano ka kanzonon pri Emineo, furora tiutempe, multe kantata en Ulqin, en kafej-drinkejoj, surstrate kaj hejme. Tiuj erotikaj versoj diris ke kiam Emineo promenas kaj moviĝas per siaj skapoloj, mirindaj por ĉiuj maskloj kun vaganta menso, multaj eĉ svenis rigardante ŝin, kaj la malfeliĉulojn eĉ la paroloj de la mulao ne povis kuraci kaj rekonsciigi. Ankaŭ Ivano estis tiel allogita post kiam li perdis Dĵanfize-n kaj havis nenion por fari krom sin okupi kaj plezurigi per kanzonoj kaj brandoglaseto. Nun, tia Emineo, viva kaj vera, kiun li revis dum la tuta vivo, estis tie, antaŭ liaj okuloj.

Rigardante Dĵanfize-n, kiu swingis la koksojn kaj skuis la skapolojn, liaj okuloj malheliĝis, kaj Ivano ne plu povis pacienci. Li eksaltis surpiede kaj sin lanĉis post ŝi kure, kaptis ŝin de malantaŭe je ŝiaj plenaj rondaj koksoj, envolvis ŝin per siaj brakoj kaj pasie levis ŝin alten tiel, kiel ŝi estis leviĝinta ankaŭ lia tuta animo pro nostalgio kaj amo, kaj turnis ŝin ĉirkaŭ si.

- Kion ci faras, Vani, kion?! Ellasu min, mi pezas! Ne plu mi estas malpeza kiel iame! Ellasu min!

Sed Ivano ne aŭdis nek lasis ŝin. Li plu turnis ŝin tra la kuirejo per siaj fortaj maristaj brakoj, premante kaj kisantante ŝin ĝis laciĝo. Poste denove li demetis ŝin sur la kanapon kie ili estis antaŭe kaj, mallevinte siajn pantalonon kaj kalsoneton, li eniĝis inter ŝiajn koksojn blankebrilantajn kaj vibrantajn pro pasio kaj eksciteco. Li premis sin al tiuj koksoj, al tiu korpo, al la ventro kaj cicoj, kisantante la antaŭkolon kaj ĉion, malsata, avidema, nostalgiema, dezirema, ardigita pro tiom longa atendado de ĉi tiu momento, de ĉi tiu feliĉo.

Dĵanfize prenis lian penison permane kaj proksimigis ĝin al sia vagino. Frotis ties kapon al la pordoklapoj, kiel ŝi faris tiomfoje kiam ŝi estis knabino, kaj poste, malrapide, ĝuante la plezuron kiun neniam antaŭe ŝi spertis, ŝi enigis la kapon internen, enigis ankaŭ parton de la penisokorpo kaj subite ellasis ĝin, retiris la manon kaj sin premis forte al Ivano ne nur korpe, sed ankaŭ anime, kun sia tuta estaĵo deziranta kaj ardanta, ne nur pro bezono de malstreĉiĝo kaj seksa kontentiĝo, sed ankaŭ pro Ivano, kiun ŝi tiom multe amis kaj amas. Kiam ŝi sentis la penison ene je ĝia tuta longo, al ŝi ŝajnis, ke ĝi atingis ŝian koron kaj pro plezurego eldiris:

O-o-ooj !

Estis ja voko, krio de ŝia unua kontentiĝo en la vivo, neniam provita, tiu aparta plezuro neniam antaŭe spertita, neniam antaŭe sentita kun iu ajn el la forpasintaj siaj edzoj. Estis krio de sia preskaŭ dudekjara revo, kiu finfine plenumiĝis.

Pro pasio, kiu forkaptis ŝin tutece, Dĵanfize, ĵus sentinte ke Ivano estiskunigita kun ŝi, ke ili fariĝis unu memo, ekstremis kaj tremetis, kvazaŭ trafis ŝin epilepsio.

Ivano levis pli alten ŝiajn krurojn kiel du fostojn de la ŝipo, surmetis ilin super siajn ŝultrojn, pasigante siaj brakojn sub ŝiajn skapolojn kaj apogante sur ties ŝultrojn, envolvis ŝin tiel, kiel neniam estis farinta tion Shaban Shkozeti, nek Sadik Ficka.

Glebiĝante sub li, kiel bulo kaj flano, ŝi nur ĝemadis tiom pro plezuro, tiom pro la pezo kaj premo de liaj fortaj brakoj. Momente ŝajnis ke Ivano rompus la ostojn, deŝirus ŝin laŭzone.. Pro eksciteco, kiu forkaptis ŝin ĉiam pli profunde, ŝi volis moviĝi per koksoj kaj per la tuta korpo, volis ankaŭ ululi, sed apenaŭ permesis tion la brakoj de Ivano, liaj lipoj. Alkroĉita kiel en la premilo, kaj certe ankaŭ pro eksciteco, ŝi apenaŭ povis enspiri. Ekavidis spiron.

Sed pli multe ol ŝi, estis avidanta spiron Ivano. Li enspiris profunde kaj eligis malfacile spiron, ronkis kvazaŭ kelkiu estis alkroĉinta lin engorĝe, kvazaŭ li estus mortanta.

Ambaŭ estis en la kulmino de la pasio, kiam oni sentas ke la ostoj estas kvazaŭ solvataj, Dĵanfize ekgapis tiom multe, ke Ivano ekpensis, ke ŝi estis mortanta, svenanta. Ŝi estis rigidigita sub li per malfermaj okuloj kaj buŝo, surprizite de tio sentata, tio spertata.

Ankaŭ al Dĵanfize ŝajnis ke Ivano estis mortanta, ke lia koro baldaŭ ĉesus funkcii, ĉar ankaŭ li estis rigidigita super ŝi kaj estis rigardanta kvazaŭ li formanĝus ŝin.

O-0-0h, Ivan, mia animo! Ivano- animo! Ivano, o vivo!- eldiris ŝi sin alkroĉante al li, premante la kapon sur la cicojn tiom forte kiom kapablis la brakoj, kisante kaj enspirante plorsingulte.

Dĵa- dĵa- dĵana-a-a! Mia Dĵana-a-a! Mia Dĵana-a-a!- eldiris Ivano enspirante profunde, kvazaŭ estis kaptita je gorĝo, kiel la droninto meze de la maro.

Kaj ŝi sin malstreĉiĝis. Li sentis ke, ne nur la salepo, sed la tuta animo sia, tuta sia estaĵo, estis eliranta el la korpo, estis enverŝita tie, en la sino de la korpo de la kara kaj dezirata Dĵanfize. Ŝajnis kvazaŭ li estis mortanta.

Dĵanfize sentis ke li estis solvata kun ŝi, sentis kiel lia estaĵo estis penetranta en ĉiu fibro kaj haŭttrueto de ŝia korpo, tiel kiel penetras la pluvo en la teron kaj la spiro en la polmon. Estis unuafoje en sia vivo, la unua okazo kiun Dĵanfize spertis, sentis la seksan kontentiĝon, ĝuadis tiom komplete kaj inde. Ne nur al Shaban Shkozeti, sed ankaŭ al Sadik Ficka, ŝi estis nur sindoninta la korpon por kontentigi ilin, per la ĉarmo kaj beleco sia, sed, por si mem, neniam kun iu el ili ŝi estis ĝuinta tian plezuron kian ŝi ĝuis nun, en la ĉirkaŭbrako de Ivano.

Kaj kiam ŝi estis knabino, danke al la frotadoj faritaj de Ivano, jen per fingre kaj jen per penisokapo, ŝi neniam estis kontentigita. Estis sentinta ian ekscitiĝon kaj plezuron, sed neniam ankaŭ la seksan eksplodon, malstreĉiĝon, tiun refreŝecon tiom dolĉan, tiom magian kaj konfuzigan.

Kun Ivano okazis alie. Ĉiufoje kiam ili renkontiĝis tie, en lia hejmo, dum Darinka, fratino de Ivano, eliris antaŭ la domo kaj gardadis, ili senvestiĝis nude por ke ili interkisiĝu kaj interkaresiĝu. Tiam ŝi prenis la penison permane, frotiĝis per ĝi kaj kiam, pro la fortiĝo kaj varmiĝo de la penis, ŝi ekkomprenis ke ĝi estis ekscitita, tuj forigis la kapon disde la vagino kaj daŭrigis frotadi la penisokorpon permane, jen malpeze-malpeze kaj jen impete, ĝis kiam ĝi enverŝiĝis inter la femuroj, kion ŝi rigardis scivoleme, ĉar tio ŝajnis interesa kaj amuziga. Tiel li kontentiĝis por si, ĉar malŝarĝiĝis kaj travivis la seksan akton ĝisfine, dum ŝi ridadis kun li kaj diris:

La salepo estas enverŝita jam!

Nun, unuafoje en la vivo, ili sentis ambaŭ kaj samtempe en la tuta sia profundeco kaj dolĉeco la seksan akton, ĉar ankaŭ la salepon ĉifoje li enverŝis enen, kion ŝi komprenis kaj ekĝuis tuje, sentante apartan plezuron kaj ĝojon, ne spertita ĝis tiu momento. Ĵus fininte, Ivano ellasis la kruojn kaj brakojn, kiujn ŝi mallevis malrapide kaj, per fermitaj okuloj, restis kvazaŭ svenita, senviva, laca kaj deprimita, sed ankaŭ kontenta, feliĉa tiom, kiom ne povus esti pli bone.

Feliĉa estis ankaŭ Ivano, kiu sin ĵetis sur ŝin kaj samtiel kuŝis kvazaŭmorta, senmova kaj kun fermitaj okuloj.

En la kameno krakis la brulligno flambrilante. Krom la fajro, sub tiu tegmento, nenio vivaĵo sentiĝis. Estis infestinta silento kaj kvieto, monotoneco gravedita per iaj strangaj sentoj, per ĝojo kaj plezuro, kiu kvazaŭ elfontis el la profundo de iliaj animoj, disvastiĝadis tra la korpo kaj levis ilin alten. Ili sentis sin en la ĉirkaŭbrako de unu la alia, kvazaŭ ili ne plu estus surtere, kvazaŭ ili estus leviĝintaj en la ĉielon kaj flugis.

Malrapide, post kiam ili ripozis iome, ili komencis denove interkisiĝi, babilante kaj rememorante la adoleskantecon, iliajn unuajn kisojn, la unuajn karesojn, la unuajn frotiĝojn.

Dĵanfize ekstaris kaj alportis el la ĉambro la matracon kaj ili ekuŝis tie oportune, kun la piedoj je la direkto de la kameno kaj fajro, malstreĉitaj, trankvilaj kaj certaj, kvankam nun Darinka ne gardis ilin.

-Ni geedziĝu, Dĵana!- diris Ivano subite, restante sur ŝi, apogite sur siaj manoj kaj moviĝante per la malsupra korpoparto.

Ĵus li enigis la penison en la vaginon, tuj eligis ĝin, por ke li ĝin denove enigu kaj faru tiun frotadon kaj tiun varmigadon, nun malrapidan, malhastan, ĉar la unuan koleron li estis elspirinta tie sur la kanapo.

Ĉu vi konscias, Vani?!- pretrespondis Dĵanfize surprizita, ĉar apenaŭ ŝi intencis pri geedziĝo.

Ŝi moviĝis per koksoj, turnigante kaj miksante kun ili, fojfoje ankaŭ premiĝante al Ivano kun krampfo. Ŝia korpo tordiĝis kiel angilo sur gruzo, dum per la kara mano skrapis kaj frotis malpeze-malpeze la ŝvelitajn testikolojn kaj okulrigardis, kvazaŭ ŝi volus ilin formanĝi.

Dĵana, kio okazis al vi tiel?!- daŭrigis Ivano sincere mirigita.- Kiam ni estis etuloj, mi volis seksumi kun ci, kaj ci ne volis, ĉar la virgecon intencis donaci al la edzo. Nun ci estas ŝanĝiĝinta tute. Kvazaŭ ne plu ci estas tiu mia iama Dĵana! Ci petis tuj kaj senpacience sekse kontaktiĝi. Eĉ per cia mano vi enigis mian penison enen de ci. Ci, Dĵana, iam volis edziniĝi kun mi, petegis min ke la tagon de la geedziĝo mi venu kaj forkapti cin, dum mi ne volis. Mi estis certa, ĉar tion nepre ne permesus mia patrino, ĉar ci estas muslimino kaj mi,-- preskaŭ li pretis diri ridete "mi estas dinsez"²³, sed ŝanĝis la menson kaj diris tiel, kiel estis envere,- mi estis kristano, ortodoksulo. Cia hejmularo iradis al la moskeo kaj la miaj iradis al la preĝejo. Nun mi volas edziĝi al vi, kaj ci ne volas. Kial, Dĵana?!

Kiel mi edziniĝu al vi, Vani?! Mi havas ses infanojn! Ci estas ankoraŭ juna. Ci devas edziĝi al kelkio junulino, virgulino, kiu naskos infanojn kaj fondos familion.

Infanojn povas naski ankaŭ ci!

-Jes, mi povas, mi povas, sed mi havas jam ses kun unu edzo!

Ne gravas, ci naskos ankoraŭ ses aliajn por mi!

Kion ci diras, Vani?! Ĉu ci konscias?!

- Kial ne, Dĵana? Ankaŭ mia patrino estas naskinta dekdu infanojn!

Dĵanfize pensis ke Ivano ŝokis, sed lia patrino envere estis naskinta dekdu infanojn. Ses estis mortintaj kaj ses ankoraŭ vivis: du filoj kaj kvar filinoj. Ivano estis malpliaga filo. La pliaga filo estis oficiro en Cetinje. Tri filinoj estis edzinigitaj, unu en Podgorica kaj du en Danilovgrado. Darinka-n, la malplej aĝan, oni edzinigis en Bar. Ĵus estis naskita la lasta infano, Darinka, oni mortigis la edzon de Nada, patrino de Ivano. Poste mortis, laŭvice, la bopatro kaj la bopatrino kaj nun ŝi vivis tute sola, escepte de tiuj tagoj, kiam Ivano- maristo, revenis hejmen el la navigado. Sed Ivano tute ne akceptis edziĝi. Fojfoje, venadis por vidi ŝin ankaŭ la filo- oficiro, samkiel la filinoj, aparte Darinka, kiu loĝis pli proksime.

La avo, restu li en paco, kiu estis la ĉefa obstaklo por nia geedziĝo, estas jam mortinta. La patrino ne plu kontraŭstaros al mi, ĉar ŝi pensas ke pli bone la filo edziĝu al muslimino, ol pluresti tiel, needzigitaj.

Ne, ne!- diris Dĵanfize- Tio estas neebila farotaĵo, Vano! Cia patrino povas fermi la okulojn kaj beni cin, sed ŝi apenaŭ povas kunvivi kun mi. Kaj mi ne volas disigi cin disde la patrino! Krome..

Kion alian ci volas diri ?

Mi estas ankaŭ iel maloportuna, Vani! Mi misfamigis jam ke mi formanĝas virojn. Miaj edzoj dronas en la maro. Mi ne volas ke ankaŭ ci dronu !

Kial tiaj superstiĉoj, Dĵana?! Ĉu ci kredas ilin envere?!

Ĉu mi kredas aŭ ĉu mi ne kredas, tiel mi misfamigis jam!

Venu Dĵana, ĉar mi nuligos tiun misfamon!

Ne, ne! insistis ŝi.- Ni estos pli feliĉaj tiel, kaŝe. La amo estas pli dolĉa tiel, sen krono kaj sen beno. Jen, ĉu mankas io al ni?! Mi estas tute cia kaj ci estas tute mia. Se ni geedziĝos, ĉu ni akiros pli. Nur zorgojn ni ekhavos. Tiel ni ne havas zorgojn. Ci en cia hejmo, mi en mia hejmo. Ci kun cia konto, mi kun mia konto. Ci kun ciaz zorgoj, mi kun miaj zorgoj. Plaĉas al ni, ni renkontiĝu, amuziĝu, kundormu. Ni ne bezonas, ke tion eksci la ceteruloj kaj ne estas kaŭzo ke tion sciu la ceteruloj. Tio koncernas nur nin, apartenas nur al ni kaj neniu rajtas enkonduki la nazon ĉi tien kaj embarasi nin.

Kiel ci volas, Dĵana, sed al mi ne ŝajnas honesta ke mi amuziĝu kun ci, kundormu kun ci, kvazaŭ ci estas mia edzino, kaj ke mi ĉion tion kaŝu de la mondo. Fakte mi estas ŝtelanta cin! Mi ŝtelas cian amon, cian plej grandan kaj aprecatan riĉaĵon, plej karan.

Tiom longe kiom neniu ekscios pri ĉi afero nia, ci nenion estas ŝtelinta, nenian malbonan estas farinta. Sed tiun tagon, kiam oni ekscios la aferon, tiam ci estos ŝtelinta ne nur la plej grandan kaj plej estiman riĉaĵon, sed la honoron mian, io kion oni ne povas estimi, ne povas pesi per iu ajn pesilo kaj ne povas pagi per iu ajn mono, eĉ nek per la oro de la tuta mondo.

Mi certas ke mi tenos la sekreton, jes mi tenos, ĉar mi ne estas infano. Eĉ kiam mi estis infano, dekkvinkses jara, mi savis la sekreton de nia amo, des pli hodiaŭ, estante viro, pli ol tridekjara. Tamen mi ne povas eskapi de la sento de ŝtelisto. Eĉ de ŝtelisto pli fia ol tiu kiu enigis la manon en alies poŝojn kaj ŝtelas monujon. La amo estas pli kara, Dĵana!

La amo estas kara ĝuste kiam oni ŝtelas tion kaj ne kiam oni ĝin aĉetas. Ne ŝtelita la amo ne plu estas amo. La tuta sekreto de la amo, ties tuta magieco, estas en ties ŝtelo. Nur tiel oni ĝuadas la amon kaj nur tiel la amo ja estas amo.

Aŭskultante, Ivano sin disigis de Dĵanfize, eliris el ties antaŭfemuroj kaj ekrigardis ŝin atente.

Ŝi tiris lin ree sur sin, mankaptis la penison kaj diris:

Enigu! Enigu, enigu!..Ni lasu tiajn babilaĵojn kaj denove amoru, ĉar por ni ambaŭ la vivo preterpasis envane ĝis hodiaŭ. Se mi havus la nunan menson, mi estus min doninta al vi ekde kiam mi estis dekdujara, ni amuziĝus kune kaj ne irintus en la manojn de tiu bestaĉo, kien kondukis min la gepatroj, - diris ŝi kaj ĉirkaŭbrakis lin forte, kisis kaj karesis malpez-malpeze kaj turnante lin sub sin.

Tiam ankaŭ Ivano forlasis la babilon kaj envolvis ŝin, kisadis, lekante la lipojn, jen la supran, jen la malsupran, kvazaŭ ili estus orangofiletoj gluitaj per mielo. Kisante, li turnis ŝin kaj ŝin metis denove sub sin.

Oh, ne!- rimarkigis Dĵanfize.- Nun estas mia turno por surgrimpi vin!

Kiel ci volas, Dĵana!- diris li kaj lasis ŝin surgrimpi.

Ŝi eksidis sur lian femuron kaj kisadis ekde la frunto ĝis la umbiliko, okulrigardis lin kaj enkondukis sian kapon inter ties antaŭfemurojn kisante.

Tiel, surgrimpante, jen li Dĵanfize-n, jen ŝi Ivanon, pasis la noktomezo. La fajro ekestingiĝis kaj ili sentis tion en siaj korpoj. Dĵanfize ekstaris kaj aldonis aliajn brullignaĵojn en la kamenon. Paŝante tra la kuirejo, ŝi eksentis ion sin verŝanta tra siaj antaŭfemuroj. Ŝi malfermis la krurojn sub la flamolumo radiate de la ĵus bruligata ligno.

Vani!- ŝi tuj ekkriis.- rapide ŝtopu tiun truon, ĉar estas enverŝata via salepo!

Tiam ankaŭ Ivano levis siajn okulojn tien.

Vidu kio estas verŝita sur miajn antaŭfemurojn! Kiom multe da tio ci estas enverŝinta enen?! Kie ci akumulis ĉion tion ?!

Nu, ekde la tempo kiam ci eneverŝis ĝin manfrotante, mi nenie estas plu enverŝinta- diris Ivano.- Longajn jarojn ĝi estas akumulita kaj ĉinokte eksplodis kiel fontano.

Dĵanfize prenis siajn kalsonetojn kaj sin viŝis.

Ekstaru, Vani!- vokis li.- Ni lavu nin! Estas varma akvo!

Ili eniris en la duŝejon.

Dĵana, kiom da tempo pasis ekde kiam vi razis cin lastan fojon?- demandis li rigardante al inter la antaŭfemuroj.

- Ci, Vani, devas scii ke ni, muslininoj, ne razas nin. Ni deŝiras.

Kiel deŝiras?- demandis li mire.

Tiel, kiel la kokinoj!

Kaj ĉu tio ne dolorigas vin kiam vi deŝiras? Ĉu tio ne sangigas ?

Ne, Vani. Mi anticipe ŝmiras la lokon per medikamento, nomata sarikana. Samkiel vi, viroj, ŝmiras vin per sapoŝaumo kaj razas vin.

Ĉu vi uzas tranĉileton kiel ni, viroj?

Ne, ne estas bezono por tranĉileto! Post kiam sarikano penetras la haroradikon, ĝi disiĝas disde nia korpo kaj deŝiriĝas facilmaniere, sen ia doloro.

Kaj de kiam ci ne deŝiris la harojn?

Ekde kiam mi dormis lastafoje kun la edzo.

Kaj kiom da jaroj pasis ĝis nun?

Sep aŭ ok, ankaŭ mi mem ne scias kiom da!

Kial ci ankoraŭ ne deŝiris la harojn?

Por ke ci komprenu, Vani, tiu sarikano malbonodoregas tiugradeo ke, deŝirante ĉi tion, ĉe la muslinaj virinoj malbonodoras ne nur la hejmo, sed la tuta loĝkvartalo. Tiel, ĉiuj ekscias ke la dommastrino estas deŝirinta sin. Kaj deŝiri ĝin signifas dormi kun la edzo. Kiam la virino estas vidvino, kun kiu edzo kundormu la povrino?!..Jen, do, kial mi ne estas deŝirinta! Kiam mankas la edzo, ne nur ne estas kialo por sin deŝiri, sed estas ankaŭ...

Tamen, Dĵana, ci devas deŝiri ĝin pro pureco!- interrompis Ivano.

Tiam malbonodorus la tuta loĝkvartalo kaj tiel oni ekscios ke la marista vidvino nun trovis amanton kaj estas skuanta la matracon!

Aha!- diris Ivano.- La kristanaj virinoj faras ĉi laboron pli facile! Ili razas sin kaj neniu ekscias, kiam ili agas tiel.

Multajn aferojn la kristanaj virinoj faras pli facile ol ni, musliminoj.

Morgaŭ, vespere, mi kunportos mian tranĉileton kaj ci razos cin kiel la kristaninoj.

Mi havas la tranĉileton de la forpasinta edzo- diris Dĵanfize.

Kie ĝi estas? Alportu ĝin al mi kaj mi razos cin ĉinokte!

Ŝajnas ke ci volas ankaŭ ĉi tiun muslinan aferon!- diris Dĵanfize, etendante la manon al la breto de la duŝejo, kie estis ankaŭ la tranĉileto de la eksedzo.

Kiel la muslinoj, ankaŭ la kristaninoj havas tutsaman kutimon! - diris Ivano.

Ĉu ci povas scii tion?!- eksaltis Dĵanfize ĵaluze.- Ci estas dirinta ke, escepte de mi, vi seksumis kun neniu ajn alia virino!

Sed mi povas supozi, Dĵana!- diris Ivano sapŝaumante la triangulon inter la antaŭfemuroj.

Levu la maldekstran gambon sur la seĝeton kaj tenu apude la kandelon, por ke mi pli bone vidu!- daŭrigis li, malfermante la tranĉileton.

Kaj kvazaŭ li estus profesia barbiro, per kelkaj lertaj kaj rapidaj movoj, li razis, lavis per akvo kaj kisis ŝian pubon.

Vidu kiel bela aspektas ĝi nun!- diris li.

Nun mi aspektas kiel junulino.

Ili komencis surĵeti unu al la alia akvon per glasego. Sin lavante kaj interkisante, frotante kaj karesante, ili denove ekcitiĝis. Dĵanfize kaptis lian penison permane, enigis en buŝon kaj komencis suĉi ĝin kiel cicumon, samkiel ŝi estis suĉinta kelkfoje estante knabinon. Ankaŭ Ivano enigis sian kapon inter ŝiajn antaŭfemurojn kaj kisis tie, enigante ankaŭ la langon, lekante.

Surpiede, apogante al la muro, ili interseksumis du aŭ tri aliajn fojojn kaj restis en la duŝejo ĝis ili finis ankaŭ la lastan varman akveron. Poste ili eliris kaj denove ekkuŝis sur la matraco, manĝis migdalojn kaj kaŝtanojn, kiujn bakis Dĵanfize en la kameno, trinkis prunlikvaĵon, drinkis alian glaseton da brando kaj ree interkroĉiĝis amorante, ĝis kiam tra la kuireja fenestro ekbrilis la matena lumo.

Tiam Ivano ekstaris, sin vestis kaj eliris. Dĵanfize sin envolvis per lantuko, kondukis lin ĝis la kortopordo, donacis kison, antaŭ ol li eliris, kaj poste surmetis riglilegon al la pordo kaj revenis en la kuirejon por pludormi. Ŝi estis laca, sed ankaŭ kontenta, feliĉa, tiom kiom neniam antaŭe en sia vivo.

“Por tia nokto- ŝi diris al si- indas donaci eĉ la vivon!”

Flarante sur kuseno la aromon de Ivano, ŝi endormiĝis tiom profunde kaj dolĉe, kiel neniam antaŭe. Neniam Dĵanfize, en sia vivo, kiun ŝi elkalkulis nur ekde la tago kiam ŝi estis koninta kaj kisinta Ivanon, ŝi apenaŭ ĝuis tian dormon. Ŝi sentis sin feliĉa, feliĉa kiel en la ĉielo, sed ankaŭ laca, laca kaj elĉerpita, kvazaŭ estus fandiĝintaj la ostoj kaj fariĝintaj ĝelo kaj...spermo. Eĉ en la dormo ŝi vidis torenton, kiu ne kunverŝis akvon, sed spermon. Subite la torento iĝis rivero kaj poste maro. Ŝi eniris ĝin kaj eknaĝis, mirigita, kiel ŝi naĝis tiel, dum ŝi apenaŭ scipovis naĝi. Tiam ŝi diris la si :

“Certe, la naĝon instruis al mi Ivano!”

Kiu scias kiom longe ŝi dormis kaj revis tiel. La suno estis transpasinta la zeniton. Ĝi proksimiĝis al la pinto de Meterizo, kiam tondris la kortopordo. Ŝi apenaŭ komprenis kio estis okazanta, kies estis tiu tondro. Malfermis ŝi la okulojn, rigardis mirigitekaj, nur kiam ŝi aŭdis la voĉon de Dĵela, ŝi konsciigis ke certe li estis frapanta al la pordo kaj vokis.

Tuj ŝi eksaltis surpieden kaj tiel, tute nuda, ekiris por malfermi la pordon. Elirinte en la korton, la freŝa aero rekonsciigis ŝin, tial tuj ŝi returniĝis vokante:

Atendu, atendu, mi tuj alvenos!

Ŝi vestis sin rapide per robo, prenis la matracon, lantukon kaj kusenon kaj alportis ilin en la ĉambron, levis la manĝotableton, kaj poste reiris por malfermi la pordon.

Dĵela eniris kun la azeno ŝargita per brulligno. Ŝi helpis al li malŝarĝi, poste invitis lin por trinki kafon. Kiam li eksidis en sia kutima loko, ŝi rimarkis siajn kalsonetojn meze de la kuirejo. Rapide ŝi forprenis ilin kaj malaperis en la dormoĉambron.

Reveninte, ŝi rigardis Dĵela-n en la okulojn. Ankaŭ Dĵela rigardis ŝin en la okulojn.

“Ĉu ĉi tiu estas kompreninta ion?!”- sin demandis Dĵanfize, ne sen maltrankvilo.

Ankaŭ Dĵela sin demandis:

“Kial estis tiuj kalsonetoj forprenitaj de la mato far Dĵanfize?!”

Kaj li rememoris ke li estis aĉetinta ilin.

“Kial ŝi estis ĵetinta ilin surplanken?”- denove sin demandis Dĵela.

“Certe pro kolero, ke mi ne akceptis fariĝi ŝia amanto!”

Dĵanfize surmetis en la fajron kafbolidon.

Alportinte la glaseton, Dĵela ekmiris ke, ĉifoje, ŝi ne pretigis kafon ankaŭ por si. Des pli, li miris ke ŝi ne eksidis, kiel kutime, apud li. Dĵela atendis ne nur ke ŝi eksidu, sed ankaŭ malkovru iomete sian genuon, vole aŭ nevole, silente aŭ dirante: “ Ne gravas, ci ne formanĝos ĝin!”

Kvankam liaj digno kaj konscio malpermesis tion, la okuloj kaj la animo petis tion, ĉar li amis Dĵanfize-n kaj adoris ties korpoharmonion. Ĉiam pli, li sentis por ŝi apartan amon, puran kaj sinceran, kiun li subpremis per la forto de digno kaj konscio kaj ne permesis ke tio malpuriĝu, frotaĉiĝu, kotumiĝu kaj makuliĝu.

Sed, ekde tiu nokto, kiam ili kune disdonis traktojn, kiam Dĵanfize ne petadis kaj ne haltigis lin perforte, por ke li dormu tie, li eksentis, ke io estis okazinta, io estis ŝanĝiĝinta ĉe ŝi. Des pli, li sentis tion nun, kiam ŝi ne plenigis glaseton por si, ne eksidis apud li. Li eksentis ankaŭ odoron, kvazaŭ brandan, sed tute

ne povus sugesti ke oni enkondukis en tiun hejmon tutan botelon da brando, ke unu nokton antaŭe, tie en la kuirejo, ankaŭ Dĵanfize estis drinkanta brandon kaj estis amuziĝanta. Tiun amuzon ofertitan al li, sed rifuzitan de li antaŭ du-tri noktoj. Kaj, ĉar li ne estis akceptinta, ĉar li duafoje estis transformiĝinta al Hazreti Hizri, ŝi sin ĵetis en la ĉirkaŭbrakon de alia persono, tiel, kiel ŝi estis ĵurinta jam kaj minacinta al li.

Dĵela eltrinkis la kafon kaj ekstaris. Dĵanfize ne diris, ke li vespermanĝu kun ŝi.

“Jes, jes, io estas okazinta al ŝi!” - disis li al si, elirante el la kortopordo kun la azeno antaŭ si.

Vespere, Ivano alvenis denove ĉe Dĵanfize. Dĵela alportis brulignon per la azeno kaj Dĵanfize bruligis ĝin en la kameno por varmigi la nudiĝintan korpon sian kaj tiun de Ivano.

Sed, varmiĝante per la brulligno de Dĵela, Ivano instruis al Dĵanfize ankaŭ la legadon kaj skribadon. Ekde longe antaŭe, li estis instruita al ŝi skribi mem la nomon IVAN. Nun por li ne estis malfacile instrui la skribon de la nomo XHANFIZE (Dĵanfize), ĉar tri literojn de tiu ĉi vorto ŝi jam sciis de la nomo IVAN. Ŝi malfacile distingis inter V kaj F, sed ankaŭ tion ekposedis. Post unu semajno, Dĵanfize komencis kompreni legolibron, alportita de Ivan, ĉar en sia hejmo apenaŭ estis aboco- libro nek skribpapero kaj kraĵono. Neniu el la infanoj de Dĵanfize frekventis lernejon. Pri la knabinoj oni eĉ ne parolu, ĉar estis pekaĵo ke ili iru al la lernejo de kauroj²⁴, de ŝkaoj²⁵, sed ankaŭ ne la knaboj. La lernejon en la urbo de Ulĝin frekventis nur la infanoj de kristanaj riĉuloj kaj malofte iu el la masklaj infanoj de la riĉaj muslimoj. La muslimaj knabinoj, eĉ de la konataj begoj²⁶ apenaŭ frekventis la lernejon, ĉar ankaŭ por ili estis konsiderate granda pekaĵo, nepardonebla, piedpremi la sojlon de la lernejo de kaŭroj kaj ŝkaoj. Estis la danĝero ke ili restu ne edzinigitaj.

Sed Ivano faris aliajn ŝanĝiĝojn en la vivo de Dĵanfize. Li estis mekanikisto kaj, vidinte kiel sin lavis Dĵanfize en la duŝejo, aranĝis por ŝi kaldronon kaj duŝon, por ke ŝi ne plu lavu sin per glasego. Post kelkaj tagoj li instalas ankaŭ kranon en la korton, por ke ili ne plu trinku putoakvon.

Kiam Dĵela rimarkis la kranon en la korto, li demandis mire al la Dĵanfize:

Kiu enigis ĝin al ci?!

Dĵanfize, kiu pormomente ne kaptis la sencon de la demando de Dĵela, ĉar ŝi intencis ion alian, tuj returniĝis vizaĝe al li kaj demandis:

Kion diras ci, Dĵela?!

Mi demandis, kiu enigis la kranon en la korto!

24 Nemuslimoj

25 Slavoj

26 Riĉaj muslimoj

Ah, la kranon!- respondis Dĵanfize, malpeziĝinte pro embarasiĝo, kiu subite forkaptis ŝin aŭdante tiun vorton “enigi”.


Ne longe pripensinte, ŝi daŭrigis:

Ivano! Alvenis iutage Ivano kun sia amiko kaj - tiu vorto “enigi” rondiradis en ŝia langopinto, sed Dĵanfize apenaŭ povis diri ĉion. Apenaŭ ŝi trovis alian vorton - traboris la muron kaj aranĝis la kranon.

Post kelkaj semajnoj, ambaŭ- Dĵela kaj Ivano- enŝipiĝis en la barko “Shpresa” (La Espero) kaj denove eknavigadis. Unuafoje, Dĵanfize iris en la havenon. Almenaŭ, li ekpensis ke ŝi eliris por konduki lin, kvankam pli longe ol kun li, ŝi staris kun Ivano. Eĉ ŝi estis malkovrinta la vualon, por ke li vidu ŝin. Dĵela aŭdis ŝin el la ŝipo voĉridante, eĉ per rido, kiu ne decis al vidvino, sed denove li ne misintencis, ĉar li konis delonge Ivanon, estis lia intima amiko kaj havis plej bonan opinion pri li. Dĵela estis certa, ĉar li en neniu haveno, kvankam needziĝinta, apenaŭ havis amantinon kaj ne frekventis la virinojn. Kiom li sciis, Ivano ne havis amantinon ankaŭ en Ulqin. Ke Dĵanfize, la vidvino de lia patro, estis amantino de Ivano, ekde la knabineco, li neniel povints imagi. Des pli, ke Dĵanfize nun estis amoranta kun li, danke al la rekonatiĝo tiun nokton antaŭ Kurban Bajramo²⁷, kiam ili estis disdonantaj traktojn en la urbo.

Esperantaj revuoj pri la albanaj verkaĵoj





La beletro de la malpermesata lingvo

de Ismail Kadare

tradukis el la albana Bardhyl Selimi

Mi estas rimarkinta, ke kvazaŭfratoj miaj el la eksa falinta komunista imperio en tiaj okazoj estas parolintaj pri la subpremado de beletro. Alidrite, temo kiu devus aparteni al publicistiko, kiun mi eĉ aldonus al la emociaj memoraĵoj, estas jam akirinta la statuson de scienca argumento.

Esence ne estas iu eraro ĉi-kaze. La subpremado de beletro kaj artoj en la komunisma mondo establiĝis al la rango de scienco. Sekve, la traktado de ĉi tiu subpremo povus esti farata en la sama stilo.

Ĉiuj aŭtoritaj ordoj en la mondo havis problemajn kun beletro. En ĉiuj kazoj estis beletro kiu finfine venkis. Dume oni devas diri, ke el ĉiuj ordoj, la sola kiu alproksimiĝis al la venko estis komunismo. Oni parolis multe pri tio, tial mi ne tro prilongigos.

Mi memorigu nur la demandon faritan multfoje: ĉu komunismo estas inventita iun novan armilon, armilon kiu estus fatala kontraŭ beletro?

La respondo estas jesa. Estas uzita envere nova inventaĵo. La komunismo estis la unua kiel ordo en la mondo komprenita, ke la granda beletro nenion suferus, ĉu pro cenzuro, ĉu pro prizonoj, nek pro ceteraj terurajoj. Por surgenuigi definitive ĝin, oni bezonis alian.

Tiu nova inventaĵo estis la kreado de nova raso de verkistoj, raso kiu per siaj propraj manoj detruus la arton de la parolo. Alivorte, perifrazante Josif Brodski-n, ne estis bezonate rekte detruji la domon de beletro, sufiĉus detruji la brikojn, do la materialon per kiu ĝi estis starigita. Tiel, per sabotajaj brikoj, la domo aŭtomate ekfalas.

Ĉi tiu radikala solvo estis atingita nur parte danke al la t.n. "socialisma realismo".

Verŝajne estis ĵuste ĉi tiu lasta. Komunismo, sciante, havis du agojn, unu 70-jaran, atingita de nur du ŝtatoj, Sovetunio kaj Mongolio, dume Kubo kaj Nordkoreio marŝas al tiu direkto. La alia ago, 45-jara, estas pli-malpli tiu de la landoj de Orienta Eŭropo, kie inkluzivigas ankaŭ mia lando, Albanio.

En la homara historio, la menciito kiel "radikala solvo por la beletro", havis ankaŭ alian version tre raran kaj ege teruran. Ĉi tiu versio ne rilatas al komunismo, sed al alia malfeliĉo: la otomana jugo.

Vi ja konas ĉi tiun jugon. Ĝi etendiĝis sur la tuta balkana duoninsulo. Ĝi submetis dekojn da popoloj, lingvoj, kulturoj. Ĝi disigis Balkanion de Eŭropo, strebis al la okupado de Eŭropo norde de via itala duoninsulo, okcidente.

Same kiel en la kazo de komunismo, tiel en la kazo de la osmana jugo, mia lando, Albanio, neniel povas pretendi, ke ĝi estis soleca viktimo. Ĝi enfalas en tiun jugon kune kun ĉiuj popoloj de Balkanio.

Ĝi suferis la saman inferon. Ĉar mi menciis la agojn de komunismo, mi akcentas ke la tempo de la otomana jugo, laŭ la longeco, povas nomigi sentime infereca: kvincent jaroj.

Sonas nekredeble, kaj envere estas nekredebla, des pli ke lastatempe la revizistoj de historio estas starigintaj la tezon, ke tia longa okupado apenaŭ povus nomigi okupado. Ili estas serĉantaj alian terminon, pli diversan kaj precipe pli taŭgan por la hodiaŭa vizio eŭropa pri la repaĉigo de popoloj.

Malgraŭ la klopodoj por bonkomprenemo, persone mi ne kredas ke oni trovas alian vorton por anstataŭigi la vorton "okupado". Tiel kiel okazis al la vorto "morto", kiu kvankam multe pli longa ol ĉiu okupado, daŭre nomatas same kiel antaŭe, "morto".

Mi aliris vian atenton pri la tempolongo kvinjarcenta de la osmana jugo, ne por grandigi la dramecon de io al kio la drameco sufiĉas kaj abundas, sed simple por reveni al la problemo supre menciita, tiu pri radikalaĵoj de la problemo de beletro.

Temas pri alia radikala solvo, du-foje, eble dek-foje pli terura: malpermeso de skribado mem.

Sed mi eldiris ekde la komenco: el ĉiuj lingvoj de la granda balkana duoninsulo, la albana, uzata de mi, estas la sola, kies skribado estis malpermesata dum kvincent jaroj.

Mi ne konas alian landon en la eŭropa kontinento, kies lingvo estis trafita de tia teruro. Kial? Kiel estis taksite poste, kial ĝi ne ŝanĝigis dum la paso de jarcentoj, kiel ĝi daŭris ĝisfine, en la momentoj kiam la maljuniginta imperio estis mortanta?

Al ĉi tiuj demandoj mi malfacile povas respondi. Al albanoj oni permesis multon: oni permesis preĝojn, posedaĵojn, altajn titolojn en la armeo kaj administracio, eĉ la postenon de imperia ĉefministro, kiun ili akiris kelkajn fojojn, sed neniam permesis unu aferon: la skribadon de la albana lingvo. Ĉi tio estis vera malpermeso drameca kaj senrevena.



Legata, satata kaj glorata: Kadare.

La unuaj paĝoj de la artikolo "La beletro de la malpermesata lingvo"



TRADUKA ĜENRO

Eksterordinara kultura evento

Kun aparta honto mi povas deklari, ke mi estas preskaŭ absoluta nekonanto de la albana beletro, ĉar mi certas, ke la saman deklaron tre verŝajne ripetis ĉiu averaĝa esperantisto. La albana literaturo, se ne inkluzivi la verkojn de Ismail Kadare, estas relative nekonata, kaj nemulte tradukata. Tial la apero de *Hunda haŭto* de Fatos Kongoli en esperanto estas vera refreŝigo de la literatura scenejo de Esperantio. Des pli: ĝi estas eksterordinara kultura evento.

La hoko por tralegi la verkon de Kongoli estis ĵuste la nekono de la albana literaturo, tion en la esperantaj, kiom en la enlandaj literaturaj rondoj.

Antaŭ ol komenci legi, mi klopodis en mia memoro trovi ian ajn spuron pri legitaj albanoj. Krom la legenda "K" numero 1, kiel oni kromnomas la famegan Ismail Kadare, mi pene trovis alian nomon, tiun de Fan Stilian Noli, sed mi ne povis rememori kion mi efektive legis de tiu lasta. Pri Kadare mi tamen trovis eĉ esperantan spuron. Komence de 1990-ia loka E-klubo eldonadis literaturan gazeton *Koko*, en kiu ni aperigis du poemojn de Kadare, tradukitajn de Nikola Rasić.

Fatos Kongoli inter literaturistoj estas konsiderata la dua albana "K", staranta tuj apud Kadare. Do temas pri unu el la plej gravaj nuntempaj verkistoj de tiu malgranda kaj dum plurnaj jardekoj tute fermita balkana lando. Kongoli staras en la rondo de nur kelkaj pli famigitaj albanaj verkistoj, ekzemple Visar Ziti, Bashkim Shehu, Dritëro Agolli, Vath Koreshi au Zija Ĉela. En la dua duono de la 20-a jarcento estis malmultaj verkistoj kiuj sian subveragan vegetadon klarigis per la komunisma doktrino, en kiu ne eblis esprimiĝi en verkiste libera maniero. Prognostoj tendis grandan eksplodon de literatura kreemo en la post-komunisma Albanio, opinante ke la literatura semo dum la komunismo kaŝe ŝvelis, kaj do ĝin atendas disbrevo de la talente "gravedaj" verkistoj. Sed okazis malmultaj sensacioj. Unu el ili certe estas Kongoli.

Antaŭ la legado de la romano mem, mi tralegis la tripaĝan postparolon, kiu konigas al la leganto la verkiston kaj mal-longe skizas la verkon.

Kongoli estas prozisto. Li studis matematikon kaj laboris kiel matematikinstruisto kaj redaktoro de la revuo *Drita*. En la tempo de la falo de la dik-

recenzo de Josip Pleadin

Hunda haŭto, de Fatos Kongoli tradukis el la albana Tomasz Chmielicki kaj Bardhyl Selimi, eld. Podaĥia Biblioteko Lukasz Górnicki, Białyssok 2011

La unua paĝo de la artikolo pri Fatos Kongoli